no(uK'D 12/211

LILIO

RAKONTO

ORIGINALE VERKITA EN ESPERANTO

DE

E. ALLEYNE SINNOTTE, F.B.E.A.

PRICE: 2s. 6d. PREZO: SM. 1·250.

LONDONO:
BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,
17 HART STREET, W.C. 1
1918.

ANTAŬPAROLO

Kia estos la sorto de mia negranda libro, kiu post longa laborado estas jam preta iri en la literaturan mondon de Esperantujo? Pri tio mi tute ne povas diveni. La rakonto ne pretendas esti io pli, ol karaktera skizo de brava virino. Ekzistas multaj "Lilioj" en la mondo, kiuj tamen ne havas la konsolon kaj helpon, kiujn donus al ili vizio tia, kian havis la Lilio, kiun mi provis portreti. Mia rakonto alportu esperon kaj kuraĝigon al almenaŭ unu suferanta persono!

Se la Esperanto de mia rakonto estas bonstila, tion mi multe ŝuldas al la sindona, zorga kaj lerta helpo kaj kontrolo de mia amiko sinjoro George Gordon, F.B.E.A.

Mi deziras danki sinjoron Emilio Gaston Ugarte (Hispanujo) kaj fraŭlinon Margaret Rüster (Germanujo) por ilia kritiko kaj kuraĝigo pri la unua parto de la skizo, kiun mi submetis al ili antaŭ pli ol tri jaroj.

Edith Alleyne Sinnotte, F.B.E.A.
"Ibhar",
Wolseley Street,
Mont Albert,
Victoria, Aŭstralio.

la 16an de Julio 1917.

LILIO

ĈAPITRO I

Estis iu sabato en Anglujo, kiam la printempo preskaŭ finis sian ŝatatan taskon kovri la arbojn per la plej belaj vestoj imageblaj, el delikataj nuancoj de helverdaj folioj kaj rava floraĵo ruĝeta, blanka aŭ orkolora.

La malsekan teron la printempo tapiŝis per la plej hele verda herbo ie ajn videbla, miksita kun ridetantaj lekantetoj, netimaj ranunkoletoj tre amataj de la infanoj, kaj per bonodoraj violetoj, modeste tenantaj sin, nevolantaj sin trudi tiel, kiel faradas la primoloj, iliaj najbaroj, nek volantaj sin kaŝi en kovritaj de musko anguloj, aŭ inter ŝtonoj, kiel la filikoj, sed dezirantaj ĝui seninterrompe la ravan muzikon de la birdoj kun la murmuretado de rivereto kiel dolĉa akompanaĵo.

De tempo al tempo la helblua ĉielo kovriĝis de subita nubo, kaj refreŝiga pluveto ekfaladis. Tuj poste ĉio estis sunbrila kaj hela denove.

Kelke da homoj estis ĝuantaj libertempon sur loko malproksima de Liverpolo je duhora veturado per vagonaro.

Du el ĉi tiuj ĉirkaŭvagadis brakon ĉe brako, celante trovi komfortan sidlokon, kie ili povos

esti apartaj de la ceteraj libertempuloj, grupiĝintaj sur la herbejo, kie la infanoj diskuris, kolektante florojn, por fari el ili bukedojn aŭ girlandojn.

La du homoj kompreneble estis gefianĉoj. La viro estis sufiĉe altkreska, kun fortika korpo, kaj estis sinjore vestita en griza pantalono, longa, nigra surtuto kun baskoj, kaj veŝto ankaŭ nigra, montranta neĝblankan ĉemizon kaj kravaton el malhela silko.

Sur la kapo li portis altan silkan ĉapelon. Liaj okuloj estis bonhumoraj, kaj liaj brunaj lipharoj kaj barbo kaŝis bonhumoran sed ne fortan buŝon kun negranda mentono.

La fraŭlino lin akompananta estis negranda sed gracia ; ŝi estis bonguste kaj penplene vestita per palblua lanaĵo delikate teksita kaj garnita per rubandoj el nigra veluro kun kremkoloraj puntoj. Granda ĉapelo el nigra pajlo kun miozotoj kaj puntoj similaj al tiuj sur la vesto, kovris bone formitan kapon kronitan de blondaj buklaj haroj, el kiuj kelkaj falis kvazaŭ karese ĉirkaŭ la intelektoplena frunto kaj konkosimilaj oreloj.

La blugrizaj okuloj montris konfidemon kun trankvileco. La nazo estis iom granda, kaj la delikate kurbiĝanta buŝo, ankaŭ iom granda, estis bele formita, kaj, pro mallonga supra lipo, montris regulajn, bonajn dentojn. La granda mentono atestis firman karakteron.

La fraŭlino demetis la gantojn, tial oni povis vidi bonformajn manojn, kiuj ne kutimis fari fortan laboron. Ŝi portis unu solan ringon kun

bonega rubeno, ĉirkaŭita de perletoj ; tio estis la donaco de la fianĉo, kiu estis gvidanta ŝin al benko lokita apud la rivereto, kies murmuretado estis jam aŭdebla.

— Jen, Lilio—li diris—sub tiu saliko estas la ĝusta sidloko por ni kun seka planko por la piedoj.

— Kiel elegantaj estas la salikoj kun siaj branĉoj gracie kliniĝantaj ĝis la rando de la akvo, kvazaŭ ili kisus ĝin!—diris Lilio kun admira rigardo.

— Jes—respondis sinjoro Ĉester—mi pensas, ke mi admiras ilin pli ol ĉiujn arbojn, ne nur pro ilia gracio, sed ankaŭ ĉar ŝajne ili la unuaj akiras verdecon kaj ili la lastaj perdas ĝin. Ĉi tie ili estas abundaj, kaj ili bone ŝirmos nin kontraŭ la pluvetoj. Ni sidiĝu ĉi tie, sed atendu unu momenton, dum mi sternos vian pluvmantelon sur la benkon, por gardi vin kontraŭ malpurigo de via bela vesto. Jen, ĉu estas komforte al vi, mia kara ?

Post iom da babilado pri negravaĵoj, sinjoro Ĉester demandis :

— Lilio, kara, ĉu vi jam povas difini la tagon de nia edziĝo ? Ĉu mi ankoraŭ ne atendis sufiĉe longe ? Mi estas tre soleca ! Se vi atendos la konsenton de la patrino, mi timas, ke vi devos longe atendi !

— Mi multe pripensis la aferon, Filipo, kaj fine mi ankaŭ decidis, ke ne estus bone pli longe prokrasti. La patrino tute ne volas priparoli la aferon kun mi, ŝi ĉiam diras : " Vi jam estas plenaĝa kaj devas fari laŭ via bontrovo. Nur

B

ne ĝenu min pri afero, kiun mi neniam aprobis, ne aprobas, nek iam aprobos. Vi faris vian elekton, ne demandinte mian opinion, kaj mi supozas, ke vi povas fari pluajn aranĝojn, sen mia konsilo aŭ konsento!"

—Ni do faru tion, amatino mia! Kiamaniere ni aranĝu pri la ceremonio? Eble konsentu iri kun mi en la proksima semajno kaj ni sen parado fariĝos edzo kaj edzino? Poste ni iru sciigi la patrinon pri la afero, kaj eble tio plaĉos al ŝi tiom, ke ŝi tuj diros: "Dio benu vin, miaj infanoj. Estu feliĉaj: Estu . . ."

—Ne, Filipo—respondis Lilio ridetante—mi timas, ke tio ne ebenigus nian vojon al la favoro de la patrino. Tamen mi havas planon. Mi povas esti preta edziniĝi kun vi post ĉirkaŭ ses semaj . . .

—Ne pli frue ol tiam?—interrompis sinjoro Cester.

—Ne pli frue ol post ĉirkaŭ ses semajnoj, Filipo kara, multaj aferoj restas farotaj, sed bonvolu ne interrompi min, sinjoro, mi scias, ke tio estas malfacila afero ĉe vi, sed nur penu—ridete admonis Lilio.

—Mi obeos!—diris Filipo kun ŝerca humileco.

—Nu, do, mi *esperas*, ke mi povos finpretigi ĉion necesan en la daŭro de la sekvontaj ses semajnoj, kaj tiam, se vi ankoraŭ amos min, kiel vi nun asertas—vi povos komenci fari aranĝojn pri nia edziĝo . . . Nu, vi estas tre silenta . . . kial vi ne certigas min, ke vi amos min por eterne kaj tiel plu?

—Pardonu min, via moŝtino, ke mi rememori-

gas vin, ke vi ĵus ordonis al mi silenti, kaj ke mi nur volas obei al vi.

— "Ĉiu regulo havas escepton." Forgesinte tion, vi perdis okazon fari bonan komplimenton al mi—diris Lilio, ridante je la ŝerce serioza mieno de la fianĉo—sed ni estu seriozaj. Jen mia projekto. Mi priparolis la aferon kun onklino Anna; jen kion ŝi konsilis. Ni—vi kaj mi—difinu la daton de nia edziĝo; ni sciigu la patrinon pri ĝi; poste ni lasu la aferon tiel. Se la patrino volas fari iajn klopodojn, eĉ proponojn, pri la afero, bone, ni agu laŭ tio, sed se ŝi nenion proponos nek aranĝos, tiam onklino Anna invitos nin festeni ĉe ŝi kaj onklo Roberto tiun gravan matenon, kaj ŝi faros ĉiajn necesajn aranĝojn. Sed—Lilio plue diris—mi ne povas pensi, ke la patrino restos tiel . . . tiel nepardonema . . . kaj neafabla . . .

— Nepardonema! . . . kion ŝi havas por pardoni?—interrompis ŝin Filipo—vi el ĉiuj ŝiaj infanoj estas la plej konsiderema kaj sindonema pri ŝi! Tamen ŝi akceptadas ĉiajn viajn servojn kiel rajton . . .

— Kaj ĉu ŝi ne rajtas ilin, Filipo—diris milde Lilio—la infanoj ŝuld . . .

— Ŝi havas iajn sed ne ĉiajn rajtojn super vi, kara, tute ne tiom, kiom ŝi volus kredigi al vi. Mi supozas, ke ŝi forlasis iam siajn gepatrojn . . .

— Tamen, kara, tio ne estas bona temo, ni jam tiel ofte diskutis ĝin sen ia bona rezultato. Cetere mi jam diris, ke mi faris mian decidon: feliĉigi vin kaj min samokaze! Dum ni povas esti solaj, ni prefere priparolu la detalojn de nia

estonta agado kaj de la edziĝa soleno, ĉu ne vere? Mi timas, ke post ne longe tiu egoista reklamisto trovos nin denove, kaj tiuokaze ne estos eble interparoli pri niaj propraj aferoj.

— La ĉieloj malpermesu tion!—fervore ekkriis sinjoro Ĉester—mi povus facile kontentigi ekzameniston per laŭvorta ripetado de la kutima konversacio—ne, monologo—de tiu tedulo. Nur pensu, Lilio, jam tri fojojn hodiaŭ, dum mi staris sur la stacio atendante vian alvenon, li sciigis min pri sia granda repertuaro, kaj diris, ke li ne bezonas laborenspezi pro tio, ke li havas renton! . . . sed . . . ne vere! . . . jen li mem! ni tuj foriru . . . eble li ne ankoraŭ vidis nin! . . . kiel diras la proverbo, "Paroli pri la anĝeloj aŭdigas iliajn flugilojn."

CAPITRO II

Kvankam la aĝo de sinjoro Ĉester superis tiun de Lilio je dek du jaroj, tio ne donis al sinjorino Breton, kiu estis vidvino kaj la patrino de Lilio, la rajton pensi, ke sinjoro Ĉester venadas ofte al la domo pro amo al ŝi, ne al ŝia filino.

Tamen tion ja pensis la patrino; sekve ŝiaj miro kaj kolero estis grandaj en la tago, kiam sinjoro Ĉester petis ŝin pri la mano de ŝia dua filino Lilio, kiu jam antaŭe donis jesan respondon al li.

De tiu tago sinjorino Breton neniam tute pardonis sinjoron Ĉester, nek sian filinon, pri sia propra, stulta eraro!

Lilio longe pripensadis, longe esploradis siajn koron kaj devon, ŝanceliĝante jen pri sia devo al la patrino, jen sia inklino al la amata fianĉo.

—Ĉar,—ŝi diris al si per la pensoj,—mi ne estas sola infano, eĉ ne sola filino. La patrino ankoraŭ havus Alicon, Marianon, kaj Florenjon. Cetere mia amato estas ja sola kaj senparenca.

Sinjoro Ĉester ne estis riĉulo, kontraŭe; sed li amis Lilion tiom, kiom li kapablis ami, kaj la amo ne povas konsideri kion ajn, krom la deziro kunestadi kaj la ĝoja povo servi unu la alian. Eble lia amo estis malpli sinoferema, ol tiu de Lilio. Li volis akiri por si mem, ŝi volis sin doni. Kompreneble ŝi ankaŭ volis akiri por si mem, sed ŝi kutimis pensi pri li:

— Li estas ĉiam soleca; sola li eniradas sian hejmon, kie troviĝas neniu, kiu havas la rajton bonvenigi lin; sola li eliradas, kaj ĉe li estas neniu, kiu sentas deziron deteni lin iom pli longe, kiu havas la rajton adiaŭi lin. Sola li kutimas sidiĝi por manĝi . . . Kiel soleca li devas sin senti. Mi forte ĝojus, se mi havus la rajton estadi ĉe li . . .

Ĝuste pro tio, ke li ja pasigadis sola tiom da tempo, ke neniu troviĝis en lia domo krom dungito, kies sola devo estis plenumi lian volon, nenio malhelpis lin agi laŭplaĉe, kaj pro tio, ke li estis tre homa, li ne povis ne fariĝi multe pli sinservema, ol Lilio.

Klare vidis tion nek unu, nek la alia: ili ne analizis sian amon, ili nur sciis, ke ĉiu bezonas la alian, ke io en la animo de ĉiu pli kaj pli konstante kaj insiste sopirvokas al la alia, kaj ke neniu kaj nenio sur la tero povos ilin kontentigi, krom la privilegio esti ĉiam kune.

Ili jam apartenis al si laŭsente, laŭpense, ili nur bezonis la leĝan sankcion, por ke ili povu kunvivi. Se oni ordonus, ke ili ne kunvivu, ambaŭ suferus.

Malgraŭ sia dolĉeco, Lilio havis firman karakteron; sinjoro Ĉester tian ne havis. Lin oni povis facile inklinigi fari kiel oni volos; li povis diri "ne" al ies peto pli malfacile, ol povis Lilio. Unuvorte, li ne estis malbona, sed li ne havis fortan volon.

Tuj post la ceremonio, la ĵus edziĝinta paro, instigite de la bonkora onklino Anna, iris al

sinjorino Breton, por insiste peti, ke ŝi akompanu ilin al la festeno. Fine ŝi cedis.

Krom unu-du plej intimaj amikoj, nur parencoj kunvenis ĉe la festeno.

Lilio, jam nun sinjorino Ĉester, neniam bedaŭris sian decidon. Ŝia edzineca vivo estis feliĉa. Kiam, unu jaron post ŝia edziniĝo, bela, fortika filineto naskiĝis, la edzo kaj ŝi konvinkiĝis, ke nenio jam mankas al ili por plenigi ilian ĝojon.

Grava kaŭzo por gratulo estis la fakto, ke post la naskiĝo de la infaneto la patrino de Lilio multe pli inklinis forgesi pri sia antaŭa malplezuro kontraŭ la edziniĝo de Lilio kun sinjoro Ĉester.

Tamen ne longe daŭris ĉi tiu plena feliĉeco.

Estis ĉagrene, ke sinjoro Ĉester estis tia homo, kia povas rifuzi al neniu petanto pri monhelpo.

Venis tago, kiam la ordinare gaja sinjoro Ĉester aspektis tre malgaje. Li povis kaŝi antaŭ Lilio nek sian ĉagrenon nek ĝian kaŭzon, sed post iom da tempo sciiĝis ŝin, ke li senpripense subskribis paperon, per kiu li promesis pagi certan sumon da mono, ŝuldatan de amiko, kondiĉe, ke tiu ĉi mem ne povos ĝin pagi.

Antaŭ kelke da monatoj li tion faris. Poste la facilanimulo tute forgesis pri sia subskribo, ĝis li ricevis postulon pagi sumon, pri kiu li neniel rajtis promesi la pagon, pro devo al la edzino kaj infano.

La kompatindaj geedzoj multe interparoladis pri la malĝojiga afero de la mono, kaj decidis, ke ili devos ĝin pagi.

Ili faris tion, sed la ĉagrenoj de ambaŭ komenciĝis.

Sinjoro Ĉester fariĝis koleretema, maltrankvila; al la demandoj de Lilio pri la kaŭzo de tio, li ne volis malkaŝe respondi.

Fine en unu neforgesebla tago li diris al Lilio, ke li jam decidis forlasi sian laboron tie kaj foriri el Anglujo al Usono ; ke, alveninte tie kaj perlaborinte hejmon, li skribos al ŝi, por ke ŝi sekvu lin kune kun la malgranda Florenco kaj ankoraŭ unu infano, kies baldaŭan alvenon ili atendis ; ke nur la nenasko de la infano malhelpas, ke li kunprenu la edzinon kaj Florencon. Li plue diris, ke li devas foriri per la vaporŝipo de la proksima semajno.

Lilio forte ribelis kontraŭ la foriro de sia edzo kaj emocie penis decidigi lin ŝanĝi sian intencon, sed vane.

Li, ordinare tiel facile influebla, jam restis nefleksebla pri sia decido, kiun efektive li ne povis ŝanĝi pro la definitiveco de sia negoca aranĝo.

. . . .

Kun malgaja koro, Lilio zorge preparis ĉion, kion li bezonis, por ke nenio manku al la vestaro kaj vojaĝaj komfortoj de la edzo.

Inter iliaj amikoj estis unu, kiu faris proponon, pri ofico ĉe bieno, apartenanta al parenco en suda ŝtato de Usono, kie oni kulturadas la kotonon.

Sinjoro Ĉester avide akceptis la proponon, antaŭ ol konsiliĝi kun la edzino, pro timo, ke eble ŝi decidigos lin ŝanĝi sian intencon formigri.

CAPITRO III

Nu, sinjoro Ĉester foriris kaj lia dua infano naskiĝis; tio estis knabeto egale bela, kiel la unuenaskita infaneto.

Lilio tiam havis bonan servantinon, pri kiu ŝi esperis, ke ŝi povos ŝin teni, ĝis la edzo povos sendi por venigi ŝin. Per ŝparado ŝi esperis daŭrigi la monsumon je sia dispono, ĝis la edzo sendos pluan.

Kiel longedaŭraj ŝajnis al ŝi la semajnoj, ĝis alvenis letero sciiganta, ke la edzo alvenis Nov-Jorkon, kiu tamen ne estis la fino de lia vojaĝo.

La foreston de sia edzo ŝi forte sentis. Ĝis tiam kredeble ŝi ne plene konstatis, kiel necesa li fariĝis en ŝia vivo, kiom li plenigas ĝin.

Antaŭe se oni demandus al ŝi: Kiu estas al vi pli kara, via edzo aŭ via infano? kredeble ŝi ne povus klare respondi, ĉar ambaŭ estis bezonataj, ambaŭ estis egale, se ne same, amataj. Sed jam nun ŝi sciis!

Antaŭ ĉio, ŝi sopiris al la edzo; nedormante ŝi ne povis forgesi lin; dormante ŝi sonĝis pri li. Iufoje ŝi iom penis forigi lin de siaj pensoj, ĝis la ĉiutagaj devoj estos plenumitaj, sciante, ke eĉ la fluado de la pensoj havas siajn limojn, kaj se oni tro pensas pri unu persono aŭ objekto, per tio oni malpliigas la fluadon al aliaj aferoj.

. . . .

Lilio sciis, ke estas necese, ke ŝi regadu siajn

pensojn; tamen akiri tian sinregon ne estas facile.

La leteroj alvenadis akurate per ĉiu el Usono poŝto. Iam kaj iam ili enhavis malgrandajn sumojn da mono, plejofte ili konsistis el ĉirkaŭ dek ses paĝoj plenplene surskribitaj, kaj per ili, multfoje kaj multmaniere, la edzo esprimis sian amon al la edzino kaj sian fortegan deziron revidi ŝin kaj estadi apud ŝi.

Unu tagon Lilio ricevis tre ĝojigan leteron, kiu informis ŝin, ke jam tre baldaŭ, eble post nur du-tri monatoj, la edzo sendos al ŝi sufiĉe da mono por pagi la koston de la veturo por ŝi kaj la du infanoj; ke ŝi povos veturi sur ŝipo, kies estro estas lia amiko, kaj tial ŝi jam povos fari ĉiujn necesajn preparojn por la vojaĝo, poste . . . ĉio estos ĝoja por ĉiam!

Ŝajnas, ke fininte skribi la leteron, sinjoro Ĉester reprenis la plumon por aldoni:—Ankoraŭ unu fojon adiaŭ, kara Lilio! mi fordonus interŝanĝe Amerikon, se mi povus ree ĉirkaŭpreni vin! mi pensas, ke mi ne ree ellasus vin el miaj brakoj, se mi nur povus ankoraŭ unu fojon teni vin! Dio benu vin, karulino. Li gardu vin kaj min kaj niajn etulojn, ĝis ni povos ree renkontiĝi—sur la tero, se tio estas Lia volo, se ne, en la ĉielo!

. . . .

Lilio forte ĝojis pro la sciigo kaj zorge faris la necesajn preparojn.

Kiel sopire ŝi deziris montri al sia edzo ilian knabeton, kiu ĵus atingis la aĝon de ok monatoj, ĉiutage fariĝante pli bela kaj inteligenta.

Ĉiufoje en la tago, kiam la leteroj de la edzo

devus alveni, Lilio kutimis elrigardi tra la fenestro por vidi tuj, kiam la leteristo aperos.

Ekvidinte lin, ŝi ĉiam malfermis la pordon, staris kun atenda teniĝo, kun rideto sur la beletaj lipoj, kun mano preta ricevi la avide deziratan leteron. Sed post la ricevo de la suprecitita letero, pasis kelke da semajnoj, en kiuj Lilio ricevis neniajn sciigojn pri sia edzo, kaj ŝi konsumiĝis de maltrankvilo.

Unu matenon, ankoraŭ unu fojon ŝi staris ĉe la pordo, por ricevi la ĉiam pli deziregatan leteron.

Ŝi jam ne ridetis pro plezura antaŭsento; kontraŭe sur ŝia vizaĝo montriĝis esprimo de maltrankvilo, kvazaŭ ŝi sopiras ion, pri kio ŝi samtempe timas, ke ŝi ne ricevos ĝin.

Sinjoro Ĉester kutimis enmeti siajn leterojn en kovertojn, sur kiuj li stampis la nomon kaj adreson de la ricevonto, kaj kiam la leteristo, kiu vidis la kreskantan maltrankvilecon de Lilio kaj divenis ĝian kaŭzon, montris tian stampitan koverton, la vizaĝesprimo de Lilio tuj heliĝis, ŝia teniĝo malstreĉiĝis, dum kvazaŭ granda ŝarĝo glitis for de ŝia spirito.

Sed tio daŭris nur momenton. Palpante la ĵus ricevitan leteron ŝi konsciis, ke ĝi estas tre malpeza kaj maldika, kvazaŭ ĝi konsistas el nur unu folio da papero.

Proksime de la patrino paŝetis Florenco, al kiu Lilio ekparolis :

— Kia nebona paĉjo! sendi tian mallongan leteron!

Rapide forŝirinte la koverton, ŝi trovis, ke la

letero ne estas skribita de la edzo, kiu jam neniam plu povos skribi al ŝi!

La letero estis skribita de iu sinjoro, kiu loĝis en la regiono, kie laboris kaj loĝis sinjoro Ĉester; per malmultaj vortoj li sciigis, ke la edzo de Lilio ekmalsaniĝis pro tifeca febro, ke unue li bone progresadis, kaj ŝajnis, ke li resaniĝos, sed subite, tuj kiam li la unuan fojon ellitiĝis, la koro ĉesis bati kaj li mortis.

Leginte la leteron, Lilio eligis dolorplenan ekkrieton; akra doloro pikis ŝian koron, morta paleco kovris ŝian vizaĝon, kaj ŝi duonesvenis. Tamen post minuto ŝi rekonsciiĝis per la karesaj tuŝetoj kaj vortoj de la malgranda Florenco, kiu timis, vidante sian patrinon tiel malĝoja kaj malsane aspektanta.

Lilio komencis tremi per la tuta korpo. Ŝi tre penis kolekti siajn fortojn kaj pensojn, ne povante kredi, ke ŝi efektive ne dormas. Ŝi diradis al si:

— Ĝi estas nenio alia ol malbona sonĝo, el kiu mi vekiĝos post nelonge! . . . Reala ĝi ne povas esti! . . . Ĉu estas vere, ke mia edzo *mortis*? *Mia* edzo! Li, kiu neniam plendis al mi, eĉ la plejmalmulte, pri sia sanstato! kiu ĉiam ŝajnis farti tiel bone! Mia *edzo*, pri kiu mi kredis ĝis tiu ĉi momento, ke li preparas novan hejmon por mi kaj la infanoj! . . .

. . . .

Tre bedaŭrinde ŝajnis al ŝi, ke la edzo en sia malsano, devis esti sola, malproksime de ŝi, dum ŝi mem nenion sciis pri la afero! Kiel forte ŝi bedaŭris, ke ŝi ne povis esti ĉe lia litflanko, ne

povis lin flegi, per nenio povis lin servi! Eble, se ŝi estus apud li kaj mem prizorgus lin, li ne estus mortinta. Sed eĉ se li nepre devis morti, tiam se ŝi nur estus apud li, ŝi povus multon fari por li, faciligi kaj eĉ dolĉigi al li la tempon de suferado. Krom tio, ŝi jam nun havus karajn memorojn pri tiu tempo kaj povus pli poste rakonti kelkajn el ili al la infanoj. Kredeble li estus klariginta al ŝi siajn esperojn kaj dezirojn pri la infanoj . . .

Ŝi decidis, ke de nun ŝi penos agi rilate al la du infanoj tiel, ke ili neniam sentos la mankon de sia patro . . .

Subite ŝi rememoris, ke ne eĉ unu fojon li vidis la vizaĝon de ilia malgranda filo! neniam vidis kiel gaja, petolema li estas! neniam sentis liajn braketojn ĉirkaŭ sia kolo! neniam aŭdis lian dolĉan voĉeton balbuti :—paĉjo,—kiel ŝi instruadis lin! . . .

Ŝi ekploris.

. . . .

Ondo da rememoroj fluis en ŝian menson, venigante al ŝi bildojn de la feliĉa pasinteco.

Ŝajnis al ŝi kvazaŭ ŝi nur komencis vivi, kiam ŝi la unuan fojon eksciis pri sia amo al la edzo, kiu en tiu tempo ankoraŭ ne estis ŝia edzo.

Estis granda, sekreta ĝojo ami lin, sed kiam ŝi eksciis, ke ankaŭ li amas ŝin, ŝia vivo kvazaŭ ekfloris.

Ŝi rememoris pri la tago, en kiu ŝi kaj la edzo eniris sian domon la unuan fojon, kiel geedzoj. Kiel ame li metis sian brakon ĉirkaŭ ŝian talion, dirante al ŝi per voĉo mallaŭta pro emocio :

— Bonvenu, Lilio mia edzino ; kun neesprimebla ĝojo mi akceptas vin en mian domon. De nun ĝi jam ne estas *mia domo*, ĉar ĉe via alveno ĝi fariĝis nia hejmo . . .

Ankoraŭ alia memoro fluis mense antaŭ ŝi. La malgranda Florenco ĵus naskiĝis, kaj ŝia alta, granda edzo eniris piedfingre, duontime en la ĉambron. Lilio ankaŭ sentis sin iomete timanta, kvankam forte feliĉa, ĉar tiu ĉi estis la plej mirinda kaj stranga spertaĵo, kiun ŝi ĝis nun travivis.

Kuŝante tie, ŝi demandis al si :—Kia estos la opinio de mia edzo pri la infaneto, kiu kuŝas sur mia brako ? Ĉu ĝi plaĉos al li ? Ĉu liaj esperoj pri ĝi realiĝos ? Ĉu li volos teni ĝin sur siaj brakoj ? Kaj se jes, ĉu tio naskos en li pensojn tiel dolĉajn, sanktajn, dankajn, kiel ĝi jam naskis en mi ?

La edzo alvenis la litflankon, rigardis ame, demande en ŝiajn okulojn dum momento, poste kisis ŝin kaj nur poste fiksis sian atenton sur la volvaĵon, kuŝantan sur ŝia brako.

Ankoraŭ unu momento pasis, tiam Lilio tute kontentiĝis, ĉar, rigardante en la okulojn de la amata edzo, ŝi trovis ĉion, pri kio ŝi deziris . . .

Ŝi rememoris pri nokto plena de maltrankvilo tial, ke la krupo atakis Florencon, kiu, sufokiĝante, devis batali por la vivo . . . Kiel iliaj animoj proksimiĝis tiam, maltrankviliĝante, prizorgante kaj preĝante pri la malsana infano . . .

. . . .

Tiel ŝi meditis pri pasintaĵoj, duondolore sed

tute ame. Kiamaniere ŝi nutros, vestos, instruigos la infanojn, ŝi ankoraŭ ne demandis al si, sed longe forgesi pri tio estis neeble.

Ŝi diris al si :—Baldaŭ mi pripensos tion, kaj ankaŭ mi informos la patrinon kaj ceterajn parencojn pri mia perdo, sed hodiaŭ mi nepre devas resti sola, devas kiom eble kredigi al mi mian grandan perdon, devas permesi, ke mi ploru, malĝoje pripensu, revoku la estintecon ĝis sato ; jam morgaŭ mi estos kuraĝa.

ĈAPITRO IV

La servistino prizorgis la du infanojn ĝis malfrue en la posttagmezo de tiu tago; tiam Lilio eliris el sia dormoĉambro, kun pala, rigida vizaĝo, plena de sufersignoj. Alvokinte al si la malgrandan Florencon, ŝi penis klarigi al ŝi pri la morto de la patro dirante, ke la bona Dio, kiu neniam povas erari, vokis la patron, kiu nun loĝas en la plej bona loko imagebla, nomata la ĉielo; ke li ne povas veni malsupren por viziti ilin, sed iam ili—la patrino, Florenco, kaj la infaneto Filipo—iros al li, se ili estados bonaj.

Florenco tre interesiĝis, neniel malĝojis, ne povis kompreni, kial la patrino ne aspektas pli gaje, rakontante pri tiaj belaĵoj! Ŝi demandis:
—Kial ĉiuj ni ne povas iri en la ĉielon jam hodiaŭ?

Peni klarigi al Florenco, respondi al ŝiaj demandoj, iom distris la pensojn de Lilio kaj faciligis al ŝi la doloron.

Ŝi skribis du leterojn, por informi la patrinon kaj onklinon Anna pri la aflikto ŝin trafinta, sed ne enpoŝtigis ilin ĝis malfrue tiun vesperon.

La sekvintan matenon la parencinoj alvenis. Poste okazis interkonsiliĝo. Decidiĝis, ke Alico, unu el la fratinoj de Lilio, tuj venu loĝi kun ŝi; ke Lilio turnu sin al la asekura kompanio, ĉe kiu ŝia edzo asekuriĝis.

Demandinte ĉe la asekurejo ŝi trovis, ke ŝi neniom ricevos de tie. Oni klarigis, ke, se homo foriras el la lando, kie li asekuriĝis, ne informinte la asekuranton, tiam en la okazo de lia morto tio senrajtigas lian heredonton pri la asekurita monpago.

El Usono Lilio nur ricevis la biblion kaj poŝhorloĝon de la edzo!

Sed tio ne estis la fino de la tiamaj afliktoj. Apenaŭ pasis tri tagoj post la ricevo de la sciigoj pri la morto de la edzo, Lilio ricevis leteron adresitan al sinjoro Ĉester. Tre ĉagrena por ŝi estis tiu letero; ĉar ĝi anoncis, ke, por servi amikon, ŝia edzo subskribis sian nomon sur dua dokumento kelke da semajnoj antaŭ sia foriro el Anglujo. La "amiko" ne pagis la ŝuldon, kaj la kreditoroj postulis, ke sinjoro Ĉester pagu la sumon en dato difinita.

Lilio ne povis ne demandi sin, ĉu la edzo foriris el Britujo pro tio, ke li deziris eviti la eblan devon plenumi tiun promeson pagi.

Tamen bedaŭroj tute ne povis helpi; la sola, pripensinda afero estis, kion fari?

Kion fari? Simpla estis la demando, sed ne simpla la solvo.

Ne havante la monrimedojn pagi la ŝuldon, ŝi devis lasi, ke la kreditoroj forprenu la meblojn. Kion poste? Ŝi ne povis sin turni al la riĉaj parencoj por peti ilian helpon, ĉar ne ili faris la ŝuldon. Tamen ŝi devis priparoli la aferon kun du-tri el ili. Onklino Anna kun sia edzo bone konsilis ŝin. Ambaŭ ili kunsentis kun Lilio,

tamen ili ne volis pagi la ŝuldon kaj ne povis konvinki la kreditorojn pri la morto de sinjoro Cester.—Eble li mortis, sed kredeble li nur kaŝas sin! Oni trompis nin antaŭe per tia historio!—ili diris.

Onklino Anna invitis Lilion kaj la du infanojn gasti ĉe ŝi, ĝis ili povos kune, konsiliĝinte, decidiĝi pri la estonteco.

Intertempe Lilio mem elpensis planon. Ŝi mem ŝuldis kelkajn malgrandajn sumojn al la komercistoj.

Ŝi do iris al ĉiu alŝuldato aparte, priparolis mallonge la aferon, demandis, ĉu tiu aŭ alia havas junajn infanojn, kaj, ricevinte jesan respondon, petis, ke la gepatroj sendu ilin al ŝi, por ke ŝi instruu ilin. Tiamaniere ŝi povos ĉiom pagi, kaj kredeble gajni enspezon.

Unuavide ĉiu konstatis, ke Lilio estas bone edukita sinjorino, apartenanta al la supera klaso, kaj ke ŝi estas tute respektinda.

La komercistoj tiom kortuŝiĝis de la evidentaj malĝojo kaj honesteco de Lilio, ke ili ne nur sendis siajn proprajn infanojn al ŝi por instruado, sed ankaŭ konsilis al aliaj, ke tiuj ĉi sendu al ŝi siajn.

Tiel, pli facile ol ŝi imagis al si, Lilio povis starigi lernejon por junaj infanoj.

Ŝiaj parencoj loĝigis ŝin en oportuna domo, kies luon ili pagis dum ses monatoj. Du el ili ankaŭ sendis mondonacojn po kvindek spesmiloj, aliaj aĉetis kaj redonis al ŝi la pliparton el ŝiaj propraj mebloj.

Alico iris kunloĝi kun Lilio, por partopreni ne

nur en la laboro, sed ankaŭ en la profitoj akirotaj.

En la daŭro de dek ses monatoj ĉio sufiĉe bone prosperis al ili, sed ĉirkaŭ la fino de tiu tempo, epidemio de skarlatino ekokazis en la regiono.

La malgranda Florenco la unua infektiĝis, poste Filipo, krom multaj el la lernantoj.

Lilio devis fermi la lernejon. Pro timo al infekto, la fratino forlasis ŝin, kaj poste, kiam la infanoj resaniĝis, ne estis facile remalfermi la lernejon.

Lilio kaj la du infanoj bezonis ŝanĝon de la ĉirkaŭaĵoj, for de la urbego, kaj tiu bezono pensigis Lilion pri nova metodo enspezi.

Ĉe la enmariĝo de la rivero Mersey staris vilaĝo, kiun ni nomos Riverton. Tie, malproksime de la rivero je nur triminuta piedirado, Lilio trovis taŭgan domon, kaj tien, seninfektiginte la meblojn, ŝi iris por loĝi.

Sur du frontajn fenestrojn ŝi metis afiŝetojn kun la anonco :

CAMBROJ LUEBLAJ.

Ŝi ankaŭ presigis anoncon en ĉiumatena gazeto *Mercury*, kaj baldaŭ havigis al si kelkajn pensiulojn.

Longajn horojn ŝi devis labori en la domo ĉiutage. Alte pagi servistinon ŝi ne povis, tial ŝi devis dungi nur junan nespertan knabinon, kiu venadis ĉiumatene por fari kelkhoran laboron.

Tamen Lilio devis kuiri kaj plenumi la nekalkuleblajn devojn de domo, konatajn nur de la virinoj ;

efektive konatajn nur de tiuj virinoj, kiuj iam kutimis aŭ plenumi ilin mem aŭ senpere kontroli ilian plenumadon.

Ĉiutage de mateno ĝis malfrua horo nokte Lilio laboradis, jen pri la mastrumado de la domo, jen pri la kudrado, jen rebonigante aŭ farante vestetojn por la infanoj, jen farante belajn, delikatajn puntojn, pri kiuj ŝi esperis, ke ŝi povos ilin vendi.

Ĉio ĉi efikis malutile sur la sanon de Lilio, kiu neniam estis fortika kaj estis delikate, ŝirme edukita; sed kun escepto de tio, ĉio iris bone kun ŝi dum la someraj monatoj. Kiam la vintro venis, ne estis tiel facile akiri loĝantojn; tamen post kelke da semajnoj, en kiuj neniu sin prezentis por peti loĝadon, fine aristokrate aspektanta sinjoro kun longa barbo alvenis por trarigardi la lueblajn ĉambrojn.

Li diris, ke li bezonas privatan saloneton kun dormoĉambro, kaj konsentinte pri la lupago postulata de Lilio, sciigis, ke li venos post du tagoj por loĝi ĉe ŝi.

Lilio forte ĝojis. Antaŭ kelke da semajnoj ŝi devis foreksigi la junan helpistinon, sed se ŝi povus akiri ankoraŭ unu loĝanton, ŝi povus ree dungi helpon.

Akurate en la difinita tago la sinjoro (nomata Ston) eklogis ĉe Lilio.

ĈAPITRO V

Lilio ne havis amikinon en Riverton, kaj foje, kuŝiginte la infanojn kaj sidante super kudraĵo, ŝi sentis preman solecon.

Pasis kelke da monatoj de la tago, en kiu sinjoro Ŝton enloĝiĝis ĉe ŝi. Li pagis bone kaj regule, ĉiam montrante sin ĝentila al ŝi kaj bonkora al la infanoj.

Sed neniu alia pensiulo venis al Lilio, kaj la batalado por la ekzistado estis malfacila afero ĉe ŝi, kiu deziris bone eduki kaj instruigi la infanojn. Celante tion, ŝi devis esti tre ŝparema.

La riĉaj parencoj ne vizitis ŝin krom la onklino Anna, kiu venis du fojojn. Granda distanco apartigis ilian mondon de amuziĝado kaj ŝian mondon de devo kaj laborado.

Iun vesperon, sentante ian maltrankvilecon pri monrimedoj, sed dirante al si, ke post ne longe la varma vetero venigos al ŝi pluajn loĝantojn, Lilio firme penis forpuŝi de si la timojn kaj dubojn pri la proksima estonteco, kiuj insiste svarmis en ŝia kapo. Subite la sonorilo de sinjoro Ĉester sonis.

Tuj Lilio metis flanken la kudraĵon, super kiu ŝi sin klinis, kaj leviĝinte el la seĝo iris supren al la saloneto okupata de sinjoro Ŝton.

Ŝi estis tuj frapetonta la pordon ne tute fermitan, kiam ĝi plenlarĝe malfermiĝis, montrante sinjoron Ŝton starantan ĉe ĝi kaj ĝentile petantan, ke ŝi eniru.

— Per kio mi povas vin servi, sinjoro?—diris Lilio.

— Per tio, ke vi eniru kaj sidiĝu sur ĉi tiu brakseĝo, sinjorino Ĉester—li respondis, ridetante afable.—Mi deziras iom priparoli kun vi, se vi povas permesi al mi kelke da minutoj.

Lilio sidiĝis, malgaje pensante: eble li volas foriri, kaj tiuokaze, kion fari?

La sekvantaj vortoj de sinjoro Ŝton konfirmis la penson de Lilio.

— Sinjorino Ĉester—li diris—morgaŭ matene mi devas foriri al Londono; tamen mi deziras teni la ĉambrojn ĉi tie, ĉar se prosperos al mi en mia afero, mi revenos post du aŭ pli da semajnoj. . . . Nu . . . mi neniam antaŭe ĝenis vin per personaj demandoj, tial . . . eble . . . vi ne opinios min malĝentila, se mi demandas:—ĉu mi ĝuste divenas, supozante, ke vi estas vidvino?

— Vi prave divenas—iom mirigite respondis Lilio.

— Ĉu vi trovas malfacilon gajni vivrimedojn por vi kaj la infanoj?

— Vi diris la veron—respondis Lilio per digna maniero—tamen pardonu min, sinjoro, ke mi demandas, kiel tio povas rilati al vi? Mi ne kutimas priparoli miajn privatajn aferojn kun kiu ajn, precipe kun miaj klientoj; kaj vi ankoraŭ ne donis al mi motivon rompi la regulon!

— Mi ne volis esti neĝentila, nek volis vin ĝeni . . . sed ideo venis en mian kapon antaŭ kelke da semajnoj kaj mi ne povas . . . ne volas ĝin forigi. Mi volas diri, sinjorino, ke mi admiras vin . . . ke mi estas sola . . . ankaŭ vi estas

sola . . . Ne, sinjorino, ne leviĝu, mi ne detenos vin longe! . . . nu, mi ripetas, mi estas sola kaj tre soleca, mi vin alte respektas, vi faris min feliĉa dum mia kelkmonata restado ĉe vi, fakte . . . mi dezirus, ke vi edziniĝu kun mi.

— Mia respondo estas, sinjoro, ke mi vin dankas pro la honoro, kiun vi faris al mi, petante mian manon, sed mi ne povas akcepti la proponon . . . mi ankoraŭ amas mian formortintan edzon kaj respektas lian memoron tro forte, por ke mi denove akceptu edzon. Plue, mi tre bedaŭras, ke vi faris tian proponon, ĉar, kiel vi mem komprenos, vi ne plu povos loĝadi ĉe mi. Tio estus egale embarasa kiel por vi, tiel ankaŭ por mi.

— Mi bedaŭras tion, mi forte bedaŭras, sinjorino, tamen mi petas, ke vi rekonsideru la aferon. Mi esperas, ke almenaŭ vi permesos, ke mi lasu ĉe vi la plimulton el miaj propraĵoj kaj tenu la ĉambrojn dum du-tri semajnoj, ĝis mi povos fari miajn aferojn en Londono.

Ĉiaokaze mi poste foriros. Se vi rifuzos fariĝi mia edzino, mi neniam denove ĝenos vin, sed se post konsiderado vi konsentos feliĉigi min, mi foriros nur provizore, ĝis la feliĉa tago, kiam mi fariĝos via fiera edzo. Permesu, ke mi plu diru, ke pri la financa vidpunkto vi povas neniel timi, ĉar mi estas bonhava kaj povos provizi vin kaj la karajn infanojn per ĉiuj necesaĵoj kaj komfortaĵoj. Cetere mi scias, ke vi estas vidvino, mi ne povas esperi, ke vi amos min tiom, kiom mi amas vin! Sed eble mi ne estas por vi tre malagrabla homo, kaj vi permesos al mi peni karigi

min al vi. Mi estas pli soleca, ol vi povas kompreni. Mi bezonas kamaradinon. Nu, do, ĉu mi atendu vian pripensitan respondon post tri semajnoj?

— Mi povas nenion al vi promesi, sinjoro, tamen mi konsideros la aferon—diris Lilio. Klininte la kapon, ŝi retiris sin.

. . . .

La tri semajnoj forpasis post multa pripensado flanke de Lilio.

Ŝi ne amis sinjoron Ŝton, sed ŝi sentis sin eĉ pli soleca dum lia forestado, ol iam antaŭe. La anonco en la ĉiutaga ĵurnalo venigis neniun novan loĝanton, kaj, krom tio, la infanoj sentis la foreston de la sinjoro, kiu donadis al ili sukeraĵojn kaj ludilojn, kaj ofte interparolis kun ili, kiam li renkontiĝis kun ili sur la sablaĵo.

Iom post iom la decido formiĝis en ŝi, akcepti la edziĝproponon de sinjoro Ŝton—pro la infanoj,—ŝi diris al si—Li scias, ke mi ne povas ami lin tiel, kiel mi amis . . . ne . . . amas . . . mian karan edzon! tamen li ja estas soleca kaj mi povus fari, ke estu feliĉe kaj komforte al li, samtempe ĉesigante al mi la teruran bataladon por la ekzistado.

La tento estis forta.

. . . .

Lilio miris pri sia kontento vidi la revenon de sinjoro Ŝton, kiu denove faris la edziĝproponon al ŝi.

— Ĉu vi faras la proponon el kompato aŭ el amo al mi?

— El amo, el amo—li varmege respondis—ĉu vi ne povas kompreni mian solulecon? Kiom multe mi gajnus per via edziniĝo kun mi!

— Mi estas necerta pri tio. Mi ja scias, ke mi povus bone prizorgi vin kaj mastrumadi vian domon, sed . . . sed . . . mi tute ne povas promesi vin ami tiel, kiel mi amis mian amatan edzon.

— Mi bone komprenas tion, sed, sinjorino Ĉester, ĉu vi pensas, ke vi sentus vin malfeliĉa ĉe mi? En tiu okazo mi foriros de vi sen plua vorto.

— Mi ne povas tion diri, ĉar vi ĉiam estas por mi bona, kaj la infanoj amas vin . . . Se vi povas kontentiĝi kun la malmulto, kiun mi povas promesi: fideleco, komunigo de viaj interesoj kun miaj, mi ne rifuzos vian peton. Tamen sciu, ke mi konsentas precipe pro la bono de la infanoj.

— Vi faris min feliĉulo! mi estas kontenta pri tio, kion vi promesis; ĉar mi ne ĉesos penadi pri via feliĉo, kaj mi estas certa, ke mi povos karigi min al vi per la du amindaj infanoj. Oni diris, ke "la vojo al la koro de patrino estas per la infanoj." El tio mi elĉerpos esperon.

. . . .

Post unu semajno ili geedziĝis.

. . . . . .

ĈAPITRO VI

Sinjoro Ŝton sendube klopodis sin fari agrabla al Lilio; efektive ŝi ne antaŭe pensis, ke tiom da feliĉo ankoraŭ restas por ŝi.

Anstataŭ sidi ĉiuvespere super kudrado, malgaja meditado kaj kalkulado pri monrimedoj, ŝi jam havis interesplenan edzon, kies sola celo verŝajne estis, plaĉi al ŝi.

Li plezure rigardis en ŝiajn mildajn, blugrizajn okulojn, kies esprimo ŝanĝiĝadis ĉe ĉiu nova penso. Plaĉis al li vidi, ke ĉiutage ili montras pli da konfido al li.

Li amegis la muzikon kaj kantis iom tre bone. De kiam Lilio fariĝis lia edzino, li trovis, ke lia plezuro pri la muziko duobliĝis, ĉar ŝi povis lin akompani per la piano kaj ŝi esprimis ŝaton pri lia talento.

Iafoje li venigis ŝin al teatraĵo, koncerto aŭ prelego, ĉiufoje vidante kun plezuro ŝian intereson pri la distraĵo.

Lilio petis, ke ili ne foriru de la hejmo, por pasigi la mielan monaton, kaj, iom komprenante ŝian senton pri la afero, li ne insistis pri tio. Li kontentigis sin, pripensante pri la bela libertempo, kiun li faros al ŝi poste, kiam ili estos kutimiĝintaj al la nova rilato inter si.

Jam forpasis ĉirkaŭ dek semajnoj de la edziĝo. La kvara horo ĵus batis, kaj Lilio leviĝis el kom-

forta brakseĝo, kie ŝi sidis legante; transirinte ĝis la malfermita fenestro ŝi elrigardis.

Ŝi aspektis bele kaj feliĉe, starante tie, vestita per pale griza vesto el delikata kaŝmira drapo garnita per belaj Irlandaj puntoj, kun unu banto el rozkolora rubando ĉe la kolo.

La edzo trovis plezuron donaci al ŝi belaĵojn, kaj la Irlandaj puntoj estis la lasta donaco, kiun ŝi ricevis de li.

Havante du bonajn servantinojn, Lilio jam ne devis ellacigi sin per forta, konstanta laboro. El la du servantinoj, unu estis sur la sablaĵo kune kun la infanoj, la alia ankaŭ estis for de la domo, ĝuante libertempon.

Rigardante el la fenestro sur la sablaĵo, kie sin trovis multe da homoj, lacigitaj de la fumoplena aero, senĉesa bruado kaj moviĝado de la urbego, serĉantaj sanon, ripozon aŭ amuziĝon, Lilio sentis sin feliĉa, ke ŝia trankvileco kaj la estonteco de la infanoj ne plu dependas de la plenigo de ŝia domo per tiaj homoj kun iliaj diversaj postuloj kaj kapricoj.

Rigardante sur la ĉiam pli-malpli moviĝeman akvon de la rivero, kun ĝia ŝarĝo de ĉiuspecaj ŝipoj kaj ŝipetoj naĝantaj sur la nun trankvila supraĵo, kaj la multego da kaŝitaj nekonotaĵoj kaj subigitaĵoj en ĝia profundo, kaj precipe kun ĝia ŝanĝiĝemo pro eksteraj fortoj, Lilio ne povis ne kompari ĝin kun la vivo, precipe kun sia propra vivo jam tiel trankvila, kaj kun la hela perspektivo antaŭ ĝi, post la ventegoj kaj nuboj de la pasintaj kelkaj jaroj.

Tiel revante, ŝi apenaŭ rimarkis, ke sur la ĉielo

kelke da nubetoj kolektiĝas, kaj, kuniĝante, iom malheliĝas. Sed venteto subite ekblovis, portante iom da malvarmeco en la ĝis tiam pro la sunbrilo sufiĉe varman ĉambron, tremetigante Lilion, dum ĝi brue fermis la pordon de la saloneto, en kiu ŝi staris.

Rekonsciiĝinte, ŝi ĵetis rapidan ĉirkaŭrigardon, unue en la saloneton, poste laŭlonge de la strato, esperante, ke ŝi vidos la infanojn reveni, aŭ eble la edzon, kiu iris promeni.

Ŝi tamen vidis neniun krom virino, vestita per blua, lana drapo. Sur la manikoj montriĝis la ruĝaj strioj de oficirino de la "Sava Armeo," fondita de "generalo" Booth.

Ĉi tiu virino rigardis la ĉefpordon de la domo de gesinjoroj Ŝton kun multe da intereso miksita je hezito, kvazaŭ ŝi deziras supreniri la ŝtuparon, kondukantan al la pordo, sed ne povas decidiĝi pri la afero.

—Ne, mia sinjorino—Lilio diris al si pense —se vi esperas enloĝiĝi ĉi tie, vi vane esperas. Mi jam ne bezonas preni loĝantojn, dank' al Dio.

Ĝuste tiam la pordo de la saloneto malfermiĝis, kaj agrabla voĉo salutis ŝin per la vortoj:—Jen vi!—Turninte sin, ŝi vidis la edzon, kiu eniris la domon antaŭ minuto, kiam la malvarmo de la venteto tremetigis ŝin, kaj la pordo, brue fermiĝante, rekonsciigis ŝin el ŝia revado.

—Mi ĝojas, ke vi revenis; ŝajnas kvazaŭ ia ventego leviĝas; rigardu la rapide nigriĝantajn nubojn! Mi ja esperas, ke Maria venigos returne la infanojn ĝustatempe.

— Ĉio estos en ordo, mia kara, la infanoj revenos post nelonge; mi pensas, ke mi jam vidas Florencon, kiu antaŭiras Marian kun Filipo per kelke da paŝoj.

— Vi estas prava, jen ili estas—diris Lilio kun faciliĝo de la koro, turninte sin denove al la fenestro kune kun la edzo, kiu serĉis per rigardo la straton en la direkto al la sablaĵo.

— Nu, mia kara—diris la edzo—promenante, mi vidis la ĝustan domon por ni! Vi devas min akompani morgaŭ, por ke ni kune esploru ĝin. Eble ni povos transloĝiĝi en ĝin antaŭ la fino de la nuna monato, se tio estas aranĝebla.

— Kie ĝi estas?—demandis Lilio.

— Sur "La Altaĵo." Ĝi havas belan ĝardenon kun herbejo, legomejo, kaj sufiĉe granda oranĝerio.

— Vi do intencas loĝigi nin inter la aristokratoj! Kia agrabla ŝanĝo tio estos, loĝi for de la homamasoj, kiuj plenigadas ĉi tiun lokon, precipe en festotagoj!

— Vi jam apartenas tie, kara, mi ankaŭ. Nur akcidento de la sorto sendis nin ĉi tien! Tamen mi ne volas plendi pri la sorto, kiu almenaŭ gvidis min al vi . . . Sed, ankoraŭ pri la domo! Plaĉos al vi scii, ke ĝi staras malproksime de la sablaĵo ne pli ol kvaronon de mejlo. Cetere la sablaĵo tie neniam estas tiel homoplena, kiel ĝi ofte estas ĉi tie.

— Nu, bone, mi supozas, ke vi ne scias, ĉu ekzistas tie ia bona lernejo!

— Jes, mi rimarkis tian ne tre malproksime de la domo. Vi, do, vidas, ke mi ne forgesis la interesojn de la karaj infanoj! Mi ne kuraĝus

tion fari, ĉar mi sentas, ke ili ankoraŭ estas la plej forta ligilo, kiu unuigas vin kun mi.

— Vi ĉiam estadas bona por ili kaj por mi— respondis Lilio, kortuŝite—ambaŭ infanoj efektive amas vin. Florenco diris al mi ankoraŭ hodiaŭ : " estas multe pli agrable ĉe ni, de kiam ni havas patron."

— La kara infano!—diris sinjoro Ŝton—mi ĝojas aŭdi tion. Sed Lilio, vi ne povas imagi la tre grandan ŝanĝon, kiun vi faris en mia vivo . . . vi kaj la infanoj . . . iun tagon mi sciigos vin pri tio . . . se tio estos ebla! . . . sed ni reiru al la temo de nia nova domo. Se ĝi kaj la ĉirkaŭaĵoj plaĉos al vi, kiel mi esperas, mi aĉetos ĝin por vi.

— Mi ne sciis, ke vi estas sufiĉe riĉa por fari tion! Se ĝi havas sufiĉe da ŝrankoj, ĝi certe plaĉos al mi!

— Mi ne ankoraŭ multe parolis al vi pri miaj monrimedoj; nek pri mia parencaro, kaj vi, Lilio, certe estas mirinda virino, ĉar vi ne vidigis ian scivolemon pri miaj aferoj!

— Tio ne estis necesa, Lesli : vi ĉiam akurate pagis min dum la tempo, kiam vi estis mia pensiulo, kaj kiom mi sciis, vi ne ŝuldis monon al kiu ajn. Krom tio vi regalis neniun dum via restado ĉe mi, ĉiam kondutis afable kaj ĝentile al la infanoj kaj mi. Mi pensas, ke per tiaj bagateloj virino juĝadas pri la homoj.

— Iuj virinoj, sed ne ĉiuj, Linjo . . . kelkaj eĉ povus suspekti min ĝuste pro tio, ke ŝajne mi havas neniujn amikojn! Sed, flanka afero, eble mi altiĝus en via estimo, se vi scius, ke

povas esti, ke iam mi fariĝos baroneto! Tio estas fakto, mia kara, ne aspektu tiel nekredanta! "Ĝi ne estas mia kulpo," kiel Florenco diradas! En la hodiaŭa ĵurnalo mi legis pri la morto de la antaŭa baroneto, mia estinta onklo, kiu postlasis nur unu malfortikan filon needziĝintan. Post li mi estas la heredonto de la titolo kaj bienoj! Tamen "li vivu eterne," mi povas esti tute feliĉa sen liaj posedoj. Se mi iam dezirus ilin, tio estus por altigi vin, mia . . .

— Atendu momenton, Lesli, mi ĵus aŭdis sonoron, kaj mi devas iri responde, ĉar Maria sendube okupas sin per la infanoj, se ŝi jam alvenis hejmon. Mi tuj revenos! Kredeble la hezitanta oficirino de la Sava Armeo decidiĝis ataki nian privatecon!

— Kion nome vi volas diri, mia kara!—ridete diris sinjoro Ŝton.

— Mi nur ŝerce aludis pri virino, kiun mi ĵus rimarkis, antaŭ ol vi kunestiĝis kun mi. Ŝi aspektas, kvazaŭ ŝi celas peti ĉambrojn ĉe ni! Mi bone rekonas la specon! Kredeble ŝi jam promenis du-tri fojojn preter ĉiujn domojn sur la strato kaj fine decidis, ke nia estas la plej *pura* kaj alloga! mi tuj revenos!

— Estas jam sufiĉe—diris al si sinjoro Ŝton— ni devas foriri de ĉi tiu parto de la urbeto kiel eble plej baldaŭ.

CAPITRO VII

Malferminte la ĉefpordon, Lilio trovis, ke ŝi ĝuste divenis, ĉar tie staris tiu sama virino, kiun ŝi rimarkis antaŭ kelke da minutoj.

Si estis mezaĝa, blonda kaj nerve aspektanta virino el klaso pli alta ol tiu, kiun oni kutime vidas vestita per la uniformo de la Sava Armeo. Ŝia elparolado estis tiu de kulturita virino, kiam ŝi demandis:

— Ĉu sinjoro Ŝton loĝas ĉi tie?

— Jes, sinjorino—respondis Lilio, iom mirigite.

—Ĉu vi deziras lin vidi? Eniru, mi petas. Kio estas via nomo?

La sinjorino eniris, nedirante sian nomon.

Lilio denove petis ĝin.

— Mi preferus ne doni mian nomon! Mi estas ia . . . malnova . . . amikino de li, kiun mi ne vidis dum kelke da jaroj. Mi pasigas mallongan libertempon en ĉi tiu urbeto, kaj antaŭ kelke da minutoj mi sentis, ke mi ne eraras pensante, ke mi vidis . . . sinjoron Ŝton . . . eniri! Cetere . . . eble . . . li ne dezirus min revidi.

— Ho, ne pensu tion, sinjorino, mi vokos lin al vi, se vi ne deziras sciigi al mi vian nomon.

— Mian nomon! ne, mi dezirus, ke oni ne sciigu lin pri tio, antaŭ ol mi mem vidos lin! Tamen . . . vi aspektas bonkore . . . mi ja sciigos vin, kaj tiam vi komprenos, ke mi devas vidi lin private. Mi estas . . . lia edzino.

. . . Lia edzino! . . . Tio ne povas esti!—komencis Lilio, sed ŝi ŝanĝis sian intencon—Mi volus diri, ke mi antaŭe ne sciis, ke li estas edziĝinta! Eble vi eraris, pensante, ke vi lin konas. Kio estas lia tuta nomo?

— Sinjoro Lesli Granton Ŝton! sed mi ne eraris, sinjorino!

— Tio ja estas lia nomo!—diris Lilio post kelka momento. Ŝia koro batis konvulsie, kaj la vangoj alterne paliĝis kaj ruĝiĝis de timo kaj humiligo. Hezitinte nur unu momenton, dirante al si mem: kion fari? ŝi ĝentile diris voĉe:

— Volu sekvi min, sinjorino—kaj ŝi tuj kondukis la vizitantinon al la saloneto, anoncante seke kaj pli trankvile, ol ŝi pensis, ke ŝi povos.

— Lesli, jen estas sinjorino, kiu diras, ke ŝi estas via edzino! Ĉu ŝi parolis la veron?

En la unua momento sinjoro Ŝton ne rekonis la sinjorinon; poste paliĝinte, li ekkriis:

— Mia Dio! ĉu efektive tio estas vi, Rozalio? Mia Dio!—kaj li retiriĝis kelke da paŝoj.

— Jes, Lesli, ĝi estas mi—respondis la virino kun jam tre pala, timoplena esprimo sur la vizaĝo—kaj laŭŝajne vi tute ne ĝojas vidi min denove!

— Ĝojas!—ripetis sinjoro Ŝton—ne, mi ne povas ĝuste diri, ke mi ĝojas vidi vin denove. Ni ne estis tiel feliĉaj, kiam ni kunvivadis, ke mi ĝojas vidi vin denove, kaj krom tio, vi . . . vi . . . kredigis min, ke vi mortis . . . ke vi . . . senvivigis vin! Kiel klarigi tion, virino?

— Mia intenco estis memmortigo, sed Dio malhelpis min fari tiun pekon . . . mi . . .

— Ho! estus bone, se nur Dio estus pensinta pri mi ankaŭ kaj estus deviginta vin sciigi al mi pri via ŝanĝo de intenco.

— Lesli!—diris la sinjorino, kiun li nomis Rozalio—vi . . . vi blasfemas . . . kaj krom tio . . . ĉu . . . ĉu . . . vi volus diri, . . . ke vi . . . bedaŭras, ke mi ne mortigis min! Vi devus honti!

— Mi ne scias, kion mi volas diri, sed per via ŝajnigo al mi pri via morto, vi en la unua tempo kaŭzis al mi neutilan suferon kaj honton, kaj nun . . . vi kaŭzis ne nur al mi sed ankaŭ al ĉi tiu senkulpa virino, kiu staras tie kvazaŭ ŝton-iĝinta, nenuligeblajn suferon kaj honton . . . Mi . . . ŝi . . . fariĝis mia edzino!

— Lesli!—respondis Rozalio per tima, tremanta voĉo—mi ne sciis pri tio! kredu, ke mi tute ne sciis tion . . . alie . . . mi ne estus rekoniginta min al vi!

— Nu, vi ja konigis vin, kaj ni ne povas malfari tion! Vi neniel rajtis trompi min per via silento, kiu egalis abomenan mensogon.

— Lesli, kredu al mi, kiam mi diras, ke mi neniam pensis, ke eble vi deziros denove edziĝi.

— Nu, nu, ĉar ni ne povas fari kvazaŭ mia nova edziĝo ne okazis, ni devas kune, . . . triope, decidiĝi pri la estonta agado. Lilio, mia kara, ĉu vi ne volas veni kaj sidiĝi en ĉi tiu brakseĝo? Mi forte, forte bedaŭras la maljustaĵon, kiun mi tute nescie faris al vi. Mi vizitos mian leĝiston morgaŭ, por sciiĝi, ĉu ne estas eble, ke mi eksedz . . .

— Ne parolu al mi ankoraŭ, mi petas . . . mi

ne povas elporti ĝin! Iru foresendi Marian kune kun la infanoj: mi aŭdas ilin alproksimiĝi. Estas tre dolore al mi . . . resti dum ĉi tiu interparolo . . . sed me devas iel kompreni la aferon . . . mi dezirus . . . ke vi, sinjorino, klarigu la aferon de la komenco.

Naŭza sento ekkaptis Lilion kaj ŝi devis sidiĝi, samtempe petante al Rozalio, ke ŝi ankaŭ tion faru. Ŝi ne povis ne senti, ke sinjoro Ŝton agis nesincere kun ŝi, kaŝinte antaŭ ŝi, ke li estas—aŭ pli ĝuste diri—kredas, ke li estas vidvo.

Kredeble ŝi ne estus rifuzinta edziniĝi kun li, se ŝi supozus lin vidvo, sed ŝi povus senti en la nuna momento pli da estimo kaj kunsento, se li ne estus trompinta ŝin per silento.

Farinte la komision pri la infanoj, sinjoro Ŝton revenis kaj plue diris, ĉi tiun fojon al Rozalio:

— Mi ne kunvivos kun vi denove. Vi jam ne estas mia edzino! Estus por mi bone, se mi neniam antaŭe estus vidinta vin! Mi provos ricevi eksedziĝan juĝon;—poste, turninte sin al Lilio, li aldonis per kortuŝa voco,—Lilio, ni loĝas en lando ĉie famekonata pri ĝia justeco. Ni vidu, ĉu la leĝo ne sankcios nian edzecon! . . .

Ĉe tio la timemo kaj nervemeco forlasis Rozalion, kiu rektigis la talion kaj, jam akceptinte dignan mienon, fiere diris:

— Ne estos necese apelacii al la leĝo, kiu cetere ne farus laŭ via peto! Mi ankoraŭ estas via fidela edzino. Vi mem foririgis min. Cetere estas *mi*, ne vi, kiu devus paroli pri ekzedziĝo, sed mia memrespekto ne permesus tion! Nek, ke mi petu vin repreni min, kiel vian edzinon . . .

kvankam en la vido de Dio kaj la leĝo mi ja estas tio! Tamen, mi tuj foriros kaj lasos vin libera, por ke vi restu kun la sinjorino, kiu laŭ ŝia diro havas infanojn . . . Mi ne deziras suferigi ilin pro via malmolkoreco . . . Adiaŭ . . . mi jam neniam plu maltrankviligos vin per vido de mi! de mi!—kaj ŝi efektive sin turnis al la pordo.

Sed ĉe tio, la naŭza sento kaj rigideco forlasis Lilion, kiu rapide iris antaŭen, kaj, starante kun la dorso apogita al la pordo, diris :

— Ne faru tion, mi petas. Almenaŭ ne foriru, antaŭ ol ni ĉiuj komprenos la malgajan cirkonstancaron, kiu kunvenigis kaj kunsuferigas nin hodiaŭ. Eble konsentu rakonti al mi iom pri via vivhistorio, de kiam vi . . . vi . . . ne loĝis kun via edzo? Miaflanke mi povas diri, ke mi estis vidvino kun du infanoj ĝis antaŭ kelke da semajnoj. Lesli . . . sinjoro Ŝton estis pensiulo ĉe mi dum kelke da monatoj . . . poste, estante soleca . . . li petis min edziniĝi kun li . . . sciante, ke mi ankaŭ estas soleca . . . kaj malriĉa . . . mi konsentis, precipe pro la infanoj. Mi . . . ne . . . ne devus fari tion . . . ĉar . . . mi ne amis lin . . . mi nur volis, ke mi faru komforte al mi kaj bonhave al la infanoj! Tial . . . kvankam li estis bona por ni, tamen mi povas facile rezigni lin al vi . . . ne frakasante la koron . . . kiu neniam apartenis al li . . . mi perlaboris la panon, antaŭ ol mi konis lin . . . do mi povos ree tion fari.

Sinjoro Ŝton volis intermeti sin, sed Rozalio la unua parolis. Ĝis nun ŝiaj okuloj restis sekaj, sed ĉe la afabla tono de la vortoj de Lilio, kiu

videble volis kaŝi sian propran humiliĝon kaj suferon, celante helpi al ŝi, la larmoj komencis flui sur la vangojn, kaj plorĝemante ŝi rakontis la historion. Poste sinjoro Ŝton aldonis sian parton.

Edziĝinte kun Rozalio, sinjoro Ŝton trovis, ke ŝi estas alkoholulino. Antaŭ la edziĝo Rozalio neofte drinkis; sed ĉar bonegaj vinoj el la kelo de la edzo ĉiam troviĝis sur lia bufedo, ŝi iom post iom cedis al la plezuro, ĝis post tri jaroj ŝi fariĝis drinkemulino.

Sinjoro Ŝton sentis abomenon kontraŭ ŝi, tamen li neniel rifuzis al si ĝui la moderan uzadon de ebriigaĵoj, kaj krom la dirado de koleraj vortoj faris nenion por helpi al la edzino kontraŭstari la malbonan apetiton.

Pli ol unu fojon Rozalio hontigis lin per sia ebrieco, kaj unu tagon post tempo pli hontiga ol kutime li senpacience ordonis al ŝi foriri de lia domo kaj neniam reveni, por ke ŝi ne plu faru malhonoron al li per ŝia manko de sinregado.

Profunde humiligite, Rozalio obeis. Nigra melankolio plenigis ŝian koron, kaj ŝi decidis dronigi sin. Antaŭ ol forlasi la domon, ŝi skribis kortuŝan leteron al la edzo, sciigante per ĝi sian decidon sin dronigi, kaj esprimante bedaŭron pri sia malbona konduto. Ŝi plue sciigis, ke, volante malebligi, ke la edzo ricevu la leteron tiel frue, ke li povu sekvi ŝin kaj malhelpi la plenumon de ŝia intenco, ŝi enpoŝtigos la leteron survoje al la rivero. Ankoraŭ plue ŝi skribis, ke, dezirante evitigi al li nenecesan klaĉfamon kaj humiligon, ŝi detranĉos al si la harojn kaj ne lasos sur si ian

signon, kiu povos malkaŝi ŝian indentecon, se oni trovos ŝian kadavron.

Kiam la letero alvenis, sinjoro Ŝton foriris al Francujo, ne lasinte post si ian adreson, en la espero distriĝi kaj sin forgesigi pri la peza ŝarĝo de tia edzino.

Pro tio, ke li ne ricevis la leteron de la edzino, nek ian sciigon pri ŝia forkuro, ĝis pasis du semajnoj kaj li revenis hejmon, estis tiam tro malfrue, ke li esperu ricevi kian ajn certan novaĵon pri ŝi. Tamen li demandis ĉe la mortulejo, kie oni lin sciigis, ke la kadavro de iu nekonata virino efektive estis trovita en tiu tago, kiam Rozalio skribis la leteron.

Nu, ni reiru al Rozalio.

Foririnte el la domo de sia edzo, ŝi promenadis tien kaj reen sur la riverbordo, penante sin fortigi en la celo sin dronigi, sed la rivero (Tamizo) aspektis tiel malpure, la ŝlimo ĉe la bordo tiel nigre, kaj la odoro estis tiel naŭza, ke fine ŝi iris en kontraŭa direkto, dirante al si, ke ŝi devas elpensi alian metodon.

Profundiĝinte en melankoliaj pensoj kaj vidante nenion antaŭ si, ŝi ne atentis la vojon, laŭ kiu ŝi iras, kaj iamaniere ŝi falpuŝiĝis transirante straton, kaj veturilo surpasis ŝiajn krurojn. Kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝi kuŝis sur lito en publika hospitalo, kaj tie restis ĝis la rompitaj ostoj kunkreskis.

La kuracistoj kaj flegistinoj bone prizorgis ŝin, kaj iu virino de la Sava Armeo ofte interparolis kun ŝi, kiam ŝi vizitadis la pacientinon en la plej proksima lito.

Rozalio ne sciigis sian propran nomon, kiam en la hospitalo oni petis pri ŝia identeco, sed prenis la unuan nomon, kiu eniris ŝian kapon: Maria Jones.[1]

Kiam ŝi plene resaniĝis, ŝi akceptis la inviton de la oficirino de la Sava Armeo, kiu, sciigite, ke "Maria Jones" estas senparenca, senamika kaj senhava, proponis, ke ŝi akompanu ŝin, por enloĝiĝi en "hejmo" apartenanta al la Sava Armeo.

Tie pli ol unu jaron Rozalio restadis, farante certajn servojn rekompence por hejmo. Tie oni instruis ŝin fidi en la amo kaj forto de Dio kaj en Lia povo doni apogon eĉ al tiuj homoj, kiuj estas la plej malfeliĉaj kaj falis plej malalten en la profundon de la mizero.

Ŝi tute perdis la deziron al la alkoholo kaj fariĝis bona helpistino en la laboroj de la Sava Armeo.

De tempo al tempo oni altigis ŝian rangon, ĝis ŝi atingis la gradon de "kapitanino".

Fine oni sendis ŝin de Londono al Liverpolo, kie ŝia speciala devo estis prizorgi pri la virinoj kaj infanoj, bezonantaj bonfaran helpon.

Ĉar ŝi fariĝis malsana, oni ŝin sendis antaŭ kelke da tagoj al Riverton, por tie ĝui libertempon.

En la tago antaŭ foriro al Liverpolo, dezirante revidi la edzon, kaj eble, esperante repaciĝi kun li, ŝi kaŝe vizitis la straton, kie ŝi antaŭe loĝadis kune kun li.

La domo estis senigita je mebloj, kaj oni ne sciis, kien foriris sinjoro Ŝton.

[1] **Elparolu: Ĝonz.**

ĈAPITRO VIII

La historio de Rozalio tre kortuŝis Lilion kaj ankaŭ sinjoron Ŝton, kiu sentis pli da kunsento kun ŝi, kiu, suferinte tiel multe kaj silente kaj profitinte el tia suferado, nobligis sian karakteron kaj sanktigis sian vivon sen la apogo kaj helpo de li, kiu promesis ami kaj ŝirmi ŝin, dum la vivo daŭros!

Lilio insistis, ke Rozalio estas la efektiva edzino de sinjoro Ŝton, kiun ŝi foririgis la sekvantan tagon kun ĉio, kio apartenis al li.

Li proponis malgrandan renton al Lilio, kiu firme rifuzis akcepti ion ajn de li.

Jam pasis kelke da monatoj de tiu terura tago, kiun ŝi multfoje kvazaŭ retravivis. Foje kaj ree ŝia fantazio pentris bildojn de la estonteco, kaj ĉiam ili estis malĝojigaj, plenaj de timo, lasante nur unu ĉiam pli kaj pli malfortiĝantan esperon, ĉar ŝajnis, ke nur miraklo povos ŝin savi de malfacilo, doloro kaj honto.

Ofte ŝi preĝadis :—Patro, ĉio estas ebla ĉe Vi. Forportu tiun ĉi kalikon de mi ; tamen, ne kion mi volas, sed kion Vi !

Sed ŝi ne povis ne multe ploradi, kaj pro tio, apenaŭ oni povis rekoni ŝin.

Tage, kiom ŝi povis, ŝi kaŝis sian malgajecon antaŭ siaj du malgrandaj infanoj, okjara Florenco kaj kvinjara Filipo. Nokte, post kiam ŝi ilin kuŝigis, la bezono de sinregado malpli forte premis

ŝin kaj tiam ŝi ekkriadis per la pensoj ;—Kion mi faris por meriti tiom da puno ?—ĉar tiel ŝi tiam rigardis la aflikton, kiu trafis ŝin. Ĉiam ŝia sola kaj kun ĉiu tago malpliiĝanta espero estis, ke Dio malhelpos la fariĝon de tio, kion ŝi timas. Ofte ŝi demandis al si : —Ĉu Li povas tion fari ? Ĉu Li volas, se Li povas ?

Si ne ricevis multe da pensiuloj tiun sezonon, parte pro tio, ke fariĝis en la urbeto ia epidemio, kiu fortimigis multajn, kiuj alie estus vizitintaj la lokon, parte pro tio, ke ŝi mem aspektis tiel malsane kaj malgaje.

La patrino, anstataŭ konsoli kaj konsili ŝin, malkaŝe plendadis pri sia propra sorto :

— Ve, ve !—ŝi diradis—Vi alportis honton kaj malbonfamon en la familion! Vi ĉiam estadis obstina kaj pensis, ke vi scias gvidi vian vivon pli bone ol mi, via patrino! Eĉ kiam vi komencis paŝi, vi preferis oftajn falojn, ol apogon kaj gvidadon de mi'aŭ via vartistino! Se vi estus petinta konsilon de *mi*, vi ne edziniĝus kun Filipo Ĉester nek kun Lesli Ŝton . . .

— Kaj granda feliĉo mankus al mi! Mi *amis* Filipon . . . kaj pri Lesli, vi bone scias, kvankam vi ne volas ĝin konfesi, ke, kiam li edziĝis kun mi, li kredis, ke li estas vidvo! Li estas tute estiminda, kaj mi . . . mi komencis preskaŭ ami lin . . . almenaŭ li faris min feliĉa dum . . . sed sufiĉe! Ĉu . . . ĉu vi opinias, ke ni povas kion ajn ŝanĝi per senutila ripetado de mallaŭdo kaj bedaŭro ?

— Jes—respondadis la jam plorĝemanta patrino—ho, jes! tia estas la konvena maniero paroli al afliktita patrino . . . Vi, Lilio, havas

mem infanojn . . . eble . . . kredeble . . . tempo venos, kiam vi bedaŭros viajn malafablajn, maljustajn vortojn, . . . kredeble . . . via propra Florenco iam alportos al vi honton, . . . kaj tiam . . . vi . . .

Sed ĉe tiu punkto de la riproĉado, Lilio aŭ forlasadis la ĉambron aŭ ŝi—en la unuaj okazoj—penis repaciĝi kun la malfacila patrino.

Feliĉe sinjorino Breton ne povis elporti restadi dum pli ol kelke da tagoj en unu fojo ĉe Lilio, kvankam ŝi opiniis, ke estas ŝia devo ofte ripeti la vizitojn.

Alico revenis por loĝadi kun Lilio, kiun ŝi sincere amis kaj kompatis.

Nun Lilio kuŝis enlite danĝere malsana.

La kuracisto preskaŭ malesperis savi al ŝi la vivon, tamen li faris ĉion, kion li sciis, kaj venigis specialiston, kiu proponis iujn ŝanĝojn en la kuracado de la pacientino.

Tiun nokton krizo devis okazi post maltrankviliga tago.

Verŝajne Lilio estis tro malsana, por ke ŝi havu plu kiajn ajn dezirojn, kaj pro tio, ke ĝis nun ŝi neniam tute perdis la konscion, ŝi sentis ĉiun akran doloron.

Mariano flegadis ŝin nokte. Doninte al ŝi trinketon da akvo, kaj, malvarmiginte la febran kapon, for de kiu oni jam detranĉis la belajn harojn, ŝi nun sidiĝis ĉe la lito, por zorge observi la ŝanĝojn, kiuj okazos en la suferantino.

Vere grava ŝanĝo okazis!

La fratino Mariano rimarkis, ke Lilio jam

enkomatiĝis. Tio ja fariĝis, sed efektive dum tiu tempo nur ŝia korpo ankoraŭ tie kuŝis.

Ŝi ne plu suferis ; kontraŭe, stranga, trankvila sento de paco plenigis ŝin, senigante al ŝi ĉian doloron.

Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ krepusko falas, ĉirkaŭvolvante ŝin kaj etendiĝante en la malproksimon.

El la krepusko vidiĝis bela, gracia estaĵo, vestita en blankaĵo, el kiu pala, dolĉa lumo brilis kaj ekbriletis. La estaĵo havis serenan frunton, pensesprimajn okulojn kaj sur la vizaĝo esprimon de amo, kaj ĝiaj brakoj estis invite etenditaj al Lilio, kvazaŭ ĝi volus ĉirkaŭpreni ŝin.

Senbrue la lumulo alpaŝis al Lilio, parolante per dolĉa voĉo.

Ĉe ĝia alproksimiĝo, ĉe la arĝenta sono de ĝia voĉo, nova neesprimebla sento de trankvilo kaj fortiĝo plenigis Lilion.

— Linjo, kara, kompatinda virino, vi ne konas min, tamen, de la momento de via konscia vekiĝo en la nunan surteran vivon ĝis nun, mi ĉiam estadas ĉe vi. Mi estas unu el la anĝeloj de la lumo kaj vero, kaj precipe mi estas via anĝelogvidanto. Mia devo konsistas en tio, ke mi surverŝu lumon sur ĉiun paŝon de via vojo, por montri al vi la veraĵojn. Tiel longan tempon larmoj kaj suferoj estis via sorto, ke, kiom ajn mi penadis, mi ne povis vidigi min al vi. Cetere neniam vi tute blindiĝis, ĉar funde vi ja deziris ekscii kaj plenumi la volon de la Majstro.

Hodiaŭ venas al vi la tempon por elekti, ĉu vi volas plu vivadi sur la tero, aŭ ĉu, ellacigite,

vi deziras resti en tiu ĉi superfizika stato, por ke vi ripozu, ellernu, komprenu, kaj pretigu vin al la plua lernado de lecionoj por la tempo, kiam vi revenos al la tero. Tiucele la Majstro nun permesas al mi plene montri min antaŭ vi.

Nu, mi tial surverŝos la lumon de la vero pli klare sur vian vojon. Mi montros al vi kelke da bildoj el via pasinteco, el la nuneco, kaj mi iomete malkovros antaŭ vi tion, kio okazos en la estonteco, se vi elektos travivi la plenan tempon difinitan por via nuna, surtera vivo.

Decidi pri tio devas vi mem, sed kvankam mi ne povas dikti al vi, mi ja povas peni montri al vi la veron tiel klare, ke ne eble estos, ke vi ŝanceliĝu pri via decido.

Restu trankvile tie, kie vi jam kuŝas komforte. Restu tute trankvile, tamen atentu, por ke poste vi povu senhezite fari vian decidon.

Senvorte Lilio konsentis, kaj tuj komencis montriĝi bildoj, kiuj projekciiĝis, kvazaŭ per kinematografo, sur la krepuska fono.

Atente rigardante, dum unu bildo post alia preterŝoviĝis antaŭ ŝi, Lilio ricevis novan senton de malpezeco kun eksterordinara sento de aparteco, kvazaŭ ŝi ne havas personan intereson pri la bildoj!

Tuta ŝia pasinta vivo, eĉ la plej trivialaj detaloj, aperis antaŭ ŝi, kaj neaŭdante eĉ unu vorton Lilio ekkomprenis la internan signifon de ĉio ĉi tio.

Jam nun ŝi povis taksi pasintajn vortojn, agojn, okazojn pli ĝuste. Jam nun ŝi povis disigi la

verajôjn de la malverajôj. Absorbiĝinte, ŝi ĉion observis tiel same, kiel oni rigardas interesan teatraĵon.

Eĉ kiam preterŝoviĝis tiuj bildoj, kiuj prezentis antaŭ ŝi la plej maldolĉajn travivaĵojn de ŝia vivo, ŝi povis ilin serene rigardi, forte interesiĝante pri ili, ĉar ŝi povis ekkapti iomete la signifon.

Ŝi kaptis sufiĉe la signifon por kompreni, ke iu forto pli alta ol ĉia forto sur la tero, permesis la okazojn, eĉ intence aranĝis ilin antaŭe; ke la celo de tiaj okazoj ne estis puna, kiel antaŭe ŝi imagis, sed instrua; ne humiliga sed honoriga; ĉar samtempe ŝi konstatis, ke la leciono, kiun ŝi devas lerni kaj la tasko, kiun ŝi devas plenumi, estas tiel malfacilaj, ke nur tiu, kiu multe progresis laŭ la vojo de evoluado, povas ĝin lerni; ke en la vivo okazas tiel same, kiel en la lernejo: kiam oni bone lernis unu lecionon, oni ricevas *kiel rekompencon* ankoraŭ alian kaj pli malfacilan.

Cetere ŝi plue komprenis, ke koncerne la lecionojn de la vivo la plej grava afero estas ne la kvanto sed la kvalito; ke la motivo estas multe pli grava ol la efektiva rezultato, ĉar la motivo efikas sur la karakteron, kiu daŭros, dum la ago funkcias inter la limoj de la fizika mondo, kiu estas ne daŭra sed ŝanĝiĝema.

Plue, la forto liberigita de alta motivo estas pli potenca ol tiu liberigita de ago; sekve devas esti, ke efektive se ne videble ĝi produktas pli da bono, ol eraro de juĝo povas produkti da malbono.

Kiamaniere ŝi scias ĉion, tion Lilio ne povis klarigi al si; ŝi eĉ ne demandis sin pri ia klarigo,

sed nur intuicie konvinkiĝis, ke tre kredeble ŝi decidos pluvivadi la nunan fazon de la tera vivo, kontraŭstari ĝiajn malfacilaĵojn, venki ilin.

Baldaŭ ŝi ekhontis, vidante sin figurata kiel ŝi aspektis, kiam timplena, malesperanta, ŝi ekkriis al Dio petante, ke Li forigu de ŝi la ŝarĝon, kies doloro kaj humiligo subpremas ŝin.

Jen ŝi estas, jen ankaŭ ŝiaj du infanoj, bezonantaj ŝian zorgon, ekkriantaj—Patrino!—malgajaj pro ŝia malĝojeco, ricevante nur malgrandan parton anstataŭ la abundo da amo, kiun ili antaŭe kutimis ricevi.

. . . .

Tie estis estaĵo, kiu garde staris flanke de ŝi en alia bildo, kun bela vizaĝo esprimanta amon, forton, sopiron. Ĝi similis al la esprimo de homo, kiu, prizorgante suferantan amaton, kunsentas kun li pri la nuna doloro, sed tamen vidas en la malproksimo certan, bonan rezultaton : la finon de la suferado kun dolĉiĝo kaj riĉiĝo de la karaktero.

Rigardante la belecon de tiu ĉi estaĵo flanke de ŝi en la bildo, ŝi treege deziris, ke ŝi povu efektive alproksimiĝi al ĝi ; resti iom da tempo apud ĝi, tiel apude, ke ŝi povu ektuŝi ĝin. Ŝi sentis en si la kapablon fariĝi pli bona kaj fortanima, ol iam antaŭe, se nur tiu ĉi bela estaĵo restadus apud ŝi.

Instinkte ŝi sciiĝis, ke ĉi tiu bela estaĵo venis al ŝi ĝuste tiam, kiam la terura aflikto trafis ŝin ; ke ĝi restadis apud ŝi de tiu tempo ĝis nun, deziregante ŝin helpi, fortigi, ŝirmi ; tamen sen

sukceso, ĉar ŝi, Lilio, per siaj ribelaj pensoj, intermetis inter ilin kvazaŭ nebulon, kiu ĉirkaŭis ŝin kaj tiamaniere malebligis, ke ŝi vidu la anĝelon.

— Ŝajnas, ke vi povus ami tiun, kiu vin gardas, ĉu ne vere, Lilio?

— Jes ja, anĝelo! kiel mi volas, ke ĝi povu plu restadi ĉe mi! Se mi estus certigita, ke ĝi ja plu restados ĉe mi, mi povus ĉion elporti. Kiu do ĝi estas?

— Tio estas la pli alta, *dia* aspekto—la memo —de la individuo, kiun vi ribele ne volas akcepti kiel vian infanon. Rigardu, kvazaŭ ora fadeno alligas ĝin al vi. Verdire, la memo de ĉiu naskota infaneto gardas kaj pli-malpli influadas la patrinon, ĝis ĝi naskiĝos. Poste ĝi senpere influadas la evoluadon de la infaneto mem, sur kiun ĝi koncentrigas siajn fortojn, fariĝinte por ĝi same, kiel mi fariĝis por vi,—lumigulo.

. . . .

Lilio kuŝis ripoze, sed pensplene dum ankoraŭ kelke da tempo, ĝis post ne longe ŝi aŭdis denove la karesan voĉon de la anĝelo parolanta al ŝi:

— Nun, Lilio kara, venu kun mi. Nia Majstro ordonis, ke mi montru al vi ĉion. Venu do, karulino, mi jam plene fortigis vin kaj mi prizorgos vin.

Duone mirigite, Lilio leviĝis, sekvis la anĝelon el sub la krepusko, en iomete pli luman lokon, kie vidiĝis bela ĝardeno, plena de kreskaĵoj nekonataj de ŝi.

El sub unu tia, Lilio ekaŭdis ploretadon kaj foje kaj ree ekkrieton. Serĉinte, ŝi ekvidis malgrandan knabineton, kies vizaĝo estis kaŝata al ŝi pro tio, ke la infano apogis ĝin sur la manplatoj, dum ŝi ekkriis :

— Panjo, panjo! Ho, kiel mi volas, ke vi akceptu min! Ĉu vi rifuzos akcepti min? Ho, mia patrino! . . .

Tiel kompatinde kaj solece aspektis la knabineto, ke tute forgesinte la ĉeeston de la anĝelo, forgesinte ĉion krom la ploranta infano, la patrina koro de Lilio igis ŝin senprokraste kaj sen pripenso rapidiri al la infano, meti ĝin sur siajn genuojn, karesi ĝin, dirante ame :

— Etulino mia, kio estas al vi? Vi certe eraras, supozante, ke la patrino rifuzos akcepti vin. Kio estas la nomo de via patrino? Kie ŝi loĝas? Nur diru al mi, kaj mi alkondukos vin al ŝi. Diru al mi, karulino!

Levinte la kapon, la infano fiksis miran rigardon sur Lilion kaj ekkriis :

— Tio do estas *vi!* Jen mia propra patrino! Ho, panjo mia, ĉu povas esti vere, ke vi jam decidis akcepti min? Ĉu vere! Panjo mia, ne timu! mi estos por vi bona infano, mi ne lasos vin bedaŭri vian decidon . . . bonvenigi min . . . kaj sciu . . . ke mi ankaŭ devos iom suferi . . . tamen, vi estos mia, kaj mi estos via; ni jam apartenas unu al la alia, kaj ĝuste tial, ke ni estos kune kaj amos nin reciproke, ĉio iros bone, ni ĉion povos elporti.

Ne klare komprenis Lilio, sed ŝi premis la infanon pli forte al sia brusto, penis trankviligi

ĝin, samtempe per la okuloj demandante la anĝelon, kiu ŝin akompanis kaj tien kondukis.

— Jes—respondis ĉi tiu—la infano diris la veron. Tio estas la fizika aspekto de la infano. Jetu rigardon ĉirkaŭen kaj vidu la milionojn da infanoj, per kiuj svarmas la ĝardeno! Ĉiuj el ili pretiĝas por reenkorpiĝo, por ree travivi la surteran vivon. Ĉi tiu infano estas destinita al vi, laŭ la volo de la Majstro, ĉar vi sola povas doni al ĝi la ĝustajn helpon kaj ĉirkaŭaĵon, kiun ĝi bezonas. Vi sola povas ĝin konduki tra la proksiman parton de la vojo; vi sola povas ĝin konduki al la bono, kiun ĝi celas kaj meritas.

Rigardu! Fadeno ligas ĝin al vi; ĝi devus esti helkolora, sed ĝi ja estas preskaŭ senkoloriĝinta. Vi tiel malfortigis ĝin per via kontraŭstarado, ke la ligilo preskaŭ rompiĝis. Tamen ankoraŭ restas tempo, se vi volas! ankoraŭ nun vi povas elekti, ĉu vi akceptos la infanon aŭ ne.

Mi klarigu al vi. La Majstro destinis al vi la devon, nur tial, ke Li scias, ke vi tiel progresis, ke vi kapablas ĝin plenumi, kaj plenumante vi plue progresigos vin. Ĉiam Li gardis kaj ankoraŭ gardos vin. Li eĉ gvidis al vi la viron, kiu, kvankam necelante tion, kaŭzis al vi tiom da doloro kaj honto, ke vi deziris eviti la ŝarĝon. Sed sciu, ke, se vi evitos la ŝarĝon, vi ankaŭ malebligos al vi akiri la ĝin akompanantan benon. Se vi akceptos la ŝarĝon, malgraŭ la neevitebla suferado, antaŭ ol morti, vi diros al tiu ĉi infano, kiun vi nuntempe nur duone volas akcepti—" Mi fieras, ke mi estas via patrino."

Unu vorton pri la patro de la infano kaj lia

edzino. Ili ambaŭ havas gravajn lecionojn por lerni per tio okazinta, kaj vi ne povas taksi la bonon, kiun vi ĉiuj akiros el tio. Vi, Lilio, devas lerni ne juĝi, ne malestimi aliajn. Vi devas lerni kompati, ne nur tiujn, kiuj ja pekis, sed ankaŭ tiujn, pri kiuj oni nur opinias, ke ili pekis. Vi nepre tion lernos per tio, kio jam okazis, krom per tio, kio ankoraŭ okazos al vi mem. Jes, ĉe ĉiu paŝo sur la komenca vojo vi lernos! cetere se vi, reirinte en vian fizikan korpon, ordigos viajn pensojn, forigos ĉiujn, kiuj enhavas neamajn, nepardonemajn, ribelajn tendencojn, se vi pacience kaj neflankiĝante celos alcentrigi viajn pensojn al la farado de viaj ordinaraj, ĉiutagaj devoj, vi, celante tion, samtempe faciligos la vojon al la bono ne nur por vi mem, sed ankaŭ por la patro de via infano, kaj vi ricevos grandan ĝojon kaj bonon en vian propran animon.

Nun, Lilio, vi nepre devas elekti, ĉu vi volas resti sur la tero por plenumadi viajn devojn, aŭ ĉu vi volas lasi ilin, ĝis vi ree enkorpiĝos en novan korpon? Ne eble estas eviti la lernadon, sed eble estas prokrasti ĝin.

Lilio ankoraŭ iomete hezitis, sed ĝuste tiam ŝi sentis la molecon kaj varmecon de la korpeto de la infano, kiu kuŝis ripozplene en ŝiaj brakoj, alpremante sin al ŝia brusto: ŝi sentis ekmoveton de la malgranda korpo, ekaŭdis la mallaŭte parolatajn vortojn:

— Panjo! mi volas helpi vin; mi amas vin; ankaŭ vi baldaŭ amos min, vi jam komencis tion fari, kaj kune ni trairos la vivon!

Ĉe tio Lilio ne plu hezitis: ŝi jam nun estis certa, ke ŝi amos por ĉiam la infanon; ŝi volis ĝin akcepti, kaj ŝi konsciis pri ia interna vibreto de amo kaj sopiro al la sendefenda infano, pri kiu ŝi devis respondi. Ŝi jam ne dubis, sed kun nove vekita sento de paca konfido ŝi diris:

— Mi jam scias, ke mi volas resti ankoraŭ sur la tero; mi bonvenigos tiun ĉi etulinon, mian infanon, kaj farados tiel, ke ne nur mi, sed ankaŭ ŝi, fieros pri nia parenceco.

Subite hela lumo lumigis la ĝardenon; ekvidiĝis belegaj floroj, kies bonodoro plenigis la aeron; belsona muziko ekaŭdiĝis, dum la etulino alpremis sin pli forte al Lilio, kaj ĝia vizaĝo prezentis aspekton de profunda kontento. La anĝelo pli radie kaj brile lumis, kaj turninte sin al ŝi, diris:

— Antaŭ ol reeniĝi en vian fizikan korpon, rigardu, dum mi montros al vi ankoraŭ unu bildon.

Iom post iom la krepusko ree falis, kaj Lilio miris, vidante sian fizikan korpon kuŝantan malsane, senmove sur la lito.

Mariono ankoraŭ sidis apude, prizorgante ĝin, kaj—jes, la bela estaĵo, la memo de ŝia infano estis tie, klinante sin super ĝi. Jen la estaĵo rektiĝis, kaj Lilio povis vidi ĝian vizaĝon. Granda ĝojo kaj danko, kvazaŭ post venko, tie troviĝis, kaj jam nun plenigis la animon de Lilio, kiu sciis, ke ŝi ne estas sola, ne estas sen helpantoj, ĉar la lumanĝelo kaj la spirita parto de la infano helpados ŝin, dum la Majstro bone direktas ĉion, por ĉiuj homoj.

. . . .

Iom post iom la krepusko kun la bildo malaperis, kaj Lilio, rekonsciiĝante, aŭdis, kvazaŭ de malproksime, la voĉon de la kuracisto diri :

— Jes, ŝi vivos, malgraŭ miaj timoj, ŝi vivos. Nur zorgu pri ŝi ; atentu pri ŝia nutrado ; lasu, ke ŝi dormu ĝis sato, kaj estu vi pacienca, ĉar ŝi ankoraŭ estas tre, tre malforta, kaj ne povas rapide resaniĝi.

. . . .

ĈAPITRO IX

La infaneto jam havis tri semajnojn, kaj Lilio, ellitiĝinte la unuan fojon post du monatoj, kuŝis sur kanapo. Ŝi aspektis pale kaj malgrase, kaj sentis sin tre malforta. Kiam ŝia vizaĝo estis en ripozo, ĝi ricevis treege malĝojan esprimon.

Tamen ĝuste nun, esprimo de agrabla atendo vidiĝis sur ŝia vizaĝo. Hodiaŭ, kaj tre baldaŭ, Florenco kaj Filipo revenos hejmen post libertempo pasigita ĉe la bonkora onklino Anna, kiu prenis ilin kune kun siaj propraj infanoj en sian kamparan domon, por liberigi Lilion de maltrankvilo kaj por fari, ke la domo estu senbrua.

Kun plezuraj antaŭsentoj Lilio aŭskultadis, por aŭdi tuj kiam ili alproksimiĝos. Ŝi deziregis revidi ilin, scii, ke ili sin trovas returne sub la sama tegmento kune kun ŝi ; ŝi volis scii ankaŭ, kiamaniere ili akceptos sian fratineton. Tiu ĉi lasta ne aspektis tiel belete, kiel aspektas la plimulto el la junaj infanetoj, kvankam, rigardante ŝin, oni povis konstati, ke ŝi devus esti bela. Tre malgranda, ŝi tamen havis sufiĉe bonajn trajtojn, bonforman kapon, kaj vastan bruston, sed ŝi estis terure malgrasa ; ŝajnis kvazaŭ ŝi precipe konsistas el ostoj kovritaj per haŭto. Sekve de tio, ŝiaj okuloj, jam sen tio grandaj, aspektis ankoraŭ pli grandaj. La vizaĝo, kiu devus esti ronda, grasa, trankvila, infana vizaĝo, estis efektive longa, aspektis

maljune kaj maltrankvile; tamen malgraŭ tio, Lilio nomis ĉi tiun malfortan, mizere aspektantan etulinon *Ĝojo!*

Kiel ironia tio ŝajnis al la patrino kaj ceteraj parencoj, kiuj forte timis, ke Lilio jam perdis la prudenton:—Ĉar—ili diris inter si,—neniu sanmensa homo tiel nomus infanon, naskiĝintan en honteco, kaj kiu krom tio aspektas tiel malgaje.

Sed Lilio restis firma pri sia elekto de nomo, dirante:—Eble, kiam Florenco kaj Filipo fariĝos plenaĝaj kaj foriros de mi, ĉi tiu etulino estos por mi konsolo kaj ĝojo.

Ŝi ne volis diri pri la sonĝo, kiu venis al ŝi tiam, kiam ŝi kvazaŭ ŝanceliĝis inter la vivo kaj la morto.

La plejparton de la sonĝo ŝi jam ne memoris, sed da ĝi ŝi ankoraŭ memoris sufiĉon, por fortigi sian fidon al Dio kaj por malhelpi, ke ŝi elparolu eĉ unu plendan vorton.

Tial parte pro tio, ke ŝi volis esti konstante rememorigata pri la espero donita al ŝi de la sonĝo; parte pro tio, ke la simpla elparolo de la nomo helpos ŝin; sed precipe pro tio, ke ŝi volis, ke la infano estu per tio konsolata, se iam ĝi eltrovos la verajn faktojn pri sia deveno, ŝi nomis ĉi tiun nedeziritan etulinon Ĝojo. Povus esti, ke memori ke ŝia patrino tiel (kaj ne sencele) nomis ŝin, estus por ŝi konsolo.

Koncerne la infaneton antaŭ ol ĝi naskiĝis, la patrino kaj fratinoj de Lilio forte esperis, ke ĝi ne ekvivos; poste ili egale forte deziris, ke ĝi ne vivadu. Ĝi aspektis sufiĉe malsane kaj pliigis

ilian laboron pro ĝiaj oftaj boteloj da lakto kaj la multan lavadon, kiun ĝi kaŭzis.

La kortuŝa, kompatinda krietado de la infaneto, kiam ĝi malsatadis, aŭ kiam oni ĝin prenadis for de ĝia patrino, ne kortuŝis ilin, ne ekscitis en ili kompaton, nek malĝojon, ĝi nur malkontentigis aŭ kolerigis ilin.

Ne, oni ne povis atendi, ke ili kore, ame bonvenigu la infaneton; laŭ ilia opinio, ĝi estis nur malgranda, abomena sintrudulino, kiu obstine bataladas pro sia ekzistado. Plej mirige estis, ke ŝajne ŝia patrino deziris, ke ŝi ne mortu!

Antaŭ ol ĝi naskiĝis, Lilio mem pensis pri ĝi, ke ŝi ne povos ĝin ami tial, ke ĝi ne estos *lia* infano; tio estas, la infano de tiu, kiu estis ŝia amata edzo.

Tamen de la tempo, en kiu okazis al ŝi la sonĝo, ŝia spirita stato feliĉe ŝanĝiĝis, kaj tuj kiam la unuan fojon ŝi aŭdis la infaneton krii, responda voĉo aŭdiĝis interne de ŝi, kaj longedaŭra ŝajnis al ŝi la tempospaco, en kiu ŝi devis atendi por ĝin ricevi en siajn brakojn. Strange, dum la infaneto tie kuŝis, ŝi sentis en si ian ĝojon, pri kiu estas vere, ke oni ne povis facile distingi ĝin de doloro, sed ĝi ja estis ia ĝojo, kaj per la pensoj ŝi klarigis al si, ke se la infaneto estus senviva, kiam ĝi naskiĝis, aŭ jam nun, se ĝi baldaŭ mortus, kelkmezure ŝi sentus sin senigita je peza ŝarĝo, ĉar sur la vojo de la vivo, jam sen tio tiel malglata, tio forigus al ŝi multajn malhelpojn; sed, ĉar tio senigus al ŝi la realecon kaj helpon de ŝia sonĝo, ĝi kaŭzus al ŝi veran mankon per la vanigo de ŝiaj esperoj.

Antaŭ ol la infaneto naskiĝis, ŝia bonkora onklino proponis, ke oni frue sendu ĝin al azilo de infanoj, pri kiu ŝi mem interesadis sin.

Sinjorino Breton kaj la tuta familio rigardis la proponon kiel inspiron, kaj diris al si reciproke, ke de tempo al tempo ili donacos malgrandajn sumojn da mono al la konto de la azilo. Plue, eble iufoje ili eĉ vizitos la azilon. Sed ili neniel povis decidigi Lilion konsenti al la projekto.

Ŝia obstineco ekscitis la koleron de la patrino, kiu, kaŭze de tio, parolis insulte al ŝi, dum la ceteraj parencoj, informiĝinte pri la propono kaj ĝia rifuzo, akcente diris, ke tiuokaze ili ne plu helpos Lilion. Ili diris :—Ĉar vi, kulpe aŭ ne kulpe, enkondukis honton en la familion, la plejmalmulto, kiun ni ja rajtas postuli de vi, estas, ke vi dece kaŝu ĝin de la vido. Jen ideala projekto, sed vi ne volas eĉ konsideri ĝin. Vi pripensu bone—ili diris—kiamaniere vi sola, sen bona sanstato, povos akiri al vi kaj al tri infanoj la vivrimedojn ; tio ne estas ebla ! Vi nur provu kaj baldaŭ vi devos veni al ni por peti helpon. Sed ni ne volos helpi ! Kial ni devus vin helpi ? Ni jam faris ĉion, pri kio oni rajtas atendi, ke parencoj faru. De nun ni jam ne plu rilatos kun vi.

Tiel ili parolis inter si, kaj ili ne kaŝis al Lilio siajn intencojn.

Tio okazis antaŭ ol la infano naskiĝis, sed poste sinjorino Breton multfoje petis Lilion, ke ŝi sendu for la etulinon, dirante, ke, se ŝi tion faros, onklino Anna nepre transpagos al ŝi sumon, kies procento donos al ŝi po kvin spesmiloj en ĉiu semajno ;

sumo, kiu sufiĉus por pagi la luon de la domo, en kiu Lilio tiam loĝis. Krom tio, la ceteraj parencoj sendube donus al ŝi grandan monhelpon. Sed ĉiam Lilio respondis per la samaj vortoj:
—De Dio mi ricevis ĉi tiun infaneton, kaj al Li sola mi fordonos ĝin.

. . . .

Tiom multe da ĉagreno kaj maltrankvilo malhelpis, ke Lilio resaniĝu tiel rapide, kiel ŝi deziris. Jam longan tempon ŝi ne havis bonan sanon; ŝi malsanetis dum la skarlatino de la infanoj, kaj de tiu tempo ŝi neniam tute refortikiĝis. La ŝanĝo el la urbo en la pli freŝan fortigan aeron de la urbeto trans la rivero bone efikis; cetere la troa laborado, prema maltrankvilo, nesufiĉa nutro, kiuj estis ŝia sorto ekster la kelke da semajnoj pasigitaj kune kun sinjoro Ŝton, sekvataj de la peza ŝarĝo, kiu falis sur ŝin, kombiniĝis por malsanigi ŝin. Sekve de ĉio tio ĉi, kiam malfacila malsano atakis ŝin, la jam antaŭe malfortiĝinta korpo malfacile kontraŭstaris ĝin.

Tamen, en ĉiu sekvanta tago iometa pliboniĝo en ŝia sanstato estis rimarkebla, kaj tio devis kontentigi ŝin, sed ĝi ja estis malfacila afero por ŝi.

Ĝi ne estus por ŝi facila afero, eĉ se ŝi posedus monrimedojn por vivi sendepende de aliaj, sed la plej dolora afero estis memori, ke en la daŭro de du monatoj ŝi devas ĉiam ricevi servojn de siaj parencoj, sciante, ke, krom tio, ili elspezadas monon pro ŝi, kaj nun en la lastaj semajnoj,

samtempe kiam ŝi kvazaŭ prenas de ili per unu mano, ŝi devas kontraŭbatali ilin per la alia.

Ofte ŝi preĝis fervore, ke ŝi nur resaniĝu rapide, ke ŝi nur ricevu baldaŭ siajn fortojn, sed kiel neeble tio ŝajnis! Ofte ŝi diris al si per la pensoj kaj volo: Mi estu pacienca; mi nur atendu pacience, lumo ja venos, ĝi baldaŭ aperos, brilante sur mian vojon, ĉar la anĝelo ja antaŭdiris tempon, kiam malgranda Ĝojo fariĝos plenaĝa kaj mi estos fiera pri ŝi. Mi ja fidos; Dio scias ĉion koncerne min, kaj Li, Kiu ĉion scias, ne rapidas, tial mi, kiu povas nenion certe scii, ne devus esti malpacienca. La Eternulo zorgos pri mi kaj miaj. Li nepre alsendos al mi ĉion, kio estos por mi bona. Jam nun Li estas alsendanta.

Tiel ŝi devigis sin pensi.

. . . .

Sed aŭskultu, jen estas krakado de radoj kaj —jes! oni haltigas ilin antaŭ la ĉefpordo. Sekvas sonoro, kaj Lilio aŭdas la muzikan sonon de infanaj voĉoj. Onklino Anna kaj la patrino de Lilio interŝanĝas salutojn, kaj baldaŭ, kvankam ĝi ne ŝajnas baldaŭ al Lilio, la pordo de ŝia ĉambro malfermiĝas kaj denove ŝiaj du belaj infanoj estas kune kun ŝi.

Feliĉe ili aspektis tre sane kaj fortike, kaj ŝajnis, ke ilia ĉeesto jam havigis al Lilio novan forton kaj gradon da intereso pri eksteraj aferoj, kiuj ne montriĝis en ŝi jam de longa tempo.

Oni permesis al la infanoj rigardeti al la malgranda infaneto, kaj ili parolis, nekaŝante siajn opiniojn pri ĝi.

— Nu, ĝi estas pli malgranda ol la granda pupo de kuzino Marĝerio!—kriis Filipo,—sed ĝi ne estas tiel beleta!—Mi ĝojas pri tio, ke vi havigis al ni knabinon-infaneton anstataŭ knabon, diris Florenco. La knaboj ja estas dezirindaj; sed mi tiel ofte deziregis fratinon; la knaboj ĉiam deziras ludi per sensencaj soldatoj, turboj, aŭ similaj ludiloj, kaj neniam oni povas lasi, ke ili tenu pupon, eĉ dum unu minuto, sen tio, ke rompiĝos la parolilo, aŭ mankos la haroj, aŭ io simile ruiniga okazos! Kiom da tempo devas forpasi, antaŭ ol ĝi kreskos sufiĉe granda por ludi kun mi?

— Ĝi tute ne estas knabino, aŭ se ĝi ja estas, ĝi restos tia nur ĝis ĝi kreskos sufiĉe por surporti mian pantaloneton, kaj ĝuste tiam ĝi fariĝos *mia frato!* Vi povos havi ĝin ĝis tiam—diris Filipo, forturnante sin kun digna mieno.

— Sed, panjo—diris Florenco post iom da konsiderado—de kie vi prenis ĝin?

— Mia kara, Dio ĝin sendis kaj la kuracisto ĝin alportis—respondis Lilio.

— Sed panjo, ĉu vi *mendis* ĝin, aŭ ĉu Dio ĝin sendis *nepetite*? Mi volus scii, ĉar eble, se vi Lin tre petus, Li sendus ankoraŭ unu tial, ke mi havu unu kiel fratineton, kaj Filipo la alian kiel frateton; tiamaniere ni ambaŭ kontentiĝus.

Guste tiam Filipo sin turnis kaj ree alproksimiĝis; li zorge, esplore rigardis la infaneton, volante ĝin palpi.

— Ne tuŝu ĝin, karulo, ĉar eble vi difektus ĝin—admonis Florenco, antaŭ ol Lilio povis ion diri.

— Kial ne? el kio oni ĝin faris? diris Filipo.

— Mi rememoras—ĝoje ekkriis Florenco—" El la *polvo* Dio faradas homojn."

— Sed—kontraŭdiris Filipo—Ĉu oni povas havi polvon en la ĉielo?

— Kompreneble, stultulo—rediris Florenco—ĉu oni ne balaadas la ĉielon?

Oni nun interrompis la interparoladon de la infanoj por senigi ilin je iliaj promenaj vestoj, sciigante ilin, ke se ili deziras resti en la sama ĉambro kun la patrino kaj la cetero de la familianoj, ili devas ne paroli tro multe.

Tamen ili jam diris sufiĉon por kontentigi Lilion, kiu konvinkiĝis, ke ĉiu propramaniere bonvenigis malgrandan Ĝojon.

CAPITRO X

La bonkora onklino Anna konstatis, ke pri Lilio en la nuna tempo nur unu afero estas farinda, nome, helpi ŝin resaniĝi kiel eble plej baldaŭ. Komence estis necese ŝin distri kaj tiucele ŝin formovi el ŝiaj nunaj ĉirkaŭaĵoj kaj konduki sur novan lokon, kie ŝi ne plu povos renkontiĝi kun la samaj personoj, kiujn ŝi vidadis dum la lasta kelko da monatoj. Estis dezirinde, ke ŝi estu helpata forgesi kiom eble la lastatempajn ĉagrenojn kaj ree gajiĝi.

Neniu konstatis pli klare ol Lilio, ke iam baldaŭ ŝi devos stari sola, sendependa de helpantoj, por trabati al si vojon en la mondo, kaj ke antaŭe ŝi devas reakiri kiel eble bonan sanstaton. Tial, kiam pasis monato de la naskiĝo de Gojo, Lilio alveturis kune kun ŝi al la bela vilaĝo Fenton, lokita sur monteta deklivo, por tie resti tri semajnojn kiel la gastinoj de onklino Anna kune kun ties du infanoj.

Tiel rapide kaj bone efikis la monteta aero kaj la novaj ĉirkaŭaĵoj, ke jam post kelke da tagoj sur la vangoj de Lilio aperis nuanco de koloro simila al palruĝaj rozoj, dum pli da vigleco montriĝis en ŝiaj okuloj. Samtempe estis rimarkinde, ke ŝi jam povis okupi sin per multaj bagatelaj aferoj, pri kiuj antaŭ la vizito ne estis eble, ke ŝi interesiĝu.

Ankaŭ pri Gojo la ŝanĝo de ĉirkaŭaĵoj bone

efikis. Ĉiutage rimarkebla pliboniĝo montriĝis; ŝia fizionomio, perdante pli kaj pli la maljunan aspekton, fariĝis pli infana. Plue, antaŭ ol foriri de Fenton, ŝi ĝojigis la koron de sia patrino, per sia unua rideto.

Iufoje, kuŝante trankvile kaj senmove sur vojaĝa lantuko kaj kusenoj, kiujn oni metis ĉiutage sub la ombro de odora rozlaŭbo, Lilio konsciis pri helpa ĉeesto de ia estaĵo aŭ forto apud ŝi.

Sajnis kvazaŭ iu plenigas ŝin je nova vivipovo kaj vigleco, samtempe konvinkante ŝin, ke ŝi devas ne timi, ĉar ŝi povos kontraŭstari la mokojn de la mondo, kaj plenumi tutajn ĝiajn agodevojn, kiam ĉi tiuj prezentos sin antaŭ ŝi. Dume neniu bonaĵo mankos al ŝi kaj la infanoj.

Foririnte de onklino Anna por reiri hejmen, ŝi kuraĝe rigardis antaŭen, avida rekomenci agajn devojn, pro tio, ke ŝi jam devis pasigi tiom multe da tempo senfare.

Ŝi ankoraŭ aspektis malfortike, kvazaŭ venteto povus facile forblovi ŝin, sed ŝi sentis sin multe pli sana, kaj sciis, ke ŝi jam multe pli akcelos la akiron de fortikeco per laborado, ol per nenion-farado.

Alveninte sian hejmon Lilio trovis multon por fari. La fratino Mariano fianĉiĝis, tamen ŝi promesis loĝi ĉe Lilio dum la nemulto da monatoj restantaj antaŭ ŝia edziniĝo, tial Lilio ne devis esti soleca nek sen helpo.

Florenco kaj Filipo havis bonegan sanon kaj estis tre gajaj; Lilio ne perdis tempon, sed preskaŭ tuj anoncis en la gazeto *Mercury*, ke ŝi estas preta akcepti pagajn gastojn.

Feliĉe ŝi tiamaniere venigis al si sinjorinon kaj ties filinon, kiuj restadis ĝis malfrue en la sekvinta printempo, kaj krom ĉi tiuj, ankoraŭ kelkaj homoj loĝis ĉe ŝi po kelke da tagoj.

Kuraĝe kaj espere Lilio laboradis, sed venis horoj kaj tagoj, kiam ŝi sentis sin subpremata, kaj ĉio ŝajnis aspekti nigre malgaja.

En la daŭro de kelke da monatoj post ŝia reveno de la onklino Anna, ŝi surmetis al si siajn promenajn vestojn nur kelkajn fojojn.

Pri ĉi tio Lilio montris sin nekuraĝa, tamen ŝi povis iom senkulpigi sin, kaj ne estante perfektulino, ŝi devis ree kaj ree sin venki.

Krom la sano, ne estis speciala motivo por devigi Lilion iri promeni. La butikistoj kutimis sendi al ŝi por ricevi mendojn. Mariano, dum ŝi restis ĉe ŝi, faradis ĉiujn necesajn, aliajn aĉetojn, kaj Lilio devis tiom stari kaj iradi en la domo, ke ŝi nepre devis ripozigi sin duonkuŝante unu-du horojn ĉiutage, tamen kudrante la tutan tempon.

Iafoje onklinoj Anna kaj Maria sendis al ŝi siajn ankoraŭ ne eluzitajn vestojn de la antaŭa sezono. Tiujn ĉi la lertaj manoj de Lilio ŝanĝis en alkonvenajn vestojn, ne nur por si mem, sed ankaŭ por la infanoj.

Inter la najbarinoj, ĉiuj patrinoj enviadis la belajn vestojn de Florenco kaj Filipo. Ili miris, kiamaniere sinjorino Ĉester povis vesti sin kaj la infanojn tiel riĉe. Priparolante la aferon inter si, ili kelkfoje faris malicajn kaŝaludojn. Lilio ne miksis sin inter tiuj, kiuj opiniis, ke "teni sin al si" estas la plej grava el ĉiuj kulpoj.

La plimulto el la virinoj, inter kiuj Lilio loĝis, estis maldelikataj kaj ne bone edukitaj. Ili fariĝis pli-malpli malmolkoraj per sia batalado pro la vivo kaj per sia ĉiutaga interrilato kun homoj, kies idealoj kaj agmanieroj estis malaltaj.

Iliaj elparolado, manieroj, vestaĵo,—ĉio elmontris la diferencon inter iliaj deveno, edukiteco, instinktoj, kaj tiuj de Lilio.

Multaj el ili pasigadis longan tempon, starante ĉe propra aŭ najbara pordo por babiladi. Laŭvole ili eniradis en la domojn de "amikinoj," pruntedonadis inter si ĉiuspecajn aĵojn—karbon, sapon, kandelojn, teon, buteron, k.t.p.

Lilio ne povus agi tiamaniere, eĉ se ŝi dezirus. Nemulte da tagoj pasis post ŝia endomiĝo, kiam najbarino aperis ĉe la kuireja pordo por peti prunton de ŝi, kaj poste venis unu virino post alia kun ĉia preteksto, kaj ĉiuj prunteprenis, antaŭ ol foriri.

La pruntopetoj mem mirigis Lilion. En la komenco ŝi cedis al la najbarinoj donante ĉion, pri kio ili petis, sed fine ŝi devis rifuzi, ĉar ju pli ŝi cedis al la petoj, des pli multaj ĉi tiuj fariĝis, kaj la virinoj tedis ŝin interrompante ŝian laboron. Krom tio ŝiaj rimedoj ne permesis, ke ŝi donacu ĉion petitan, kaj ŝi ne volis, ke oni redonu la pruntojn. Kiam ĉi tiuj konsistis el manĝaĵo, ŝi rifuzis repreni ilian ekvivalenton, ĉar ŝi ne fidis la purecon de la pruntoprenantoj; kiam ili konsistis el karbo, ŝi ankoraŭ rifuzis repreni, opiniante, ke la najbarinoj certe estas multe pli malriĉaj ol ŝi; alie ili ne petus de ŝi,

nek vestus sin kaj siajn tiel mallukse kaj nepeneme, kiel ja estis ilia kutimo.

Pri tio Lilio eraris. Laŭ ŝia vidpunkto ili estis mizere malriĉaj, laŭ ilia ili estis nur iom nebonstataj, ĉar de la sorto ili ne postulis tiom, kiom Lilio.

Unuj el la najbarinoj ne nur luigadis ĉambrojn, sed ankaŭ ricevadis parton de la salajro de edzo aŭ filoj, dum aliaj, estas vero, havis edzon aŭ filon, kiu fordrinkadis sian monon kaj poste petis monhelpon de la virino.

Malgraŭ tio, ke al ili mankis la eksteraj ĝentilaĵoj de la vivo, malgraŭ ilia maldelikata parolmaniero, iliaj ŝajne malaltaj idealoj; malgraŭ iliaj klaĉaj langoj kaj ĵaluzaj emoj; malgraŭ ĉio, efektive bonaj koroj troviĝis inter ĉi tiuj virinoj, ĉiam pretaj fari bonon unu al alia, kiam ajn ili konvinkiĝis, ke iu suferas. Volonte iuj el ili dividus sian lastan pecon da pano, senigus sin je la nokta dormo, senigus sin je ĉia ŝataĵo, por helpi amikinon.

Sed la tagon, en kiu oni alportis la meblojn de Lilio, ĉiu najbarino lokis sin tie, de kie ŝi povis plej bone observi kaj kalkuli la valoron de ĉiu meblaĵo, kiun oni mallevis el la ŝarĝveturilo, antaŭ ol porti ĝin en la domon.

Tiumaniere ili informiĝis pri tio, ke la domo de Lilio estas pli lukse meblita, ol iliaj; kaj pro tio, ke ĝi estis pli bone meblita, ke Lilio kaj ŝiaj infanoj estis pli bone vestitaj, ke la parolmaniero de Lilio estis nesama—afekta laŭ ilia opinio—ke ŝi ne kolegiĝis kun ili, sed kontraŭe ŝajnis eviti ilin, ili de la komenco rigardis ŝin iom ĵaluze kaj suspekte.

F

Tamen individue kaj are ĉiu instinkte sentis, ke Lilio superas ilin, kaj renkontiĝante kun ŝi ĉiu nepripense montris al ŝi respekton, sciante, ke ŝi estas vere bona kaj respektinda.

Nur tiam, kiam ili kune klaĉis kaj lasis al si envii, prezentis sin la nebonkoraj ideoj, kiuj pasis de buŝo al buŝo.

Se ili povus diveni ec iomete la veron pri Lilio, ŝiajn zorgojn, malriĉecon, nemeritітan suferadon, kuraĝajn penadojn, tiam la boneco kaj afableco, kiuj ja ekzistis funde de iliaj koroj, sin montrus kaj esprimiĝus per multaj manieroj.

Tamen ili ne sciis, kaj ili ne povis diveni la veron, kiam Ĝojo naskiĝis. En ia mirinda maniero ĉiuj najbarinoj tuj informiĝis pri la okazo —ne, pripensinte, oni ne nomu ĝin mirinda, pro tio, ke tiutempe ili ofte iris pruntepreni al la domo de Lilio, kie sinjorino Breton, estante mastrumantino, provizore dungis junan servistinon.

Ŝatante sian gravan rolon, ĉi tiu volonte donis al la vizitantinoj ĉiun deziratan informon.

Ŝatatan temon por konversacio tio donis al la najbarinoj, kiuj trae kritikis kaj mallaŭdis Lilion, pri kies vivmaniero ili imagis, ke ili tiel precize scias ĝin, dum efektive ili ĝin ne povis eĉ la plej malmulte konjekti! Ili do decidis montri al ŝi per sia agmaniero, kiel ili malestimas tiun, kiu volus pretendi, ke ŝi superas ilin.

Sekve de tio, kiam Lilio devis fari promenon, frue post sia reveno de Fenton, ŝi promesis sin, parte pro sia troa sentemeco, parte pro la sintenado de la najbarinoj, ke ŝi eliros el la domo, nur kiam ŝi nepre devos.

Tamen tio ne povis ĉiam daŭri, kaj fine devigate iri fari aĉetojn Lilio trovis, ke aŭ la najbarinoj forgesis siajn juĝojn, aŭ ili kutimiĝis al Lilio, trovinte novan temon pri kiu klaĉi.

Sed tio, kion Lilio la plej forte bedaŭris pri la ĉirkaŭaĵoj, estis la malbona influo de la infanoj de la najbarinoj sur Florencon kaj Filipon.

Post la domo sin trovis korto, ĉirkaŭita de alta, masonita muro, sed malgraŭ la grandeco de la domo, nenia ĝardeno ekzistis krom tiu kontraŭ la strato, kie oni enbaris kelke da metroj da tero. Tie oni plantis arbetojn, por ke ili ŝirmu la plej malsuprajn fenestrojn kontraŭ la enrigardoj de la preterpasantoj. Sed tie ne estis sufiĉe da spaco, por ke oni povu ĝin uzi kiel infanan ludejon. Teni la infanojn la tutan tagon en la domo Lilio ne volis, kaj ŝi ne povis disponi sufiĉe da tempo por plene instrui aŭ amuzi ilin; tial ŝi devis sekvi la kutimon de la patrinoj de la najbaraĵo, sendante Florencon kaj Filipon al la loka publika lernejo, kies instruado kostis po du ŝilingoj por monato, kaj lasante ilin iri neakompanate sur la riverbordon.

Reveninte hejmon ili rakontadis al Lilio pri tio, kion ili aŭdis kaj vidis; kelkfoje ŝi maltrankviliĝis pro la rakonto.

Dum la somero ŝi neofte vidis ilin krom ĉe la manĝoj kaj vespere ĉe la tempo por enlitiĝi, sed en la vintro ŝi havis pli da libera tempo; tio estas, ŝi tiam okupadis sin precipe per la kudrado, kaj ofte okazis, ke farante tion, ŝi povis samtempe aŭskulti la babiladon de la infanoj kaj mem partopreni en ĝi. Kelkfoje ŝi proponis novajn por

ili ludojn, kaj eĉ kunludis kun ili en la frua parto de la vespero. Ŝi tiam ankaŭ klopodis respondi al iliaj multaj demandoj, kalkulante kiel altvalorajn, la horojn pasigatajn kun ili. Tamen, kvankam ŝi ne deziris disiĝi de ili, kaj malgraŭ la kosto, kiu por ŝi estis grava afero, ŝi decidis sendi Florencon kaj Filipon al bonklasa edukejo, antaŭ ol ili lernos tro da malbono.

Pliigante ŝian elspezon, tio ankaŭ pliigis ŝiajn laboradon kaj zorgojn, sed ŝi volonte plenumis ĉion.

Gojo estis tiel juna kaj malfortika, ke Lilio devis nepre teni ŝin hejme; tamen, kiam ŝi sufiĉe grandiĝis, Lilio devis permesi al ŝi ludi laŭvole sur la sablaĵo kontraŭ la domo, de kie Lilio povis ŝin vidi ĉiam, kiam ŝi volis, kaj venigi per simpla sonoro de sonorilo ekstere de unu el la frontaj fenestroj.

Ial ŝi ŝajnis ne sorbi maldelikataĵojn, koleg-iĝante kun la infanoj de la najbaroj. Eble pro tio, ke ŝi estis multe pli juna ol ili, aŭ ke ŝi ne havis similajn inklinojn, kredeble Gojo ne aŭdis tiajn vortojn, ne vidis tiajn vidojn kiel Florenco kaj Filipo, kiuj kolegiĝis kun pliaĝaj infanoj kaj vagadis multe pli malproksimen de la domo; eble ŝi ne malkaŝis ĉion, kion ŝi aŭdis kaj vidis; kredeble ŝia propra amo al la belo kaj bono ŝirmis ŝin.

En la komenco Gojo estis sindetena, ne tuj amikiĝis kun la infanoj de la najbaraĵo, sed post iom da tempo ŝi ne nur amikiĝis, sed ankaŭ interkariĝis kun iuj. Ankoraŭ pli poste, nepri-pensinte ŝi kaj ĉi tiuj fariĝis elektemaj pri siaj kamaradinoj.

Grupo el kvin aŭ ses el ĉi tiuj infanoj ludadis kune kun Gojo, tagon post tago, reciproke ĝuadis sian kuneston, plivastigis sian vidpunkton, kio estis bonega, precipe por Gojo, kiu estis kvazaŭ sola infano.

Kiel okazas ĉiam en ĉiu, kiel ajn malgranda, aro da homoj, ĉu konsistanta el infanoj ĉu el plenaĝuloj, sen eĉ unu parolita vorto, sen la konscia volo de ĉiuj en la grupo, kelkfoje malgraŭ la volo de iuj, unu el ili fariĝas grupestro, al kiu la ceteraj venas por konsilo, kompreniĝo, aŭ aprobo de siaj ideoj.

Baldaŭ oni povis rimarki, ke malgraŭ ŝia netrudiĝemo la aliaj malgrandaj infanoj rigardis Gojon kiel sian kondukantinon. Ŝi jam fariĝis sufiĉe beleta knabineto kaj, krom tio, bona kaj obeema. Ŝi diferencis de Florenco kaj Filipo per karaktero kaj eksteraĵo. Siaj okuloj havis koloron simile grizbluan, kiel tiuj de Florenco, sed ili estis nesimilaj per la formo, grandeco kaj esprimo, kiuj ĉe Gojo estis pli similaj al tiuj de la patrino. La okuloj de Lilio iom perdis sian belecon, de kiam ŝi suferis, ĉar, krom la efiko de la fizika suferado, ŝi sentis sin soleca, malgaja kaj korpremata, kaj tio ne povis ne esti montrata per la okuloj, tiuj speguloj de la animo. Sed kvankam ili jam havis malpli da feliĉaj pensoj kaj emocioj por esprimi, ol kiom antaŭe ili kutimis havi, tamen ili ankoraŭ aspektis milde, dolĉe, ame, kaj tre inteligente.

Ĉe Florenco la okuloj estis viglaj kaj brilaj; iufoje oni povus pensi, ke ili aspektas iom malmolaj kaj kalkulemaj; tiuj de Gojo estis mildaj,

elokventaj, revaj, kaj iufoje penetraj, kiam ŝi volis ekkoni iun. Fortan intuicion ŝi posedis, kaj ordinare ŝi legis homojn, kvazaŭ ili estus malfermitaj libroj.

La muzikon ŝi pasie amis. Foje ŝi eĉ lasis sian manĝon, lasis ĉian okupon nur por aŭskulti la muzikistaron, kiu ofte venis ludi sur la stratoj. Kiam ajn oni ludis la pianon, kiun Lilio povis ankoraŭ teni, Ĝojo rave aŭskultis.

Kelkfoje, kiam ŝi opiniis, ke neniu observas aŭ aŭskultas ŝin, ŝi ŝteliris al la piano kaj mem muzikis.

Unu tagon, preterpasante la saloneton, Lilio aŭdis muzikajn sonojn, kiam ŝi ne atendis ilin aŭdi, ĉar, krom Ĝojo, ŝi estis sola en la domo. Malferminte la pordon, ŝi eniris la ĉambron, alproksimiĝis al la malgranda kvinjarulino kaj demandis :

— Kion faras mia filineto ĉe la piano ?

— Ho, panjo mia, volu atendi unu minuton kaj ne parolu al mi ĝuste nun—rediris Ĝojo—ĉar *mi ludas verbon !*

Alian fojon vespere, enlitiginte Ĝojon kaj okupante sin per kudrado en la proksima ĉambro, Lilio aŭdis voĉeton ekkrii :

— Panjo! Panjo! ĉu mi povas havi krajonon kaj pecon da papero ? Mi tre petas——

Komence Lilio ne respondis, dezirante, ke la infano endormiĝu, sed la voĉeto urĝe persistis, tial ŝi iris en la dormoĉambron kaj demandis :

— Por kio vi deziras paperon kaj krajonon ? Vi jam devas ekdormi, kaj tiuokaze, se vi estos

bona, morgaŭ matene mi donos al vi paperon kaj krajonon.

— Sed, panjo kara, morgaŭ estos tro malfrue, mi ja ilin bezonas nun. Volu doni ilin al mi, mi petas, kaj tuj kiam mi estos ilin uzinta, mi diros al vi, por kio mi deziras ilin. Ĝi ja estas grava afero.

Ne plu Lilio prokrastis, sed mirante plenumis la peton de la juna filino kaj poste atendis, observante, dum Ĝojo penplene desegnis kelkajn eksterordinarajn, iom ondoformajn liniojn, kiuj jen tordiĝis jen plilongiĝis horizontale, jen subite interrompiĝis. Des pli multe ŝi miris, ĉar Ĝojo ne desegnis homojn aŭ objektojn tiajn, kiel ŝi, simile al ĉiuj aliaj infanoj, kutimis desegni.

Fininte, la infano faris longan enspiron kontente.

— Vi povas jam diri al mi, kial vi deziris, ke mi alportu al vi paperon kaj krajonon, kiam vi devus endormiĝi, ĉu ne vere, kara? Kaj kio estas tiu mirinda desegnaĵo, kiun vi faris?— demandis Lilio.

— Mi diros al vi, sed, panjo, mi pensis, ke vi komprenos, ke ĝi . . . ĝi ne estas desegnaĵo, ĝi estas skribo!

— Skribo! mi ne sciis antaŭe, ke vi jam povas skribi, Ĝojo, alie mi certe komprenus? Ĉu vi volis skribi letereton?

— Ne—respondis Ĝojo—ĝi estas ne letera sed muzika skribo. Mi ĵus aŭskultis ĝin tiel same, kiel ofte okazas ĉe mi, post kiam mi enlitiĝis kaj vi lastfoje kisinte min foriris kaj diris "bonan nokton." Car tio, kion mi ĵus

aŭdis, estis pli ol ordinare bela, mi deziris enskribi ĝin, kiel vi faras, panjo, kiam vi volas ion ne forgesi.

— Sed mia infano, mi ankoraŭ ne bone komprenas. Ĉu vi efektive ofte aŭskultas muzikon, enlitiĝinte? Ĉu vi aŭdas ĝin per viaj sonĝoj? Vi neniam antaŭe diris tion al mi—diris Lilio preskaŭ riproĉe.

— Ho jes, ofte, kaj mi aŭskultas ĝin; mi pensas, ke mi ne sonĝas ĝin, ĉar ĉiam ĝi aŭdiĝas antaŭ ol mi ekdormas.

— Por kio, do, kara, vi tion kaŝis antaŭ mi? Kial vi ne diris tion al mi antaŭe?

— Mi ja ofte tion deziris fari, sed, panjo, mi ĝin ne aŭdas ĝis vi foriris kaj ĉio silentiĝis, kaj kiam mi du-tri diversajn fojojn vokis vin, dezirante paroli kun vi pri ĝi, vi ĉiam ekkriis "Estu bona knabino, kaj tuj endormiĝu." Unu fojon, kiam vi revenis en la dormoĉambron, por preni ion, mi ja demandis al vi, kiu ludas tiel belan muzikon, sed vi respondis per, "Ŝ Ŝ, ne vekiĝu," kaj foriris. Krom tio, mi ĉiam forgesas pri ĝi en la mateno, sed tiu muziko, kiun mi ĵus aŭskultis, estas treege bela, kaj mi volis ĝin ne forgesi, ĉar mi opinias, ke mi povos ĝin ludi en la morgaŭa mateno.

— Kiel! ĉu vi efektive povas kompreni tion, kion vi ĵus skribis?

— Tute facile, panjo. Nur rigardu, kaj mi nun kantos ĝin por vi, kaj vi povos observi, kion mi skribis; tiamaniere vi ankaŭ povos ĝin legi.

Tiam per sia dolĉa, infana voĉo, Gojo komencis kanti, dum Lilio ĉiam rigardante la "skribon"

trovis, ke kvankam tio estus nekomprenebla sen interpreto, efektive ĝi esprimis iom pri la muziko. Tiom ĝi esprimis, ke, kiam la sonoj faris kadencon, leviĝante kaj malleviĝante, Ĝojo desegnis liniojn en direktoj supren kaj malsupren; kiam okazis trilo aŭ alia ornamaĵo, Ĝojo faris tordaĵon, kaj kie oni devis plilongigi sonon, tie la linio, kiu reprezentis la sonon, plilongiĝis. Kie ŝi volis akcenti sonon, tie ŝi skribis pli dikan linion.

Antaŭ ol eliri el la ĉambro, dirinte lastfoje bonan nokton, Lilio promesis donaci al Ĝojo kajeron, kiu apartenos sole al ŝi, por ke ŝi enskribu en ĝin laŭvole siajn muzikaĵojn.

CAPITRO XI

Ŝi diris ne multe al la infano pri la afero, sed ŝi tre multe pripensis pri ĝi, kaj, kiel ofte okazas ĉe la patrinoj, ŝi antaŭvidis en revo sian filineton maturiĝanta en faman muzikistinon.

Sed subite ŝi haltigis sin, ĉar ŝi rememoris, ke ofte en sia infanaĝo ŝi mem, revante, ofte aŭskultis ĉielan muzikon, ke kelkfoje ŝi eĉ verkis poemetojn, sed kio venis el tio ?—Jen mi estas, farinte nenion gloran, laborante super ordinaraj, ĉiutagaj devoj, penante perlabori sufiĉon, por bone eduki kaj instruigi miajn infanojn. Ĉu eble al Gojo ankaŭ venos simila estonteco ? Kiu povas antaŭdiri ? Kredeble en ŝi efektiva talento disvolviĝos! Se jes, nenio povos malhelpi ĝian esprimadon, nek la malriĉeco, nek manko de okazo, nek troa laboro; se ĝi efektive ekzistas, ĝi ja montriĝos, ĝi ja vidigos sin.

Tiel ŝi per la pensoj parolis al si, kaj ŝi decidis, ke en ĉia okazo ŝi neniel malhelpos la infanon, faros nenion, kiu povus subpremi la inklinojn al la muziko ; kontraŭe ŝi ĉiam kuraĝigos ŝin, por ke ŝi akiru facilecon pri la arto esprimi la belajn pensojn kaj belajn sonojn, kiuj fluadas al ŝi.

. . . .

Gojo tre amis ĉion belan, sed bedaŭrinde ne volis toleri ion malbelan. Lilio, sidante super sia kudrado, ofte demandis sin :—Kiamaniere mi

povos plifortigi en mia filineto ŝian amon al la belo, sen samtempa plifortigo de ŝia jam tro forta malamo al objektoj, kiuj ne estas belaj, sed pri kiuj estas devo lerni toleremon, se oni ne povas ilin plibonigi?

Kelkfoje ŝi povis fari uzon de iu parolo aŭ ago de la infano, por instrui al ŝi lecionon, ekzemple:

Iu sinjorino loĝanta ĉe Lilio donacis al Gojo belan pupon el vakso, kiun ĉi tiu tre admiris. Ofte ŝi ĝin vestis kaj senvestigis, enlitigis kaj ellitigis, ĉiam karese kaj kun amsento.

Tamen iun tagon, sin okupante per aliaj ludiloj kaj forgesinte la pupon, Gojo lasis ĝin resti tro proksime de la fajro. Reirinte poste, por ĝin preni, ŝi vidis ion, kio estis por ŝi terura vido.

Iom de la vakso sur la frunto fandiĝinte, fluis malsupren sur la vizaĝo, duonkaŝante la okulojn, kiuj per tio ricevis malvirtan, ruzan esprimon tute nesimilan al ilia antaŭe milda, bela esprimo.

Jam nun ĝi timigis la ĝin rigardantan infanon, kiu subite ekploris. Ĵetinte la pupon sur la kamenan tapiŝeton, Gojo iris trovi la patrinon, al kiu ŝi kun larmoj rakontis la malĝojan okazon.

Kunsente aŭskultinte ĉion, Lilio poste akompanis Gojon, por vidi, ĉu la pupo estas rebonigebla. Levinte ĝin, ŝi trovis, ke ĝi ne rompiĝis, falante sur la molan tapiŝeton, tamen ŝi ne povis inklinigi Gojon alrigardi ĝin.

— Mi jam ne amas la pupon, ĝi timigas min, . . . forĵetu!—diris la infano.

Per karesoj Lilio sukcesis iom trankviligi ŝin. Poste ŝi diris:

— Filineto mia, se vi pro falo ricevus sangantan

vundon kaj jam ne aspektus bele, vi venus al mi por konsolo, kion do vi pensus, se mi tiam dirus al vi: foriĝu! mi ne plu amas vin, mi timas vin! —Ĉu tio estus agrabla por vi? Vi pensus, ke mi estas neama, ĉu ne vere?

Verŝante larmojn, Gojo kapjesis.

— Nu, do, ĉu vi ne pensas, ke ankaŭ vi estas neama al Pupeto? Ĉu vi ne pensas, ke vi devus esti afabla kaj kunsenta al kompatinda ĝi, kiu deziras ricevi de vi konsolajn vortojn?

— Mi . . . mi supozas, ke jes!—respondis Gojo.

— Pupeto multe pli bezonas vin nun, kiam vundiĝinte, ĝi sentas sin malsana kaj malpli bela ol antaŭ la akcidento, kaj, Gojo, . . . pri tio, kio okazis, vi mem, kaj vi sola estas kulpa, ĉu ne vere?

Lilio bone sciis, ke, parolante al la pli alta naturo de Gojo, ŝi nepre ricevos respondon. Jam nun ankaŭ ŝi sukcesis, ĉar baldaŭ, kvankam ne vigle, Gojo propravole deglitis de la genuoj de sia patrino, prenis la pupon, sed sen entuziasmo, penis rigardi la jam malbelan, timinspirantan vizaĝon, sed ne povis en la unua momento. Post tio ŝi staris malgaje tutan minuton, kvazaŭ por kolekti siajn fortojn, tiam subite brila, nova ideo eniris ŝian kapon. Kun evidenta malpeziĝo de la ŝarĝo, kun tono de triumfo en sia voĉo, ŝi diris:

— Pupeto jam estas malsana . . . tiel malsana, ke mi devas tuj enlitigi ĝin. Mi kovros ĝin bone kaj varme.

Lilio konsentis, sciante, ke ŝi devas ne postuli

tro multe de la infano. Rapide Gojo metis la pupon en ĝian liton, kie ĝi ĉiam restadis de tiu tempo, escepte kiam, dum kelke da minutoj ĉiutage, Gojo sin devigis ellitigi ĝin. Tamen, farinte tion, ŝi ĉiam apogis ĝin kun la vizaĝo turnita al la fenestro,—" por ke ĝi povu elrigardi sur la straton—" klarigis Gojo al sia riproĉanta konscienco!

Lilio ne plu aludis pri la afero, krom tio, ke ŝi iufoje demandis :—Kiel fartas kompatinda Pupeto?—sed ŝi silente observadis la efikon de la leciono. Post ĉirkaŭ unu semajno, vidinte kiamaniere Gojo kondutis al la pupo, ŝi kaŝe forprenis ĝin, konvinkiĝinte, ke la infano jam sufiĉe suferis.

La sekvintan tagon granda estis la kontento kaj miro de Gojo, kiam ŝi trovis, ke la pupo malaperis. Pri tio ŝi ne volis multon demandi, timante, ke se ŝi tion farus, eble ĝi reaperus sur sia kutima loko! Ŝi opiniis, ke la pupo mortis, kaj ke anĝelo forportis ĝin!

Bona, saĝa anĝelo! Gojo sentis, ke ŝi deziras ĝin danki.

CAPITRO XII

Ofte, sidante super sia kudrado, Lilio dediĉis penson kaj atenton al Gojo, kiun ŝi instruis pri la legado, kalkulado, kaj kudrado, kaj al kiu ŝi iafoje rakontadis historiojn. Tio okazis en la vintraj monatoj. Tamen en la daŭro de periodoj de kelke da horoj ŝi ne povis zorgi pri la infano, kiu kaŭze de tio devis alkutimiĝi al sinamuzado, pensi originalajn pensojn, vivi grandmezure en si mem, esti rimedoplena.

Ŝi ne estis gaja, petolema knabineto, sed ŝin ĉirkaŭis certa trankvileco kaj ĝojo, kiuj radiis al ĉiuj en ŝia apudesto. Tre impresebla, ŝi forte sentis ne nur plezuron, sed ankaŭ doloron.

Povas esti, ke la nomo de Gojo havis ian influon sur la infanon, kiel Lilio esperis, nomante ŝin.

Oni provu elparoli la vorton akre aŭ kolere, kaj troviĝos, ke ĝi ne estas facile farebla; oni preskaŭ ne povas ne karesigi la voĉon, dirante "Gojo."

Certe estas, ke preskaŭ ĉiu agadis milde al Gojo, atendante de ŝi nenion krom bono. Kompreneble tio helpis ŝin en ŝia jam sen tio dezirado al la bono.

Nur malmultaj homoj povas aŭ volas serĉadi sub la supraĵoj de la vivo, dezirante kompreni almenaŭ iomete pri ĝiaj profundaĵoj.

Gojo estis unu el tiaj malmultaj. Kiam ŝi

ankoraŭ estis juna knabineto, ŝi inklinis taksi la homojn. Konatiĝante kun iu, ŝi serĉe enrigardis ties okulojn kaj tuj faris decidon pri la karaktero.

Bedaŭrinde, antaŭ ol la patrino kaj la vivo mem instruis ŝin pli bone, ŝi estadis kvazaŭ fermita libro, donante nenion krom tio postulata de la ĝentileco al tiuj, pri kiuj ŝi pensis, ke ili estas nesinceraj, escepte se iu suferis; en tiu okazo, forgesante ĉion krom la suferado kaj bezono, ŝi plenvole montris kunsenton kaj deziron helpi.

Jaluza tendenco ankaŭ evidentiĝis en Gojo, kiam ŝi estis tre malgranda, sed tio forpasis, pro la severaj lecionoj ricevitaj de ŝi. Jen ekzemplo:

Florenco kaj Filipo revenis hejmen por tie pasigi la unuan libertempon de kiam ili eniĝis en la edukejon.

Kompreneble, ĉe ilia reveno ili havis multon, pri kio ili deziris rakonti al la patrino, kiu egale deziris aŭskulti ĉiun detalon de ilia lerneja vivo. Sekve de tio, ili ricevis la pliparton de la atento de Lilio dum la unuaj tagoj post ilia reveno.

Tio tute ne estis agrabla al Gojo. En la daŭro de tri monatoj ŝi ricevadis la ĉefan atenton de la patrino, kaj nun ŝi ribelis en si kontraŭ la ŝanĝo.

Multfoje observinte kaj aŭskultinte, kiel avide kaj ame la patrino interparolas kun Florenco kaj Filipo, ŝi subite eksaltis antaŭen, sidigis sin sur la genuoj de Lilio kaj diris duontriumfe, duonbatale al la frato kaj fratino:

—*Mia* panjo! *mia* panjo!

—Ŝi tute ne estas via panjo, ŝi apartenas al ni—venis la tuja rediro de Filipo.

Pli ol unu fojon Gojo agis tiamaniere; tial

unu tagon, kondukinte ŝin flanken, Florenco diris:

— Pli bone vin gardu pri viaj vortoj kaj agoj, ĉar verdire vi ne estas nia fratino, kaj nia patrino efektive ne estas via! Vi estis malriĉa, kompatinda infaneto, kies propra patrino ne deziris teni vin; tial, sciante kiel bonkora estas nia patrino, ŝi vin alportis kaj lasis sur la ŝtuparo ekster nia domo; poste nia patrino, trovinte vin, enportis kaj nur pro kompato tenadas vin. Jen, vi jam scias ĉion, kaj eble vi ne plu diros: "mia panjo!"

— Tio ne estas vero! Mi ne kredas ĝin— respondis Gojo.

— Kredu ĝin aŭ ne kredu laŭvole, tio ne faros ĝin nevera; sed se vi ne kredas ĝin, kiamaniere klarigi la diferencojn inter via eksteraĵo kaj nia?

— Tamen mi ne kredas ĝin. Mi demandos panjon.

— Ho jes, nepre demandu ŝin; diru al ŝi tion, pri kio mi sciigis vin, iru nun tuj, denunculino!

Kompatinda, malgranda Gojo! Ŝi ja estis malgranda kaj impresebla, tamen ŝi devis ricevi tiun ĉi baton. Dum iom da tempo ŝi kvazaŭ perdis la ĝojon el sia vivo.

En la komenco ŝi ne povis kredi la diron, sed la penso, ke eble ĝi estas vera, ne povis ne ripete veni al ŝi en la kapon.

Rimarkinte la ŝanĝon en la infano, sed ne komprenante la kaŭzon, Lilio timis, ke eble malsano trafis ĝin. Tamen post du-tri tagoj ĉio klariĝis, ĉar Gojo ne povis plu elteni la necertecon.

— Panjo—ŝi demandis al Lilio—ĉu mi vere estas via filineto?

— Vi ja estas, mia kara, sed kia demando!

— Jes, mi scias, ke mi jam apartenas al vi, sed ĉu mi vere, reale . . . ĉiam . . . apartenis . . . tiel same, . . . kiel Florenco kaj Filipo? . . . aŭ . . . aŭ . . . ĉu iu . . . nur donacis min al vi . . . lasante min sur pordoŝtupo . . . kaj vi . . . prenis min . . . tiamaniere?

La lipoj de Gojo tremetis, ŝia voĉo mallaŭtiĝis preskaŭ ĝis flustro: tiom ŝi dependis de la respondo al tiu ĉi demando. Ŝi kredis, ke ŝia patrino diros al ŝi la veron, ĉar Lilio kutimis respondi, aŭ almenaŭ celis respondi al demandoj faritaj de siaj infanoj, plene kaj vere, krom kiam ŝi sentis, ke tio estus neprudenta. Tiuokaze ŝi diris al ili, ke ili ankoraŭ estas tro junaj por povi kompreni.

— Venu al mi, Gojo kara,—diris Lilio kun profundaj doloro kaj amo en la voĉo kaj okuloj, kliniĝante kaj invite etendante la brakojn al sia malgranda infano, kiu subite alkuris kaj mallaŭte ploris sur la brusto de la patrino.

— Vi ja efektive estas mia infano ĝuste tiel, kiel estas Florenco kaj Filipo. Kiel ilin, tiel ankaŭ vin Dio donis senpere al mi. Plue, vin mi nomis per aparte bela nomo, ĉar . . . kiam vi venis al mi, estis tre malĝoje al mi, kaj mi esperis, ke vi alportos al mi ĝojon . . . kaj etulino mia, tion vi ja faris. Nur imagu al vi, kiel malĝoja kaj soleca mi estus sen mia kara Gojo, kiam Florenco kaj Filipo devis forestadi en la lernejo!

Parolante, ŝi alpremis la filineton al sia brusto, dum ĉe la koro ŝi sentis akran doloron. Instinkte ŝi kunsentis kun la infano kaj koleris tiun, kiu venigis tian ideon en ĝian kapon; plie, tio rememorigis ŝin pri propra suferado, en tiu mizera tempo antaŭ kvin jaroj: ĉu neniam oni permesos al ŝi forgesi pri ĝi?

— Kial vi imagis al vi, ke vi ne estas mia propra infano, Ĝojo?

— Mi ne bone scias—rediris la infano—iu diris tion al mi.

— Ĝojo—respondis Lilio—devas esti, ke vi scias, kial vi tion pensis, aŭ kiu parolis al vi pri la afero, kaj vi ne volas kaŝi ĝin antaŭ mi, ĉu ne vere? Ĉu vi volas kaŝi sekreton antaŭ via patrino?

— Tiam Ĝojo klarigis la aferon .

. . . .

Lilio parolis kun Florenco, demandante:

— Kion vi diris al la malgranda Ĝojo, por maltrankviligi ŝin?

— Mi! panjo, mi nenion diris!

— Pripensu momenton, mia infano, mi ne aludas pri io, kion vi diris hodiaŭ al ŝi, sed ĉu estas vere, ke vi iam diris al ŝi, ke ŝi ne estas mia filino?

— Jes, panjo, tio estas vera, sed mi ne povis ne sciigi tion al ŝi, ĉar ŝi faris malplezuron al mi kaj Filipo, alproprigante vin al si, kaj kondutante kvazaŭ ni havus neniajn rajtojn pri vi.

— Sed Florenco, kiel vi povis elpensi tian kruelan rakonton, ĉar ĝi tute ne estas vera, kaj

tion vi scias. Ĝojo estas mia propra filino ĝuste tiel, kiel vi estas.

— Jen kial,—diris Florenco.—Ĉu vi memoras la tempon, kiam mi gastis ĉe la avino? Iun posttagmezon venis sinjorino por fari viziton al la avino, kaj ŝi turmentis min per demandoj, same kiel plenaĝuloj ofte faras al ni infanoj, pensante, ke ili amuzas nin, kvankam pli ofte ni nur deziras, ke ili ĉesigu tian demandadon, ĉar ĝi nur tedas nin. Nu, do, ĉi tiu sinjorino diris inter aliaj aferoj: "Ĉu vi havas malgrandajn fratinojn aŭ fratojn?" Kompreneble mi diris, "jes, mi havas unu fraton kaj unu fratinon," kaj ĉar ŝi plu demandis, mi plu respondis, sciigante iliajn nomojn kaj aĝojn; sed ĉe tio, la avino tre malplezure aspektis, kaj, interrompante, diris rapide, "Efektive ŝi nur havas fraton, ĉar la infano, kiun ŝi nomas fratino, estas orfino; mia filino kompatis ĝin, kaj, savinte ĝin de orfejo, nun edukas ĝin, kvazaŭ ĝi estus ŝia propra." Mi ja memoras, ĉar, aŭskultante, mi tre miris. Post la foriro de la sinjorino, la avino riproĉis min, kio ne estis justa ŝiaflanke, ordonante, ke mi neniam denove elparolu la nomon de Ĝojo, dum mi gastas ĉe ŝi. Ŝi plue diris, ke ĉiu scias, ke mi havas nur fraton, kaj ke malriĉa virino lasis Ĝojon sur la porda ŝtupo, kaj ke vi pro kompato adoptis ŝin; kaj patrino, verdire, aŭskultante mi diris al mi, "Ĝuste tion la patrino ja farus." Tial, kiam Ĝojo ĉiam paroladis kaj kondutis, kvazaŭ vi apartenas sole al ŝi, kvazaŭ Filipo kaj mi neniajn rajtojn pri vi havas, mi koleris kaj ĉion klarigis

al ŝi. Se ĝi ne estas fakto, por kio la avino ĝin diris? Mi ofte rimarkis, ke ŝajne ŝi ne amas Gojon tiom, kiom ŝi amas Filipon kaj min, kaj kiom ni ĉiuj amas ŝin. Pli plaĉus al mi, se ŝi efektive estus nia propra fratino, ĉar mi ja amas ŝin, kvankam iafoje ŝi estas ĉagreniga.

Tre malfacilan taskon havis Lilio, kiu bezonis ĉiujn siajn fortojn kaj sinregadon. Kredante, ke la infano diris al ŝi la veron, post momenta pensado ŝi decidis, ke ŝi ne forklarigos la mensogon de la avino. Tamen ŝi faris sugestian demandon.

— Ĉu vi estas certa, ke vi ne sonĝis ĉion ĉi tion?

— Mi ja estas certa—respondis Florenco, malgaje rigardante la dolorplenan vizaĝon de sia patrino. Ŝi ne memoris antaŭe vidi ŝin tiel aspekti.

— Florenco, tio, kion vi ĵus rakontis al mi, tre dolorigas min, sed mi almenaŭ estas pli kontenta de kiam vi klarigis ĝin, ĉar mi jam komprenas, ke vi ne estas tiel riproĉinda, kiel mi en la komenco opiniis. Verŝajne vi kredis tion, kion vi diris al Gojo. Tamen ja dolorigas min pensi, ke vi kapablas tiamaniere riproĉi kaj malfeliĉigi vian fratineton, kiom ajn vi kredis, ke ĝi estas vera! Ŝi ja estas nur kvinjara, dum vi havas dek tri jarojn. Vi ankoraŭ estas tro juna kaj nematura, por ke vi komprenu ĝuste, kiel kaj kial Gojo estis sendita al ni,—eble kiam vi estos pliaĝa, se vi tion deziros, mi klarigos la aferon al vi,—dume estu certa, ke Gojo efektive estas mia infano kaj neniam havis iun patrinon krom mi. Nu, kara, mi vidas, ke vi jam bedaŭras viajn

nepripensitajn vortojn, kaj mi deziras, ke vi ja bedaŭru ilin sufiĉe, por ke ili servu al vi kiel grandvalora leciono, sed ne permesu, ke pro ili vi fariĝu tro mizera. Kisu min, mia infano, kaj iru.

ĈAPITRO XIII

Tiuj kvin jaroj estis por Lilio longa, neinterrompita penado.

Krom la lastsezonaj vestoj, onklino Anna sendadis al ŝi 50 spesmilojn kiel kristnaskan donacon; ankaŭ la fratino Alico kelkfoje sendis al ŝi malgrandan monsumon, sed, ekster tio, neniu ŝin helpis. Ŝi estis tro fiera, por ke ŝi petu almozojn de la parencoj. Se iam ŝi inklinis sciigi iun parencon pri siaj bezonoj, ŝi devis nur rememorigi sin pri io, kio okazis en ŝia juneco, dum vizito ĉe onklino Maria kaj onklo Tomĉjo.

Elrigardante el la fenestro, sur la orde prizorgitan ĝardenon, onklino Maria kaj Lilio ekvidis malriĉan parencinon alproksimiĝi.

—Ho, ve! Ho, ve!—ekkriis neplezure la onklino—Jen ree venas la kompatinda kuzino Eva! Kion nome ŝi povas deziri ĉi tiun fojon?

Lilio tiam havis nur dek ses jarojn, sed kiel la vortoj, tiel ankaŭ la tono per kiu ili estis elparolataj, faris sur ŝin fortan impreson, kaj ŝi silente promesis al si neniam peti almozon de kiu ajn.

Ŝi ne rompis la promeson. Parolante aŭ havante kiajn ajn rilatojn kun la parencoj, ŝi firme evitis ĉian aludeton pri la malfacilaĵoj, kun kiuj ŝi devis ĉiutage bataladi.

La parencoj ne povis ne scii, ke tiaj malfacilaĵoj ekzistas, sed ili ne serioze pripensis ilin. Ili

plivolis ne memori, ke nefortika virino, ŝirmite kontraŭ senpera rilato kun la maldelikata, malindulga mondo, kiel Lilio estis ĝis la morto de sia edzo, ne povas facile enspezi ĉion necesan por tri infanoj kaj ŝi mem. Tamen Lilio iam estis speciala favoratino de la parencoj. Se iam ili ekpensis pri ŝi, tio estis nur por silente gratuli sin pro tio, ke ŝi ne maltrankviligas ilin, nudigante siajn bezonojn, zorgojn kaj dolorojn.

Du el ili: onklo Tomĉjo kaj onklino Maria, kiuj estis bonstataj se ne efektive riĉaj, venis unu fojon neatendite al Lilio, sed ili nur deziris havigi ion al si mem.

En iliajn kapojn venis la penso, ke estus tre agrable havigi al si en la hejmon malgrandan knabinon. Kiel ŝi amuzus ilin, kiom amus! Kiel dolĉe estus por ili esti nomataj patro kaj patrino! Ili decidis serĉi belan, interesan etulinon kiu jam transpasis la klopodigan aĝon, en kiu ŝi kredeble rompus la noktan ripozon kaj alie interrompus ilian komforton.

Kompreneble ili intencis agi rilate al ŝi tre bone kaj favore; doni al ŝi abundon da ludiloj kaj elegantajn vestaĵetojn, dungi por ŝi vartistinon, kiu povos preni ŝin ĉiam, kiam ne estos oportune al ili teni ŝin kun si. Ili eĉ decidis testamenti al ŝi sian tutan havon, se ŝi entute kontentigos ilin!

Ili diris unu al alia:—Kiel danka estos iu kompatinda malriĉa virino, kiam ŝi havos unu infanon malpli por nutri, vesti, kaj alie prizorgi!—sed ili forgesis aldoni: kaj unu animon malpli, kiu amos ŝin.

De tio ili rapide pasis per la pensoj al Lilio kaj Ĝojo.

— Trafite!—ekkriis onklino Maria—se nur la infano estas bela kaj ama kun agrabla maniero; se ŝi ne estas malfortika, kaj ne havas iajn malbonajn inklinojn.

— Mi memoras, ke kiam ni lastfoje vidis ĝin, la infaneto ne estis bela, sed tio estis antaŭ du jaroj, kiam ĝi havis nur kelke da semajnoj. Eble ĝi jam aspektas pli alloge.

— Povas esti, ke ĝi jam ne vivas! ni iru al Lilio, ne antaŭe informinte ŝin pri nia vizito, por mem vidi, antaŭ ol kompromiti nin—diris plue onklino Maria.

. . . .

Tiel okazis, ke unu matenon, entuziasmaj pri sia espero, ili veturis al Riverton kaj alvenis la domon de Lilio.

Malferminte antaŭ ili la pordon, la juna servantino kondukis ilin en la manĝoĉambron, ĉar la saloneto estis jam okupita. Kiam la pordo fermiĝis, ili ekvidis Ĝojon mem, genuantan sur la planko kontraŭ la malfermita ŝranko de la telermeblo. Ĉe ilia eniro la kapo kaj supra parto de la korpeto estis interne de la ŝranko, sed aŭdante la sonojn de voĉoj kaj la bruon de fermiĝanta pordo, tuta Ĝojo eliĝis el la ŝranko kaj sin turnis, por vidi, kiuj tio estas.

Efektive ŝi aspektis pentrinde! En ŝiaj brilaj okuloj montriĝis serioza, mira esprimo, sed nenia signo de honto pri ŝia ŝteleto; la buŝeto estis ŝmirita per framba konfitaĵo, dum pluaj signoj

de ŝia ĵusa agrabla okupo troviĝis sur la vesteto.

Onklino Maria kaj onklo Tomĉjo tuj amis la infanon kaj senhezite decidis, ke Ĝojo estas adoptinda, kaj ke ili akceptos ŝin.

— Kara, eta ŝtelistino, vi!—ekkriis onklo Tomĉjo, neŝaĝe ekirante en la direkto al la infano por enbrakigi ĝin, neatentante la konfitaĵon, ĝis onklino Maria sin intermetis ĝustatempe, kriante:

— Haltu, haltu, Tomĉjo, alie vi tute malpurigos la vestaĵojn per la glueca konfitaĵo!

Poste, priparolinte aliajn, ordinarajn aferojn kun Lilio, onklino Maria proponis, ke ĉi tiu transdonu Ĝojon al ŝi, por ke ŝi kaj la edzo adoptu ŝin.

Sed ilia tasko ne estis tiel facila, kiel antaŭe ili pensis. Fine ili devis foriri sen ia eĉ la plej malgranda espero, ke Lilio disiĝos de la infano.

ĈAPITRO XIV

Ofte Lilio ne sciis, kiamaniere ŝi povos pagi siajn ŝuldojn. Ŝi devis vendi sian malgrandan aron de juveloj. Malaperis unu ornamaĵo post alia, ĝis fine ŝi tenis por si nur tri: nemultekostan broĉon kaj la du ringojn, kiujn la amata edzo surmetis sur ŝian fingron, unu ĉe la fianĉiĝo, la alia ĉe la edziniĝo.

Ŝi estis danka al Dio, ke ŝi ne devis vendi iujn el la mebloj; eĉ la pianon ŝi devigis sin teni, prave decidinte, ke tio estas bona ilo, por helpi al ŝi gajni vivrimedojn.

Tamen, kvankam la najbarinoj ne povis diveni pri ĝi, ofte Lilio travivis tagojn, nesciante, de kie venos la morgaŭa provizo de nutraĵo, sed iel ĝi ja venis.

Ofte promenante sur la trotuaro, survoje por reporti kudraĵon, kiun en la vintro ŝi faradis por klientino, loĝanta en la aristokrata parto de la vilaĝo, ŝi ĝojis, se ŝi trovis diskuŝantajn pecojn de karbo, restantajn post senŝarĝiĝo de karboveturilo.

Si kutimiĝis ilin serĉi apud ĉiu fera rondaĵo, kiu troviĝis en la trotuaro, kontraŭ multaj domoj, por kovri la aperturon kondukantan al la karbokelo malsupre.

Kiom da honto kaj sinhumiligo tio kostis al Lilio, oni ne povas realigi al si. Kiam preterpasantoj tie estis, ŝi malakcelis sian paŝadon aŭ

marŝis preter la celata loko, kaj revenis poste por kolekti la dezirindajn nigrajn pecojn, kiam jam neniu estis rigardanta. La karbo estis tre multekosta, kaj iom severaj estis kelkfoje la vintroj.

Post la unuaj semajnoj pasigitaj en Riverton, ŝi neniam malŝparis monon por hejtoligno. Aŭ infano aŭ juna servistino devis tion kolekti sur la sablaĵo, kie ĉiam estis trovebla tiom, kiom ili deziris el tio, kio restis post la defluo de la tajdo.

Ordinare ŝiaj loĝantoj pagis ŝin sufiĉe bone kaj ŝin traktis kun respekto, sed iufoje okazis, ke iu venis, tre klopodigis ŝin, postulis karajn manĝaĵojn, kaj poste foriris sen pago de eĉ unu spesmilo.

En Riverton la manĝaĵoj estis tre karaj; se Lilio povus iri al la Liverpola foiro, ŝi povus aĉeti multe pli malkare. Tamen ŝi ne povis malŝpari la tempon necesan por tien iri, nek estis ŝi sufiĉe fortika, por ke ŝi portu pezajn ŝarĝojn, kiel facile povis fari la najbarinoj, venante returne de la foirejo.

Sed, kompense, la luprezo por domoj ne estis proporcie kara, kaj tial ŝi devis nur pagi po kvincent spesmiloj jare por la mezgranda domo.

Malfeliĉe la luiganto rifuzis fari riparojn, kaj ĉar Lilio devis nepre konservi la domon bonorde kaj alloge tial, ke tio estis por ŝi la plej bona formo de rekomendiĝo, ŝi mem tapetis la murojn kaj kolorigis la lignaĵojn en du malgrandaj litĉambroj.

Koncerne la laboron mem la rezultato estis sufiĉe laŭdinda, sed pro tio, ke Lilio poste malsanis dum tuta semajno pro la nekutima laboro, ŝi decidis, ke fari ree tian laboron ne utilus al ŝi.

ĈAPITRO XV

Estis varma premaera tago, kaj la infanoj, nesciante la kaŭzon, estis pli inklinaj al malpaciĝo, ol ordinare.

Ili grupiĝis sur la sablaĵo, la plej aĝaj en kelka distanco de Ĝojo kaj Nora, kiuj estis konstruantaj kastelon el sablo.

Enuigitaj de ia ĵusa okupo, la pli aĝaj infanoj komencis diri: kion nun fari.

— Mi scias kion fari—diris Ella, la kamaradino de Florenco—ni ludu pilkon. Kiuj volas ludi pilkon?

— Mi!—senhezite respondis ĉiuj el la grupo de pliaĝuloj.

— Nu, do, kiu havas la pilkon?

— Mi pensas, ke Nora ĝin havas, ĉar antaŭ ne longe ŝi kaj Ĝojo estis ludantaj kun ĝi—respondis Filipo.

— Mi tuj havigos ĝin al ni—diris Ella, kaj ekkriis:—Nora, No-ra, ĵetu al mi la pilkon, ni deziras ludi kun ĝi.

La pilko troviĝis apud Nora, kiu tuj kaptis ĝin per ambaŭ manoj kaj ekkriis:

— Ne, mi ne volas; ĝi estas mia pilko.—Tiel estis la respondo de tiu bela kvinjarulino kun ronda vizaĝo tiel ruĝeta kaj blanka, kiel pomfloro, kaj kun belaj, grandaj okuloj tiel bluaj, kiel miozotoj, kaj franĝitaj per kurbaj, longaj, orkoloraj okulharoj. La ordinare belformaj

brovoj kaj dolĉe aspektantaj okuloj kaj buŝo kuntiriĝis de malbona humoro.

— Ne estu tiel malagrabla, Nora; vi jam ne uzas la pilkon, kaj ni redonos ĝin al vi tuj, kiam ni finos ludi kun ĝi. Estu bona knabineto kaj donu.

— Ne, mi ne volas; mi kaj Gojo bezonas ĝin. Ni mem pilkludos post unu minuto.

— Donu ĝin, kara Nora—flustris Gojo—ni ne ankoraŭ finis konstrui nian kastelon, kaj ni povos poste ludi butikon.

— Nu, do—plue diris Ella—vi kaj Gojo povas ludi kune kun ni, se vi deziras . . .

— Mi ne deziras. Mi volas teni mian pilkon ĉe mi!—diris Nora, preskaŭ plorante.

Provinte mildajn metodojn havigi al si la pilkon, Ella alproksimiĝis al la fratineto, kiun ŝi malpacience frapis sur la vango, dirante malestime:—Tenu do vian pilkaĉon, vi malagrabla, egoista knabinaĉo! ni jam ne akceptus ĝin, eĉ se vi genue petus nin!

Ĉe tio la aero disŝiriĝis per akra kriego, kaj Nora, stariĝinte, komencis kuri en la direkto al la domo, ĉiam plorante kaj vokante la patrinon.

— Vi ne devus tion fari—diris samtempe Filipo Ĉester kaj Ruperto, la pli aĝa frato de Ella kaj Nora—ŝi ja estas nur etulino.

— Jen kion vi faris!—ridante diris Vilĉjo, la dua frato—Vi ricevos ion, kio ne plaĉos al vi, kiam vi revenos hejmon. Mi ne dezirus stari en viaj ŝuoj!

Subite Florenco, kiu staris senvorte dum ĉi tio okazis, diris al sia kamaradino :

— Vi faris bone, punante la plorbubinon, ŝi plene meritis ĝin, ŝi plendkriadas pri la plej bagatelaj aferoj! Ne tia estas mia fratineto, kiu ne ekkrius, se mi frapus al ŝi ambaŭ vangojn per mia tuta forto!

Gojo staris apude kun serioza mieno, ĝis aŭdiĝis la neatenditaj vortoj de laŭdo de la fratino. Ĉe tio radianta rideto kurbigis ŝiajn lipojn kaj briligis la okulojn, sed nur en la daŭro de momento.

Antaŭ ol iu povis diveni ŝian intencon, Florenco iris al Gojo, levis la manon kaj forte frapis jen unu palan vangeton jen la duan.

— Jen, vi vidas!—ŝi triumfe ekkriis, rigardante Gojon kaj poste turnante sin al Ella—*via* fratineto eble estas pli bela, sed mia estas la pli kuraĝa!

Kompatinda Gojo! Ambaŭ vangoj jam ne palaj montris ruĝan makulon, kaj ili pikis tiel, ke nur per la plej granda penado ŝi povis enteni la larmojn, kiuj plenigis la okulojn, kaj la indignajn vortojn, kiuj venis al la lipoj sed ne trapasis ilin.

Dum kelke da momentoj ŝiaj sentoj estis malfacile regeblaj; ŝi tre deziris redoni la baton al Florenco, sed tuj kiam ŝi levis la okulojn kaj enrigardis tiujn de Florenco kaj aŭskultis la karajn vortojn, kiuj proklamis, ke ŝi estas pli laŭdinda, ol bela Nora, la kolero kaj indigno estingiĝis.

— Mi do ankaŭ havas ion admirindan, kvankam mi ne estas bela, kiel Nora.

Bone sciis Gojo, ke ŝi mem ne estas bela. Ankoraŭ en tiu mateno, aŭdinte ies rimarkigon

pri la nedubebla beleco de Nora, ŝi la unuan fojon demandis sin: Kiel mi aspektas? Ĉu ankaŭ mi estas bela? Mi ja esperas, ke mi estas almenaŭ beleta! Tuj kiam ŝi tion ekpensis, ŝi rapide iris en la litoĉambron de ŝia patrino, metis seĝon kontraŭ la tirkestaro, kaj, stariĝinte sur ĝin, esplore rigardis sin reflektatan de la spegulo.

Post unu longa rigardo ŝi deturnis sin kun prema sento de malkontento, miksita kun sento de malsupereco.

— Ne—ŝi diris al si—mi tute ne estas bela, mi neniel similas malgrandan Noran! Mi ne havas longajn, orajn buklojn, miaj mallongaj haroj estas preskaŭ nigraj kaj estas tute sen bukloj.

Krom tio ŝi vidis malbelan mankon, kie hieraŭ estis dento.

Estis karakterize de Ĝojo pensi pri Nora, ke ŝi estas malgranda, kvankam efektive ambaŭ infanoj havis preskaŭ saman grandecon. Sed Nora ne estis tiel originala kaj memdependa, kiel Ĝojo, kiu ne estis tiel dorlotita kaj kiu pliparte devis amuzi sin.

Kiam la infanoj estis duope farantaj sian tualeton antaŭ la vespermanĝo en tiu sama tago, Florenco aliris al Ĝojo kun io brilanta en la mano kaj diris:

— Ĝojo, mi timas, ke mi tre dolorigis vin, kiam mi vangofrapis vin tiel forte hodiaŭ en la ĉeesto de la aliaj, sed mi faris ĝin ne antaŭe pripensinte. Mi tiel ekkoleris kontraŭ tiu plendkriema pupo Nora, kiun ĉiu admiras! Se vi estus plorinta, kiam mi vin frapis, vere mi ne scias, kion mi

farus, mi tiel hontus! Tamen vi eĉ ne ekkriis, kaj mi tiel kontentiĝis pri tio, ke mi volas doni al vi ĉi tiun broĉeton, kiun vi ĉiam admiris. Mi poluris ĝin, kaj vi povos de nun surporti ĝin kaj ĉiam teni kiel vian propran!

Tiel dirante, Florenco alpinglis en la kolumo de la vesteto de Ĝojo malgrandan Maltan krucon el arĝento, bele gravuritan.

CAPITRO XVI

Filipo staras en la fundo de ĉi tiu rakonto. Li estis dekjarulo kiam la epizodo de la pilko fariĝis, kaj estis fortika belforma knabo.

Li tre similis Florencon per la trajtoj kaj koloro, sed la esprimo estis nesama. La okuloj estis pli ŝanĝiĝemaj kaj ne aspektis kalkulemaj, kiel iufoje okazis ĉe Florenco.

Li havis malkaŝeman, knaban vizaĝon montrantan firman volon, la mieno kaj parolmaniero estis iom memfidaj kaj fanfaronaj, kaj li estis ĉiam preta partopreni en ĉiuj bataloj, petolaĵoj kaj amuzoj, kiuj okazadis, se nur tio ne kaŭzis turmenton al bestoj aŭ al tiuj malpli grandaj ol li mem.

Li havis prudenton, kiu helpis lin eliĝi el multaj embarasoj, kaj lin oni povis pli influi per argumentado, ol per batoj aŭ minacoj.

Nur unufoje Lilio punbatis lin, ĉar verdire ŝi ne aprobis tian punmetodon.

En momento de nerva kolereto ŝi frapis lin neforte sed malpacience.

Tuj la okuloj de Filipo ekflamis, liaj vangoj ruĝiĝis, kaj li kunpremis la pugnojn, tenante ilin al la flankoj.

— Patrino — li diris sufokiĝe — Vi neniam denove frapu min! Prefere elpensu alian manieron puni min. Mi . . . mi . . . mi preskaŭ frapis vin redone!—Dirinte tion li forkuris, kaj ne lasis vidi lin ĝis kelke da horoj forpasis.

Kiam li la unuan fojon vizitis knaban lernejon, li forte rifuzis, ke oni tien lin konduku.

— Patrino!—li diris—Se vi akompanus min, oni pensus pri mi, ke mi estas infaneto!

Ĉe la lernejo oni faris al li multajn demandojn, inter ĉi tiuj:—Kia estas via patro?

— Mia patro mortis—respondis Filipo, al kiu la demando ĝis nun ne prezentis sin, sed kiu tamen faris tujan decidon eldemandi la patrinon pri ĝi, kiam li revenos hejmen.

Dume lia fantazio jam proponis kontentigan ideon, kiun li donis sen perdo de tempo.

— Mia patro mortis, sed li estis la plej alta el ĉiuj viroj kaj havis la plej laŭtan voĉon!

Pli ol unu fojon li ŝirmis sensaĝan Kanjon: kompatinda tridekjarulino, kies korpo kreskis ĝis grandeco de tiu de ordinara virino, dum ŝia spirito restis kiel tiu de infano.

Ŝiaj haroj estis disigitaj sur la mezo de la kapo, streĉe tiritaj for de la vizaĝo kaj ligitaj malantaŭe en tuberon.

Ŝi portis longan, malhelan veston el katuno kun blanka antaŭtuko kaj pajla, larĝranda, infana ĉapelo, ligita de elasta laĉo sub la mentono. En la mano ŝi kutime portis infanan fosileton el ligno kaj ladan siteleton.

Ĉiufoje kiam la knaboj kaj knabinoj ekvidis tiun ĉi kompatindan virinon, kies patrino batadis ŝin tiel same, kiel ŝi batus malbonan knabineton, ili ĝoje ekkriis kaj komencis persekuti ŝin, dirante:

— Rigardu, jen sensaĝa Kanjo!

Iafoje ili ĵetis al ŝi ŝtonojn aŭ aliajn ĵetaĵojn dum ŝi forkuradis. Alifoje, grupiĝinte ĉirkaŭ ŝi,

ili faris al ŝi multe da sensencaj demandoj, kaj, ricevinte respondojn, ili ekridegis.

Ordinare, kiam ili demandis ŝin pri io, sensaĝa Kanjo prenis timan aspekton, ŝovis fingron en la buŝon kaj, kun sensignifa rideto sur la lipoj, naive respondis: "Mi ne scias!"

Tamen tio ne ĉiam okazis. Kelkfoje ŝi forte koleris anstataŭ timi, siblis tra la dentoj kaj kraĉis al siaj junaj persekutantoj, sin ĵetegis al ili, kaj se ŝi sukcesis kapti unu el ili, tiu ĉiam poste evitadis pluan kapton, ĉar la kompatinda virino havis eksterordinaran forton kaj sciis sovaĝe defendi sin per la manoj, piedoj kaj ungoj.

Ĝuste tion la infanoj sekrete esperis kaj timis. Kompreneble ĉiu esperis eviti kapton.

Ili bone sciis, ke la kolera eksplodo baldaŭ estingiĝos kaj samtempe la eksterordinara elmontro de forto, lasante kompatindan Kanjon malforta kaj tremanta.

Unu tagon, kiam la infanoj turmentadis Kanjon, kiu pli ol unu fojon vane provis kapti unu el ili, Filipo subite konstatis, kiel kruele li kaj liaj kunuloj agas. Tial li iris antaŭen, parolante per laŭta, ordona voĉo:

— Sufiĉe! Ni ĉesu! Ni ne plu turmentu ŝin. Se iu ajn ankoraŭ unu fojon turmentos ŝin, mi forte pugnobatos lin!

Pro miro la areto de infanoj ĉesis turmenti Kanjon, turnante sin por sciiĝi, kiu interrompis la amuzon.

Filipo estis nur dekjarulo, sed li staris elrektiĝinte, liaj okuloj fajre brilis, kaj liaj lipoj ricevis decidan esprimon.

La plimulto de la infanoj nenion kontraŭdiris, sed unu el ili, rapide retrovinte sian aplombon, ekkriis:

— Kaj kiu, nome, vi estas? Almenaŭ sur min vi ne kuraĝas meti manon!

— Mi ne kuraĝas meti manon sur vin?—rediris Filipo—se vi ree penos ektuŝi kompatindan Kanjon, vi tuj vidos, ĉu mi kuraĝas aŭ ne!

— Nu do, jen!—respondis la dua, alkurante al Kanjo kaj ektirante ŝian antaŭtukon, kiu cedis al la ektiro, kaj granda ŝiro fariĝis en ĝi.

Ĉe tio la larmoj ankoraŭ pli rapide sin sekvis sur la vangoj de la virino, kiu nun antaŭsentis la batojn, kiujn ŝi ricevos de la patrino.

— Nu, ni vidu, kion vi faros al mi!

— Jen kion, kaj plue jen!—tuj respondis Filipo, per pugnigitaj manoj forte frapante sian kontraŭulon, kiu estis eble pli granda, ol li mem.

Tiamaniere la du knaboj estis elbatalantaj la aferon meze de grupo de junaj interesatoj, kies aprobaj krioj ĉiam instigadis ilin al pluaj penoj.

Tamen preterpasanta sinjorino, haltinte, interrompis la batalon per kunsenta demando, en kiu estis nenia riproĉo, kvazaŭ batalo inter knaboj estis natura afero.

Ĉar la sinjorino montriĝis takta kaj bonkora, post ne longe ŝi ricevis promeson de ambaŭ knaboj, ke ili ne rekomencos la pugnan interbatadon. Trankviliĝinte Kanjon, la sinjorino akompanis ŝin al ŝia hejmo, por evitigi al ŝi la timatajn insultojn kaj punbatojn de la patrino pro la disŝirita antaŭtuko.

De tiu tempo kompatinda Kanjo pensis pri

Filipo, ke li estas ŝia amiko kaj defendanto. Ŝi eksciis, kie li loĝas, kaj kiam li forestadis en edukejo, ŝi ofte aperis antaŭ la kuireja pordo, dezirante vidi Lilion.

Ĉe la unua renkontiĝo, trovinte ke Lilio estis milda kaj kunsenta, Kanjo diris kun sensignifa rido:

— Sinjorino Ĉester, kiam revenos via Filipo?

— Ho, post longa tempo! Kial vi demandis tion?

— Li ne lasas, ke la knaboj incitu min!

Kanjo elpensis ruzan motivon por plilongigi ĉi tiujn vizitetojn.

Alproksimiĝinte la domon, ŝi demetadis la ĉapelon, laboradis tiel kun la elasta laĉo, ke ŝi tute malkudris unu finon kaj pliparte liberigis la duan.

Poste ŝi prezentis sin antaŭ Lilio, kaj demandinte kiel kutime pri Filipo kaj manĝinte pecon da kuko, ĉar ordinare Lilio proponis pecon, ŝi levis la manon, demetis la ĉapelon kaj petis, ke Lilio alkudru al ĝi la laĉon, aldirante:

— Kudru ĝin tre firme, alie la patrino batos min.

Alvenis tago, en kiu kompatinda Kanjo neatendite repagis plenplene la bonkoraĵojn, kiujn ŝi ricevadis de Lilio kaj Filipo.

Tio okazis en la lasta tago de la paska libertempo.

Filipo estis pasiganta la tempon en akompano de kelke da fiŝkaptistoj, kolorigantaj la boatojn kaj riparantaj la retojn. Ĝojo estis kune kun kelke da samaĝulinoj sur la sablaĵo, kaj Florenco estis ĝuanta la agrablan ludon, nomatan "Sekvu la kondukanton" kun grupo de infanoj.

Allogan lokon ĉi tiuj elektis por la ludo. Ĝi estis en distanco de kvindek jardoj de la domo de Lilio. Tie domo estis konstruata, kaj Florenco, kies vico estis ludi la rolon de kondukantino, grimpis supren per du ŝtuparetoj kaj atingis la duan etaĝon, malatentante la ekkriojn de timo kaj admono, eliĝantajn el la buŝo de la malpli aventuremaj infanoj.

Irante sur mallarĝa, brika rando, ŝi faris eraran paŝon kaj falis sur la teron.

La ceteraj infanoj estis en diversaj gradoj de alteco kaj neniel povis helpi. Ili simple fariĝis en konfuzon, forte ekkriante.

Sed la sorto aranĝis, ke la sensaĝa Kanjo estu apude, kiam Florenco falis. Ŝi estis kaŝe rigardanta la infanojn, enviante al ili la povon ludi kune, ĉar ŝi mem devis ĉiam ludi sola.

Post nur momenta paŭzo, dum kiu ŝia koro ŝajnis ĉesi bati, ŝi iris antaŭen. Ŝi neniam povis sen naŭzo rigardi ian malsanon aŭ akcidenton, tamen ŝi penis regi sin dum ŝi alproksimiĝis Florencon, ĉiam murmurante al si.

Estas nefacile kompreni, kiamaniere la kompatindulino sciis, kion fari. Tamen post ĉirkaŭrigardo, kvazaŭ en la espero, ke iu alia venos helpi, ŝi kliniĝis kaj per nekredeblaj forto kaj ama zorgo levis Florencon kaj alportis hejmen al Lilio.

Kuŝiginte la vunditan knabinon sur sofon en fronta ĉambro, kompatinda Kanjo, ŝvitanta kaj iom senspira, sentis fortan kontenton pri si mem kaj ripetadis al si subvoĉe :

— Estas mi, kiu alportis ŝin al sinjorino Ĉester !

. . . Ŝi estas la granda fratino de Filipo, kaj Filipo estas mia amiko. Li ne lasas, ke la knaboj turmentu min, kiam li estas ĉi tie . . . Ŝi estas la granda filino de sinjorino Cester. Mi amas sinjorinon Cester, ŝi ĉiam estas bona por mi, donadas al mi kukon, alkudradas mian elastan laĉon . . . *Mi* alportis ŝian grandan filinon . . . kaj tiel plu.

ĈAPITRO XVII

Kompatinda Lilio! la aflikto kiu ŝin trafis premis ŝin tiel, ke ŝajnis al ŝi, ke ŝia koro disŝiriĝas.

Atente esplorinte la pacientinon, la kuracisto diris al Lilio:

— Mi devas ne kaŝi al vi la fakton, ke la stato de via infano estas danĝera, sed ni ne malesperu, antaŭ ol havigi al ni alian opinion krom mia. Se vi tion permesos, mi tuj vokos doktoron Salma el Liverpolo. Se iu povas savi al la infano la vivon, tiu estas li. Iu osto de la vertebra kolono rompiĝis, kaj povas esti, ke splito premas sur la spinan medolon. Se mi ĝuste diagnozis, oni povos formovi la spliton kaj per tio forigi la premadon de sur la spina cerbo. En tia okazo la infano vivos ankoraŭ multe da jaroj, kvankam ŝi ne plu estos fortika sed bezonos konstantan zorgon. Cetere por tia operacio lerta ĥirurgo estas nepre necesa, kaj tial mi rekomendas doktoron Salma. Venigi lin kostos al vi multe, sed tio estas la sola rimedo, kiun mi konas, por savi al vi la vivon de la infano. La okazo estas urĝa, tial, se vi deziras la servon de doktoro Salma, mi devas tuj sendi telegramon, kiu venigos lin post ne pli ol kelke da horoj la plej malfrue. Se estas al ni feliĉe, povas esti, ke li alvenos post ĉirkaŭ unu horo.

— Mia monhavo estas tre malgranda, sed iel

mi pagos la koston. Venigu doktoron Salma senprokraste, mi petas, nur konsilu al mi, kion mi mem povas nun fari, por malpliigi al mia infano la doloron!

Kiam la telegramo alvenis, la kuracisto jam estis for el la domo. Efektive li ĵus ekveturis per vagonaro por fari gravan operacion en granda distanco, kaj li ne povis reveni ĝis la sekvonta mateno.

Kaŭze de tio li ne vizitis Lilion ĝis preskaŭ tagmeze. Atente esplorinte Florencon, li ne povis doni kontentigan raporton.

— Se nenio maltrankviligos vian filinon kaj vi tre lerte flegos ŝin, ŝi eble povos vivi ankoraŭ kelke da tagoj; sed ĉu ŝi vivos pli longe, mi ne povas antaŭdiri. Se vi forte deziras tion, mi faros operacion. Eble ĝi bone efikus, sed timante, ke ĝi nur plifruigus la morton, mi ne povas ĝin rekomendi. Prenu kelke da minutoj, por plene konsideri la aferon, kaj poste ni ree interkonsiliĝu. Dume, kuŝante senmove, la infano ne akre suferos.

Tiel la lerta ĥirurgo parolis al Lilio, kaj ĝuste kiam li finis paroli, Gojo venis, ekfrapetis la pordon kaj alvokis Lilion al Florenco, kiu sendis urĝan peton al la patrino.

Per ia neklarigebla metodo Florenco divenis la demandon, kiu okupis la kuracistojn kaj la patrinon, kaj ŝi mem solvis ĝin.

— Panjo, ĉu la kuracistoj diris, ke ili povos resanigi min? mi volus diri, tute resanigi min en tia grado, ke mi denove estos tiel fortika kaj rekta, kiel ordinaraj knabinoj . . . aŭ . . . ĉu mi

nepre estos kripla, kiel la malgranda Franjo Martin? . . . aŭ . . . ĉu . . . mi devas morti . . . baldaŭ?

Lilio penis serenigi la infanon sen rekta respondo.

— Mia karulino, penu ne pripensi pri la estont-eco kaj pri tio, kio povus okazi. Mi ankoraŭ ne estas tute certa . . . sed kredu, ke la kuracistoj kaj mi faras kaj farados ĉion, pri kio ni esperas, ke ĝi resanigos vin! Vi devas helpi nin kiom eble, mia kara. Tion vi faros, se vi kuŝos kiel eble plej trankvile kaj senmove, glutante ĉion, kion mi alportos al vi. Anstataŭ rigardi antaŭen en la estontecon, pri kiu oni scias tiom malmulte, penu rigardadi malantaŭen en la memoron, revokante kelkajn el la multaj feliĉaj horoj, kiujn vi jam ĝuis . . . nun ja estas malfacila tempo por vi, infano mia, kaj se tio estus ebla, kiel ĝoje mi elportus la doloron kaj ĉion, kion vi timas! Sed mi ne povas . . . mi ne povas anstataŭi vin . . . mi ne komprenas, kiamaniere la volo de Dio energias, sed mi scias, ke Li ĉirkaŭadas nin je la amo, kaj ke sub ni estas la eternaj brakoj.

— Mi ja penos, panjo, sed mi ne povas ne iom maltrankviliĝi, ĉar por mi ĉio—la vivo mem—dependas de la vortoj de la kuracistoj . . .

— Mi scias tion, mia kara, sed mi volas helpi vin; vi ne devas multon diri, tio lacigus vin.

— Tamen aŭskultu, panjo, . . . mi ne tre forte timas morti, kvankam kompreneble . . . ne estus agrable forlasi vin . . . kaj Filipon . . . kaj Ĝojon, sed ĝis nun en mia tuta vivo mi ĝuis

bonegan tempon . . . kaj . . . vi ja tiel ofte kaj tiel alloge priparolis pri la ĉielo kaj Dio, ke mi estas certa, ke tie mi ne sentus min soleca aŭ fremda, almenaŭ ne pli longe ol dum minuto . . . Krom tio . . . la patro jam estas tie, kaj mi irus rekte al li . . . Mi supozas, ke li rekonos min . . . eble donu al mi ian komunikaĵon por li . . . mi sonĝis pri li en la lasta nokto, . . .

— Mi pensos, mia tre kara, tamen tute ne estas certe, ke vi estas mortonta! Kredeble la kuracistoj savos al vi la vivon; ili celas tion, kaj mi . . . mi tre bezonas vin, filineto mia!

— Sed panjo, kara panjo, kvankam mi povas sen timo morti . . . mi estas certa . . . ke neniam . . . mi povos elporti, ke mi estu tia, . . . kia estas la kompatinda Franjo Martin . . . ŝi ne povas partopreni en amuzoj tiaj, kiajn mi kutimis ĝui. . . . Ŝi ne povas marŝi longe kaj neniam povas kuri. . . . Ŝi ne povas fari ian ajn el la aferoj, kiuj estas por mi farindaj . . . kaj ĉiam . . . rigardante min, . . . vi sentus doloron . . . kvazaŭ sago trapikus vian koron, kiam vi memorus, ke mi ne povas agi simile al miaj samaĝulinoj . . . Jes, panjo . . . iam . . . mi aŭskultis vin, kiam . . . aludante Franjon . . . vi bedaŭris ne nur ŝin, sed ankaŭ eĉ pli forte ŝian patrinon. Panjo . . . volu elaŭskulti . . . min . . . mi volus plu paroli . . . kaj . . . mi . . . sentas . . . min . . . tiel . . . malforta . . .

— Mi komprenas, mia infano, sed ne ekzistas bezono diri ĉion nun . . . Ripozu iomete . . . mi restados ĉi tie kune kun vi . . . kaj dum vi

ripozos, aŭskultu min, nur unu momenton . . . Mi parolis nesciante, ke vi aŭskultis . . . mi jam havas nur unu fortan deziron, konservi vin ĉe mi. Mi elpensos rimedojn por ĝuigi al vi la vivon, eĉ rimedojn per kiuj vi povos ofte helpi al mi, kaj kune ni ĝoje pasigos la tempon kaj laboros . . .

— Sed panjo, mi . . . ne . . . volas, mi ne povas . . . se mi ja devus esti simila al Franjo . . . mi preferus ne resti . . . Mi preĝas . . . ke Dio prenu min al Li . . . baldaŭ . . . Promesu, Panjo, ke . . . vi . . . ankaŭ . . . tiel . . . preĝos . . . bone, panjo ?

— Mia infano . . . tio, kion vi petas, estas tro malfacila, por ke mi ĝin promesu; mi ne povas.

— Sed, patrino, ĉu tio, kion vi . . . ĉiam diris, ne estas vera . . . pri Dio . . . kaj la ĉielo . . . kaj la patro . . . Mi volus diri . . .

— Mi kredas, ke ĝi ja estas vera, mia infano, sed mi tiel forte deziras restigi vin ĉe mi . . . Eĉ se vi ja devos kuŝi dorse longatempe, ĉu vi ne pensas, ke vi povos akiri paciencon, ke post iom da tempo vi eĉ kontentiĝos ? Ekzistas ja multaj okupoj kaj plezuroj spiritaj kaj eĉ por la manoj, pri kiuj vi nepre interesiĝos . . . Mi . . . ĉiuj ni . . . servos vin tiel ĝoje, gaje, ame . . . ni trovos rimedojn kontentigi vin.— Ho! Florenco mia, . . . restu kun mi . . . restu kun la patrino . . .

ĈAPITRO XVIII

Trankvile kaj preskaŭ nerimarkeble Florenco eligis sian lastan spiron. Post tio profunde funebris Lilio, kaj faris ĉion aŭtomate dum la unuaj tagoj.

La malsano de Florenco ne daŭris sufiĉe longe por iom post iom prepari Lilion al la falonta bato kaj por helpi ŝin senti, ke la morto venis kiel anĝelo kun dezirita liberigo de suferado.

Ribelaj pensoj flugadis amase en ŝian cerbon, kaj, antaŭ ol povi forpeli ilin, ofte ŝi devis fervore preĝi. Kelkfoje ŝi pensis, ke ŝi jam venkis ilin, sed jen ili ree inside kolektiĝis kaj ŝi devis denove batali kontraŭ ili.

Komence ŝia edzo formortis, jam nun ŝia unuenaskito, la sola el ŝiaj infanoj, kiun la patro vidis kaj karesis. Ŝajnis kvazaŭ rompiĝis ia forta ligo inter ŝi kaj la edzo. Plaĉis al ŝi pensi, ke kredeble la edzo kaj la filino jam renkontiĝis.

Ĉu ŝi iam eĉ dum momento bedaŭris, ke la anĝelo de la morto ne elektis Ĝojon, se ĝi nepre devis forpreni unu el la infanoj? Tio povis esti; sed neniu sciis, se iam tia penso flugis al ŝi en la kapon. Efektive Ĝojo klopodis konsoli la patrinon, tiel ame kaj takte, ke ŝi sukcesis pli bone, ol ĉiu alia.

En la du unuaj tagoj ŝi parolis tre malmulte, sed iris kaj venis kviete, plej ofte restante apud la patrino kaj pensante:

— Mi ne ĝenu ŝin, ĉar ŝi tre suferas.

Tamen ŝi atente observadis, kaj estis ŝi, kiu fine inklinigis la patrinon trinki kaj manĝeti iom da nutro.

Gojo mem sentis sin tre malfeliĉa kaj sola, tamen ŝi ne povis esprimi al iu ajn sian propran kordoloron.

Dum la geparencoj ĉeestis por soleni la enterigon de Florenco, du el ili interparolis nesingarde, neatentante ke Gojo estas apude.

Unu estis sinjorino Breton, kiu persiste rigardis Gojon kiel sintrudulinon ne apartenantan al ŝia propra patrino, kaj diris al iu sia kuzino:

— Kiu povas kompreni la vojojn de la sorto? Mi ja ne povas! Jen mia propra, laŭleĝe naskita pranevino mortis, dum la malgranda sintrudulino, tiel sensence nomita Gojo, ankoraŭ vivas kaj kredeble ĉiam vivados! Se Lilio ne estus restinta tiel obstina, sed sendinta la infanon en orfejon, eble hodiaŭ ni havus nian amatan Florencon ĉe ni!

— Ho, efektive, ĉu tiaj vortoj ne estas iom tro fortaj? Cetere la infano ja estas ne malbona, mi eĉ . . .

— Vi ja tute ne komprenas la demandon— pludiris nepacience sinjorino Breton—Se Lilio estus foririginta la neniam deziratan infanon laŭ la volo de ĉiuj ni ŝiaj . . .

Pli longan tempon Gojo ne povis resti silenta en la apudesto de la interparolantinoj. Subite ŝi stariĝis antaŭ la avino, kiun ŝi fiksis per kolera rigardo, dirante:

— Mi ja estas dezirita de mia panjo, ŝi mem diris tion al mi, kaj vi . . . vi estas malbona

virino . . . mi ne amas vin . . . mi preĝpetos Dion, ke li ne enlasu vin en la ĉielon, kiam vi mortos!

Tuj poste ŝi elkuris el la ĉambro en kabineton uzitan kiel kestejo, kaj tie ploris ĝis sato, pensante:

— Malgraŭ ĉio mi kredeble ne estas la efektiva filino de mia kara panjo . . . eble Florenco diris la veron . . . Se mi ne estas dezirita (*plorĝemo*) . . . se mi ne apartenas al la panjo . . . mi do foriru ien . . ., sed kien? (*plorĝemo*) . . . Mi malamas la avinon . . . Sed la panjo mem vere amas min; ŝi diris al mi, ke pro tio ŝi nomis min Gojo, pensante, ke mi alportos ĝojon al ŝi. Kredeble ŝi ja estus foriginta min antaŭ longe, se ŝi ne amus min . . . Mi kaŝos antaŭ ŝi la fakton, ke mi aŭdis tion, kion diris la avino. Mi penos alporti efektivan ĝojon al ŝi nun, kiam ŝi sentas sin tiel afliktita. Mi estos por ŝi pli karesema, pli bona infano, ol antaŭe. Mi iros al ŝi kaj konsolos ŝin . . . sed ne, ĉar eble, vidante min, ŝi ankoraŭ pli forte bedaŭrus Florencon! Ho ve! kion kontentigan povas malgranda knabino sukcese fari? . . . Tamen mi ja iros al la panjo. Mi nenion diros al ŝi, mi nur silente restos proksime de ŝi, sentigante ŝin pri mia amo al ŝi . . . eble tio iomete konsolos ŝin.

Tiun saman vesperon ĉirkaŭ la sunsubiro, post la foriro de ĉiuj parencoj venintaj por ĉeesti la malĝojan solenon, Lilio troviĝis sola, funebranta en la dormoĉambro. Tie ŝi genuis, apogante sin al la flanko de la lito, kun la manoj kovrantaj la vizaĝon.

— Dio—ŝi silente preĝis—helpu al mi el la koro diri "Fariĝu via volo" . . . tion mi ankoraŭ ne povas . . . sed mi ne ĉesos preĝpeti, ĝis mi povos tutkore diri ĝin.

Gis nun ŝi ne verŝis larmojn, kaj la okuloj ŝajnis al ŝi kvazaŭ sferetoj el fajro.

Subite ŝi aŭdis mallaŭtajn paŝojn alproksimiĝi: Ĝojo sur la pintoj de la piedoj iris al ŝi, ĉirkaŭis ŝin per la braketoj kaj flustris:

— Panjo kara, venu kun mi kaj vi vidos, kiamaniere Dio kaj la anĝeloj briligas sur la ĉielo—kie . . . kara . . . Florenco nun estas. Venu, panjo mia, kredeble ĉio tiel treege brilas tiun ĉi vesperon, ĉar la anĝeloj forte ĝojas akcepti nian Florencon inter sin. Ŝi dezirus, ke vi vidu, kian belan akcepton ŝi ricevas, ĉu ne? Venu do, panjo kara, kaj *eble*, se vi *tre* serĉe rigardos, vi vidos Florencon mem!

Kortuŝite de la vortoj kaj la dirmaniero de Ĝojo, kaj vidinte la profunde aman esprimon en ŝiaj okuloj kaj tuta mieno, Lilio stariĝis, akompanis la knabineton al la fenestro kaj nevolonte ekkriis:

— Infano mia, malgraŭ mia ĵusa peno preĝi, mi preskaŭ forgesis, ke Dio vivas! Ke Lia majesto tiel mirinde brilas sur la ĉielo, mi akceptos kiel signon de Lia amo al ni. Mi ne forgesu ĝin denove!

Longan tempon ili silente rigardis, ĝis la suno tute subiris meze de fajre brilaj koloroj, kaj ĉi tiuj iom post iom forfandiĝis.

La tutan tempon Lilio diradis en la spirito:

— Florenco, mia amata filino, ĉu efektive la

anĝeloj tiel feste akceptas vin, kiel diris nia malgranda Ĝojo? Mi do penos ne tro forte bedaŭri vin, kvankam tio estas ekstreme malfacila tasko . . .

Venis momento, kiam preskaŭ blindiga lumo ekvidiĝis kaj tuj estingiĝis.

— Fulmas!—ekkriis Ĝojo; sed Lilio sciis, ke tio ne estis ordinara fulmo. Efektive dum unu mallonga momento ŝi ekvidis estaĵon, kiu ne estis fremda por ŝi; kies tuta aspekto dissendis radiojn de lumo kaj konsolajn amsentojn.

— Mia sonĝanĝelo! La anĝelo de la lumo!—ŝi diris al si.—Mi do jam konsoliĝas; iam mi denove revidos mian Florencon!

Rigardante la patrinon, Ĝojo vidis, ke la ŝtona, fiksa esprimo de doloro malaperis, ke larmoj moligas la okulojn, kaj, kvankam ŝi ne sciis tion, ke la krizo jam pasis kaj la spirito de la patrino denove komencis fariĝi normala.

ĈAPITRO XIX

El tiu aflikto unu afero klare montriĝis : ke ŝanĝo okazis en la pensado de la najbarinoj al Lilio.

En la daŭro de la jaroj en kiuj ŝi loĝis inter ili, la najbarinoj suspekte rigardis ŝin, kiel neniu krom scivola virino povas rigardi alian virinon, celante trovi ŝiajn nebonajn ecojn.

Tamen antaŭ kelke da tempo ili jam decidis, ke " sinjorino Ĉester efektive estas sinjorino el la supera klaso," kaj nun, kiam ŝi tre afliktiĝis, ili montris kunsenton kun ŝi. Kelkaj demandis pri la sanstato de Florenco post la akcidento, aliaj alportis florojn en la enteriga tago, kaj ili ne levis la rulkurtenojn, ĝis la funebra anaro forveturis al la tombejo.

La komenco de la ŝanĝo estis viziteto, kiun Lilio faris al sinjorino Jones, malriĉa virino loĝanta ne malproksime de ŝi.

Sinjoro Jones estis ĝardenisto kun sep infanoj, el kiuj unu estis tre malsana.

Lilio eksciis pri la malsano ne nur per Ĝojo, sed ankaŭ per Janjo, la juna servistino, kiu havis specialan kapablon akiri kaj disvastigi ĉiuspecajn novaĵojn. Ŝi ne nur sciigis Lilion pri la malsano de la infano, sed ankaŭ pri la malriĉeco de la gepatroj, kiuj ne sciis, de kie akiri la monon por havigi al la infano la flanelon kaj ankoraŭ aliajn necesaĵojn preskribitajn de la kuracisto.

Post iom da pripensado Lilio iris al la zorgoplena virino, sinjorino Jones, kaj delikate proponis la solan helprimedon, pri kiu ŝi sciis.

— Mi venis al vi, esperante, ke vi eligos min el malfacilaĵo—diris Lilio post demando pri la stato de la malsana infano—mi havas parencinon, kiu ĉiam sendas al mi la vestojn de siaj infanoj, pensante, ke mi povas ilin uzi por miaj filinoj. Tamen ili ne povas eluzi tiom multe, kiom mia parencino kutime sendas, kaj mi tute ne deziras, ke ili estu formordataj de tineoj! Eksciinte, ke unu el viaj infanoj malsanas, mi uzas la okazon peti, ke vi helpu min el mia malfacilaĵo, akceptante kelkajn vestetojn, precipe lanajn. Se vi mem ne povas ilin uzi, eble vi konas iun, kiu povas.

— Ho, sinjorino—avide, sed respekte, respondis sinjorino Jones—Mi pensas, ke certe vi devas iel scii pri mia bezono; mi bezonas ĝuste tion! mi kaj la patro laborigis la cerbon, kiel havigi flanelon al nia suferanta infano! Sed ve! ni havas tiel multenombrajn buŝojn plenigi kaj piedojn kovri, ke ne multe restas por pagi la luon de la domo kaj vesti nin.

— Mi estas certa, ke la afero ne estas facila—diris Lilio.

— La patro estas bonulo: li ne drinkas, kaj li aĉetadas nur malmulte da tabako: mi mem ja ne bezonas multon. Mi neniam elspezas por mi mem. Mi ne aĉetis ĉapelon aŭ vestaĵon por mi mem, de kiam naskiĝis Ada, mia tria infano, Dio benu ŝin. Sed dek spesmiloj baldaŭ malaperas, kiam oni devas dividi ilin inter naŭ homoj, kaj

tio estas ĉiom, kiom mia edzo ricevadas por sia ĉiusemajna laboro. Sed mi luigas du ĉambrojn, kaj tio ŝveligas la enspezon.

—Mi povas kunsenti kun vi, ĉar mi mem trovas, ke ne estas facile havigi al mi la rimedojn por doni al miaj infanoj ĉion, kion mi deziras por ili. Mi estus en malbona stato, se unu el miaj parencinoj ne kutimus sendi al mi la vestojn, kiujn ŝi kaj ŝiaj infanoj ne plu bezonas.

—Kio! ĉu estas eble, sinjorino, ke *vi* scias, kiel tio estas, havi mankon? Kiel malmulte oni povas scii pri la aferoj de aliaj! Mi ĉiam pensis, kiel ankaŭ la najbarinoj pensas, ke vi estas sinjorino tute bonstata. Ni ja elrigardis, kiam oni enportis viajn meblojn en la domon, kaj ni ofte rimarkigis al ni, kiel riĉe, kvankam ne atentotire, vi vestadas la infanojn kaj vin. Krom tio . . . sed pardonu, sinjorino, ni ne komprenis.

—Ne—diris Lilio, iom malgaje rimarkinte la mankon de ĉio, kio ne estis absolute necesa en la ĉambro—vi ne povis kompreni, sed tio ne estis stranga. Cetere mi ankaŭ ne komprenis vian staton. Iafoje mi preskaŭ enviis iujn el miaj najbarinoj nur tial, ke ili ne mortperdis la edzon, kiel mi perdis mian; ke ili ne estas devigataj bataladi solaj por trovi vivrimedojn por siaj infanoj, kiel mi bataladas. Tamen jam de nun ni komencu kompreni unu la alian!

Post la interŝanĝo de kelke da pluaj vortoj, vidinte, ke sinjorino Jones jam fariĝis pli kuraĝa kaj esperplena, Lilio faris siajn adiaŭojn kaj foriris.

Sinjorino Jones sentis veran dankon al Lilio, el kies viziteto rezultis ne nur grava utilo per donaco de varmaj, bonstataj vestoj por du-tri el la infanoj, sed ankaŭ en la pliboniĝo de ŝia mensa stato. La kunsento de Lilio kaj la eltrovo, ke ne sola ŝi suferas, helpis ŝin. Krom tio ŝi ricevis novan ideon, eksciinte, ke sinjorino posedanta belajn meblojn kaj vestojn povas esti samtempe tiel neriĉa, ke ŝi devas diligente laboradi por trovi vivrimedojn.

Plej mirige estis, ke tiu ĉi ŝajne bonstata sinjorino el la supera klaso *iam enviis al ŝi pro la edzo!* Konstatante tion, sinjorino Jones pensis pli ame pri la edzo kaj eĉ kompatis Lilion, dirante al si:

— Dio! kiu povus diveni, ke *ŝi* estas neriĉa! ke *ŝi* ofte sentas sin soleca, ke ŝi *devas* labori! Kaj iam mi eĉ pensis malbone pri ŝi!

Unu post unu el la najbarinoj, konsumiĝante de scivolo, iris al sinjorino Jones por aŭskulti ĉion, kion ŝi volas rakonti al ili pri la rimarkinda viziteto de Lilio.

De tiu tempo la ĝardenisto kaj lia edzino foje sendis florojn al Lilio kiel dankesprimon.

Meze de sia funebrado Lilio devis prikalkuli la monkoston de la malsano kaj enterigo de Florenco.

Filipo reiris al la edukejo, kaj la pensiuloj reiris al siaj propraj hejmoj en la urbego.

En la granda, soleca domo Lilio estus sola, se tie ne estus malgranda Ĝojo kaj Janjo, kiun lastan

ŝi ankoraŭ unu fojon devos maldungi, se ŝi ne baldaŭ sukcesos ricevi pensiulojn.

Malgraŭ la juneco de Gojo, Lilio ne kaŝis antaŭ ŝi, kiel urĝe ŝi bezonas loĝantojn aŭ aliajn rimedojn gajni monon. Kune ili genuis, petante helpon de Dio.

Leviĝinte de la genua pozo, Lilio ricevis novan senton de certeco, ke jam fariĝos bone al ŝi. Ricevinte gazeton, Lilio atente legis la anoncojn de tiuj, kiuj serĉis meblitajn ĉambrojn, ĝis ŝi vidis unu pri kiu, malgraŭ tio, ke ĝi ne estis eksterordinare rimarkinda, io ŝajnis konvinke flustri al ŝi: "ne serĉu plu, vi jam trafis tion, kion vi celas. Respondu al ĉi tiu."

Efektive ŝi faris tion, kaj poste mem alportis la leteron al la poŝtoficejo. Faliginte ĝin en la leteran aperturon ŝi reiris hejmen, por trankvile kaj plena de espero atendi respondon.

La nomo subskribita de la anoncintoj estis gesinjoroj Leden, kaj la postulo estis pri privata saloneto, tri dormoĉambroj, kaj manĝoĉambro. La anonco klarigis, ke la anoncantoj, volante esti la solaj loĝantoj, malavare pagos kompense por tia aranĝo.

Penplene ordometante la ĉambrojn, pri kiuj ŝi esperis, ke gesinjoroj Leden luos ilin, Lilio sentis sin strange certa pri la sukceso. En tiu sama tago ŝi ricevis neatenditan plezuron, en la formo de bela bukedo sendita de sinjorino Jones.

Malvolvinte la paperon kaj vidante la purajn belajn florojn, la plezuro tiel superregis ŝin, ke ŝi ne povis ne ekkrii. Ŝajnis al ŝi, ke la floroj venis kiel Dia sendaĵo diranta: "Ne malesperu;

tenu vin kuraĝe, viaj preĝpetoj atingis Min kaj estas plenumotaj."

Elektinte florvazojn, Lilio plenigis ilin je akvo, kaj poste per amaj tuŝoj kaj kun efektiva ĝuo aranĝis la florojn laŭ sia gusto.

Nur unu florvazon ŝi tenis en la ĉambro okupita de ŝi kaj Ĝojo; la ceterajn ŝi dismetis en la saloneto kaj manĝoĉambro, pri kiuj ŝi esperis, ke sinjoro Leden luprenos ilin.

La sekvantan matenon ŝi ricevis agrablan surprizon.

ĈAPITRO XX

Oni haltigis fiakron antaŭ la domo. Preskaŭ tuj poste la sonorilo laŭte sonis, kaj la bruo de la frapilo faris resonojn tra la domo.

Responde al la letero de Lilio, la gesinjoroj Leden alvenis por rigardi la ĉambrojn.

Tion Lilio ja espere atendis, sed okazis io, kion ŝi ne atendis, nome, ke ŝi eksciis, ke sinjorino Leden estas malnova amikino de ŝia infaneco.

Kune ili ludadis, kariĝis unu al alia, kaj restis amikinoj ĝis post sia disiĝo antaŭ multe de jaroj, kiam Klaro edziniĝis kun sinjoro, kiu havis oficon en Hindujo.

Tien la edzo kaj edzino ekveturis du semajnojn post la edziĝo.

En la daŭro de du jaroj Lilio kaj Klaro korespondadis, kaj dum tiu tempo Lilio ankaŭ edziniĝis.

Kelkan tempon poste la leteroj komencis maloftiĝi, unu-du ne atingis la adresitinojn, kaj fine la korespondado tute ĉesiĝis.

De kiam Klaro Leden kune kun la edzo kaj filo revenis en Anglujon kaj renkontiĝis kun la malmultaj el siaj antaŭaj amikinoj, kiuj ankoraŭ loĝis en la ĉirkaŭaĵo de ŝia antaŭa hejmo, ŝi penis retrovi Lilion, la plej amatan el ĉiuj, sed vane.

Ŝi povis nenion sciiĝi krom tio, ke Lilio vidviniĝis antaŭ longe, ke ŝi havas infanojn, kaj ke ŝi

estas tiel malriĉa, ke ŝi devas mem labori por ili.

Kiam Klaro legis la nomon subskribitan ĉe la fino de unu el la leteroj ricevitaj responde al la anonco de ŝi kaj la edzo pri loĝejo, kaj kiam tuj poste ŝi denove rigardis la konatan skribkarakteron, ŝia koro saltis pro la ĝoja antaŭsento, ke ŝi baldaŭ retrovos la amikinon.

Tiel forte ŝi ekscitiĝis pri la agrabla espero, ke ŝi komencis nerve tremeti, kiam la fiakro alproksimiĝis al la domo. Ŝi multe pli deziris trovi Lilion, ol taŭgan loĝejon. Ŝi trovis ambaŭ.

. . . .

Nur unu infano naskiĝis al gesinjoroj Leden. Tio estis Jaĉjo, kiu havis preskaŭ tri jarojn pli ol Gojo.

Kiam Jaĉjo estis kvinjarulo, grava akcidento okazis al Klaro, kiu, pasiginte longan tempon de suferado en la lito, sufiĉe resaniĝis, por povi riski marveturon, kiel la kuracisto urĝe konsilis. Li rekomendis, ke ŝi iru loĝi en la pli varma klimato de suda Anglujo, prefere ĉe la marbordo.

Tion ŝi jam faris, kaj el ĝi rezultis tiom da pliboniĝo de la sanstato, ke ŝi kaj la edzo decidis provi la iom pli severan klimaton de la norda parto de Anglujo ne tre malproksime de Liverpolo, kie sinjoro Leden ricevis firman oficon profitdonan.

Jen kial en la *Mercury* aperis la anonco, el kiu sekvis la ĝoja renkontiĝo de Klaro kaj Lilio.

ĈAPITRO XXI

Tiamaniere la financaj malfacilaĵoj de Lilio foriĝis, kaj samtempe la sentoj de streĉo kaj soluleco, kiuj ŝin akompanadis dum multe da jaroj.

La kunulineco inter ŝi kaj Klaro, la konversacioj kun sinjoro Leden, kaj la povo legi el la multaj pensigaj kaj diverstemaj libroj, kiujn li alportadis el la urbego, iom rejunigis Lilion, kiam ŝi kutimiĝis al la morto de Florenco.

Jam de longe ŝi ne sentis sin tiel feliĉa kaj sen peza ŝarĝo, kiel nun. Denove brileto de feliĉo sin montris en ŝiaj okuloj, dum io, kio ŝajne jam antaŭe velkis en ŝia animo, revigliĝis, redonante ĝis ia grado la belecon, kiu antaŭe lumigis ŝian vizaĝon.

Post la paso de tri monatoj, decidinte, ke ili restos almenaŭ unu jaron ĉe Lilio, la gesinjoroj Leden aĉetis novan pianon de la unua klaso.

Ambaŭ ili sciis bone la muzikon. Klaro iam estis brila pianistino, sinjoro Leden ludis la violonon, kaj krom tio, bone kantis.

Plifortikiĝinte, Klaro rekomencis ĉiutagan ekzerciĝadon sur la piano, kaj ofte en la vesperoj ŝi kaj la edzo akceptis gastojn, kiuj ankaŭ havis muzikan talenton.

Tio faris grandan plezuron al Gojo, kiu plej ofte enlitiĝis, sed ne dormis, kiam oni komencis muziki.

Ofte okazis, ke en la sekvanta mateno, ŝi povis el la memoro ludi la samajn pecojn de muziko, al kiuj en la antaŭa vespero ŝi rave aŭskultis.

Ne estas mirinde, ke tio altiris la atenton de Klaro Leden.

Sekvis interparoladoj inter la gesinjoroj Leden kaj Lilio, kun la rezultato, ke Klaro proponis doni al Ĝojo lecionojn de la muziko.

Sed baldaŭ montriĝis, ke Ĝojo faris tiel grandan progreson, ke ŝi bezonas pli lertan instruadon ol tiu, kiun povis doni sinjorino Leden.

Estas unu afero scii mem ludi, sed alia afero instrui al alia persono ludi; kaj tion trovis sinjorino Leden, kiu mem de multe da jaroj ne ricevis lecionojn. Krom tio ŝi povis ludi nur la pianon, kaj post nelonge evidentiĝis, ke la ĉefa deziro de Ĝojo estas povi ludi la violonon.

Iun vesperon, invitite de gesinjoroj Leden, Ĝojo, anstataŭ kuŝiĝi je la kutima horo, akompanis la patrinon por aŭskulti koncerteton en la saloneto de gesinjoroj Leden.

Inter aliaj muzikaĵoj sinjoro Leden ludis per la violono *Liebeslied*, dolĉan emociigan komponaĵon de Chopin.

Ĝi faris tiel fortan impreson sur la infanon, ke kiam la muziko finiĝis, Ĝojo, rigardante sinjoron Leden per okuloj brilantaj de emocio kaj entuziasmo, diris nelaŭte :

— Sinjoro Leden, ĉu vi iam ludis tiun pecon dufoje sinsekve ?

La demando elvokis rideton el la sinjoro, kiu tuj komprenis, ke la infano deziras reaŭdi la

dolĉan muzikon, sed ne kuraĝas peti tion de li, tial li afable respondis :

— Jes, mia infano; ĉu vi deziras, ke mi nun ludu ĝin denove ? Mi volonte faros laŭ via deziro, se tio ne tedos la sinjorinojn ?

La sinjorinoj asertis, ke, anstataŭ tedi ilin, la ripeto de la muziko duobligos al ili la antaŭan plezuron.

Demetinte la violonon, sinjoro Leden sidigis Gojon sur siajn genuojn kaj diris :

— Vi mem devus posedi violonon kaj lerni ĝin ludi.

— Ho, sinjoro, ĉu vi pensas, ke mi ja povas lerni ludi violonon ?—respondis Gojo.

— Tute jes, kial ne ?—diris sinjoro Leden—mi mem volonte instruus vin.

— Sed—plue demandis Gojo—ĉu violono kostas tre multe da mono ?

Sciante pri la neriĉeco de la patrino, la infano ne volis aperigi fortan deziron por akiro de violono, se tio estas multekosta objekto.

Iun tagon, revenante de la ĉiutaga laboro en la urba oficejo, sinjoro Leden portis kun si skatolon similan laŭ formo, tamen malpli grandan ol tiu, kiu enhavis lian violonon.

Vespermanĝinte, li petis Gojon al li kaj donacis al ŝi malgrandan violonon, dirante, ke ĝi estas naskotaga donaco, kvankam antaŭe donita.

Poste li donis al ŝi la unuan lecionon pri la arto ludi violonon, kaj de tiu vespero li instruadis ŝin po tri fojoj en ĉiu semajno en la daŭro de ĉirkaŭ kvar monatoj.

Mirante je la rapida progreso farita de la

infano, li venigis du amikojn en iu dimanĉo, ne antaŭe dirinte unu esperigan vorton pri siaj planoj al Lilio.

Unu el tiuj amikoj estis famekonata violonisto, kiun ni nomu doktoron Heinrich Kellermann el Varsovio, la dua estis lia frato, la akompanisto, kaj administranto de liaj negocaj aferoj.

Post kiam ili aŭskultis Ĝojon ludi kelkajn diversspecajn muzikaĵojn, la tri sinjoroj eliris por promeni kaj priparoli la sukcesplenan estontecon, kiu esperebl̄e etendiĝos antaŭ Ĝojo.

— Nu, doktoro, ĉu mi eraris, dirante, ke la infano posedas eksterordinaran talenton pri la muziko? Cu vi opinias, ke ŝi estas instruinda?

— Ke la infano estas instruinda, mi ne povas dubi. Ŝi efektive posedas maloftan talenton muzikan, sed ĉu kariero enviinda atendas ŝin, pri tio mi ankoraŭ ne povas diri kun certeco. Mi mem ne kutimas akcepti komencantojn. Tamen mi povas proponi la nomon de iu profesoro Delsarte, kies metodon instrui mi aprobas. Li volonte akceptos la fraŭlineton kiel lernantinon. Mia konsilo estas, ke oni sendu ŝin al li almenaŭ ses monatojn, poste mi povos kun pli da certeco juĝi pri ŝia kapablo. Se ĝi estas tiel, kiel mi esperas, mi mem akceptos ŝin kiel instruatinon.

— Sed ĉu la elspezo estus tre granda, ĉar sinjorino Ĉester estas vidvino neriĉa, kies monrimedoj dependas de ŝia propra perlaborado? Mi devus diri al vi, ke mi ankoraŭ ne diretis eĉ unu vorton al sinjorino Ĉester pri miaj esperoj pri la infano, nevolante, ke iluziu ŝin neplenumeblaj

revoj, nek volante doni al ŝi la okazon malpermesi, ke mi enmiksu min en la afero. Ŝi ne estas ordinara virino, ŝi pensadas originale. Povas esti, ke ŝi ne dezirus muzikan karieron por la infano aŭ, se ŝi dezirus tion, ke ŝi ne povus elspezi tiom, kiom ĝi kostus. Antaŭ ol priparoli la aferon kun ŝi, mi volus scii, kiom kostos la lecionoj ĉe profesoro Delsarte kaj ĉe vi; ankaŭ kiom da tempo proksimume forpasos, antaŭ ol la knabino fariĝus sufiĉe lerta por perlabori enspezon. Per unu vorto, ĉu la rezultato valorus la elspezon?

— Pri tio mi kompreneble ne povas nun precize paroli, sed mi povas tiom diri, ke ekzistas du vojoj antaŭ talenta muzikisto: unu kondukas al la estrado, kaj sur ĝi oni povas pli frue kaj pli multe ricevi enspezon, ĉar ju pli juna estas la muzikisto, des pli interesa kaj miriga li (aŭ ŝi) ŝajnas al la homoj, kiuj volonte aŭskultos lin. La dua vojo estas pli monotona, kaj kondukas al la instruado. Eble pli longa estas la preparado necesa, por ke oni ĝin laŭiru; certe ĝi ne kostas tiel multe, kiel la unua vojo, sed ĝi ankaŭ ne enspezigos tiel multe en la fina rezultato. Cetere la dua vojo estus longa por la fraŭlineto, ĉar memevidente la gepatroj de familioj ne serioze rigardus ŝin kiel konvenan instruistinon, antaŭ ol ŝi estos sufiĉe aĝa por porti fraŭlinajn vestojn! Cetere jam morgaŭ ili amase venus aŭskulti ŝin ludi, se ŝi povus efektive ludi bonege kaj kapti ilian koron.

Ĉe tio la frato, Karl, intermetis vorton:

— Manko de mono per si mem ne estas nevenk-

ebla malfacilo en la vivo de efektiva artisto. Ekzemple, atinginte certan gradon de lerteco, la artisto povas gajni premiojn, per kiuj li aŭ ŝi povas pagi la sekvantajn necesajn lecionojn. Estas alia bona metodo, kaj tion mi proponus. Sinjorino Ĉester sendu la infanon al profesoro Delsarte por sesmonata lecionaro; tio kostus proksimume nur sesdek spesmiloj. Estus necese, ke sinjorino Ĉester pagu duonon de tiom ĉe la unua leciono, la ceteron post tri monatoj. Krom tio estus necese elspezi kelkajn spesmilojn por muzikaĵoj kaj la kosto de veturado inter la urbego kaj ĉi tie.

Poste, se la infano montrus nedubeblan talenton, la frato mem povus ŝin preni kiel lernantinon. Ordinare lia honorario estas po dek spesmiloj por ĉiu leciono, sed en ĉi tiu okazo ni povus ne nur malaltigi la koston de la lecionoj, sed ankaŭ fari ian aranĝon kun sinjorino Ĉester, por eviti, ke ŝi elspezu senpere eĉ unu spesdekon al ni. En tia okazo estus necese, ke ŝi subskribu interkontrakton inter ni kaj ŝi pri la infano. Niaflanke ni promesus, ke la frato plene instruos fraŭlineton Ĝojo pri la muziko ĝenerale kaj la violonon speciale, samtempe provizante eĉ la muzikaĵojn kaj ĉian literaturon necesan. Sinjorino Ĉester siaflanke promesus pro la infano, ke ĉi tiu neniam ludos la violonon publike aŭ pro ia privata gajno sen nia konsento kaj antaŭa aranĝo kun ni, por aranĝota serio da jaroj. Niaflanke ni farus kalkulon pri la profitoj kaj elspezoj, kaj, repaginte nin kun aldone iom da procento, ni poste dividus la profitojn inter

sinjorino Ĉester kaj ni, ĝis la limtempo de la kontrakto plenumiĝus. Poste ŝi kaj la fraŭlineto estus liberaj fari novajn kontraktojn kun ni aŭ kun kiu ajn muzika entreprenisto.

— Bone, mi priparolos la aferon kune kun la edzino kaj sinjorino Ĉester. Se la sinjorino konsentos, mia edzino pagos la koston de la lecionoj de profesoro Delsarte.

ĈAPITRO XXII

Ĝis malfrua horo tiunokte gesinjoroj Leden kaj Lilio troviĝis en la saloneto, fervore priparolante la estontecon de Ĝojo. Sinjoro Leden parolis vive kaj kernece, kelkfoje eĉ admone. Sinjorino Leden ne ofte intermetis vorton, kvankam ŝia vizaĝo kaj teniĝo montris plenan intereson en la diskuto, kiel ankaŭ montris la neoftaj vortoj.

La fizionomio de Lilio akceptis duban, enpensan esprimon, kvazaŭ ŝi hezitis eldiri opinion nur duone formitan.

— Memoru, ke la infano havas rajtojn—diris sinjoro Leden.—Oni devus almenaŭ doni al ŝi la eblon prilabori sian evidentan talenton sub la lerta direktado de specialisto en tiu fako de la muziko, laŭ kiu ŝia talento tendencas. Tion vi ŝuldas ne nur al la infano, sed ankaŭ al la mondo.

— Parolante nur pri la rajtoj de la infano, vi diris la veron;—respondis Lilio—sed ne forgesu, ke ankaŭ mi havas ian rajton: la rajton rifuzi ŝarĝi min aŭ la infanon je ŝuldoj, pri kiuj mi nun vidas nenian eĉ la plej malmultan eblon elpagi ilin.

— La afero estas pure negoca. Doktoro Kellermann donos servojn. Propravole li prokrastos ricevi ian repagon, ĝis la fruktoj de tiuj servoj maturiĝinte provizos rikolton, per kiu li povos tute repagi sin. Li ne proponas al vi favoron, nek almozon.

— Tamen mi devas ne forgesi, ke li riskus ne tiri ian profiton el la afero, ĉar Ĝojo povus morti post jaroj da instruo de li, antaŭ ol ni estus pagintaj eĉ spesdekon de la ŝuldo. Aliflanke en la okazo de mia morto, kiu farus sin responda pri la interesoj de Ĝojo? Kiu gardus ŝiajn rajtojn? Eĉ plue, en la okazo se la infano kaj mi vivus, ĝis ĉio estus pagita, eble Ĝojo, pliaĝiĝinte, riproĉus min pri tio, ke mi tiel katenis ŝin, kaj dirus, ke ŝi ne volas tiamaniere perlabori.

— Prave vi penas antaŭvidi la malfacilaĵojn, kiuj eble okazos, sed vi ne povas ĉion antaŭaranĝi, nek gardi kontraŭ ebla perdo doktoron Kellermann, kiu cetere ankaŭ povus morti, neplenuminte sian parton de la kontrakto!—intermetis sinjorino Leden.—Vi nur faru tion, kio ŝajnas al vi justa kaj prudenta, Lilio kara, kaj lasu ĉiajn rezultatojn al Dio, al kiu, mi scias, ke vi fidas.

— Permesu—diris sinjoro Leden—ke mi faru al vi demandon, kiu eble per si mem montros al vi alian vidpunkton, de kie rigardi la aferon. Ĉu vi iam asekuris kontraŭ brulo vian domon?

— Mi ja kutime tion faras.

— Do, vi konsentis pagadi sumojn nur tial, ke *eble* iam brulo okazos ĉe vi?

— Jes, sed la sumoj postulataj estas bagatelaj kompare kun la gajno, kiun mi ricevos, se iam brulo fariĝos.

— Tiel estas. Nu, konsideru el same negoca vidpunkto la aferon de la instruado pri muziko, kaj vi tuj komprenos, ke, eĉ se Ĝojo kaj vi mortus, antaŭ ol elpagi doktoron Kellermann, nenia maljustaĵo fariĝus. Ĝi estas simple afero

asekura, per kiu li volas riski kelke da jaroj de instruado, plene sciante, ke eble li neniom ricevos repage, sed ankaŭ sciante, ke kredeble li iam ricevos grandan kompenson—triumfe finis paroli sinjoro Leden.

—Ĉu povas esti, Lilio, ke vi havas pluan, privatan motivon rifuzi al Ĝojo la povon prilabori sian talenton ?—demandis sinjorino Leden.

—Mi pensas, ke jes, sed mi mem ankoraŭ ne tute komprenas ĉiujn miajn motivojn de hezitado. Mi devas nenion decidi, antaŭ ol plene konsideri la aferon de ĉiuj flankoj. Tio, kion mi povas diri, estas, ke sinjoro Leden ĵus prezentis novan por mi aspekton de la afero. Eble mi devus konsenti, ke Ĝojo ne perdu la okazon almenaŭ provi, ĉu ŝi ja posedas altan muzikan talenton. Pri unu afero mi estas tute certa : ke mi tutkore dankas vin ambaŭ pro via intereso kaj klopodado por mia senpatra infano.

. . . .

De la afero, kiu okupis en tiu nokto la pensojn de Lilio, ekzistis alia flanko ne malpli pensiga, ol la financa. Ŝi ne povis kaŝi al si la konvinkon, ke Ĝojo efektive posedas maloftan talenton de muziko; kaj ŝi kredis, ke la infano estas tiel konscienca, ke ŝi laborus diligente kaj fidele. Plue ŝi konstatis, ke estus pli prudente koncentrigi la fortojn de la infano sur unu punkton, ol radiigi ilin sur multajn fakojn de la sciado. Ankoraŭ plue ŝi volis, ke, en la okazo se Ĝojo elektos la muzikon kiel profesion, ŝi fariĝu unuaranga muzikistino.

Por ebligi tion, Ĝojo devus ne perdi tempon,

sed devus senprokraste komenci sisteman kurson de la muziko kaj persiste labori super ĝi. En tia okazo post nemulte da jaroj ŝi posedus rimedojn por vivado, ĉar ŝi povus almenaŭ havigi al si lernantojn.

Cetere Lilio komprenis, ke, se ŝi permesos al Gojo prepari sin por la muzika profesio, ŝi ne povas antaŭscii la finan rezultaton.

Doktoro Kellermann esprimis la esperon, ke publika kariero etendiĝos antaŭ Gojo, kaj, kvankam Lilio tute ne kredis, ke ĉiuj anoj de la muzikistaro estas nemoralaj, tamen ŝi klare vidis, ke ĉe ili estas multe pli malfacile vivi simple kaj pure, ol ĉe tiuj personoj, kiuj perlaboras malpublike.

La vivrimedoj mem de muzikisto kaj aktoro dependas de la grado, je kiu ili povas per la esprimado de sia arto elvoki admiron kaj laŭdesprimon de la aŭdantaro. Ili vivas per la aplaŭdo. Ĉiu, eĉ la plej malgranda, signo de la publika favoro pli firmigas al ili la oficon, pli-altigante ilian valoron en la estimo de la administrantaro. Plue, la sukceso de artisto ofte dependas ne sole de la artkapablo, sed ankaŭ de la persona ĉarmo kaj plaĉivolo. Tial propravole Lilio ne elektus tiaŭ vivmanieron por sia filino. Ŝi facile prezentis al si la apartajn tentojn, per kiuj svarmas la vojo de muzika artistino, precipe de tiu, kiu sukcesas. Povas trapasi ilin nemakulite nur tiu, kiu estas esence pura kaj kies karaktero estas fortigita de la disciplino. Krom tio la tentoj sin montras tre frue en la vivo.

La socio kutime invitas la junulojn kaj junulinojn, kiuj scias lerte kanti, ludi, aŭ deklami, speciale por tio, ke ĝi tiru al si profiton el ilia talento, kiu faciligas al ĝi la plezuran ŝarĝon de regalado. La socio ne ĉiam sentas personan altiriĝon al la artistoj, kiuj tiel malavare helpas al ĝi, kaj neniam ĝi sentas sin iel responda pri tio, kio fariĝos kun ili: kio grava tio estas por ĝi?

Vole-nevole la junaj artistoj devas akcepti la invitojn, kaj kaŭze de tio ili akiras la kutimon pasigi la vesperojn en gaja socio for de la hejmo, ricevante flaton sub la nomo de ŝato de ilia talento. Oni proponadas al ili riĉajn manĝaĵojn kun alkoholaĵoj, kaj iom post iom ili akiradas kutimojn de nesobreco, fortigantajn en ili heredajn tendencojn, se ĉi tiuj jam antaŭe en ili ekzistas.

La komenciĝo aŭ plifortigo de la apetitoj al alkoholaĵoj ne estas la sola danĝero. Tio estas nur signo de la kutimiĝo al ĉiuspeca sinindulgo kun la naskiĝo de tendencoj kaj idealoj nealtaj. Tiel inside ĉio ĉi tio energias en ili, ke la lastaj, kiuj konstatas la danĝeron minacantan la gejunulojn, estas la gepatroj, kiuj devus antaŭvidi kaj kontraŭstari ĝin. Kiam ili ja rimarkas la danĝeron, ĉi tiu jam efektiviĝis, atinginte forton preskaŭ nevenkeblan.

Pro sia temperamento la efektiva artisto inklinas facile cedi al tento, ĉar li estas—li devas esti—tre emocia kaj facile influebla.

Ĉiuj belaĵoj de la sono, la formo, la koloro kaj gusto efikas pli forte sur lin, ol sur la pli multajn

el la homoj. Plue, *li devas kvazaŭ kulturi la emociemon en si*, se li volas lerte manovri sian artkapablon. Se li ne faras tion, malgraŭ alta intelekto li ne tute sukcesos kiel artisto.

La ekvilibro do estus por li la plej dezirinda afero. *Li ja havu akrajn sentkapablojn, sed li povu ilin regi.* Li celu egalpezigi la vivmanieron kiel eble plej ĝuste, por ke li povu regi la volon kaj dezirojn. Eble tiu estas la plej perfekta artisto, kiu ne nur plene konscias la povon de la emocioj, sed kutimiĝinte trocedi al ili jam scias kial kaj kiamaniere ilin regi.

Ĉi tiuj kaj ankoraŭ multe pli da pensoj trakuris la kapon de Lilio, dum ŝi longe kaj serioze konsideradis la ankoraŭ ne certan sed tamen kredeblan karieron de sia malgranda filino.

Fine ŝi decidis fari la unuan paŝon: permesi, ke Ĝojo ricevu la lecionojn de muziko de profesoro Delsarte en la daŭro de ses monatoj, kaj lasi ĉiujn sekvaĵojn malvolviĝi laŭ la volo de Dio.

En la mateno de la sekvinta tago ŝi penis klarigi al Ĝojo pri la neatendita sorto trafinta ŝin, parolante nur pri tiuj flankoj de la afero, pri kiuj la infano povis kompreni, kaj finante per la vortoj:

— Vi devas pasigi multe da tempo ĉiutage en la ekzerciĝado. Ne decus, ke vi laboru nur laŭ via inklino; pli ĝuste diri, vi devos tiel disciplini vin, ke vi ĉiam estos inklina diligente labori super la ekzercoj difinitaj al vi de la muzikestro. Plue, vi devos studi ne nur la violonon, sed la muzikan arton mem kaj la vivhistoriojn de la eminentaj komponistoj, kun la celo kompreni iliajn verkojn.

CAPITRO XXIII

Grandan malfacilon Gojo ne trovis en la lecionoj, kiujn ŝi ricevis de la profesoro. La lecionoj pri teorio forte interesis ŝin.

Tamen estis ofte necese devigi sin fari la postulatan kvanton da praktika ekzerciĝado. La konstanta ripetado tedis ŝin. Ŝi deziris sekvi la propran iniciativon kaj antaŭeniri per eksaltoj, anstataŭ malrapide, paŝon post paŝo, laŭ la saĝaj konsilo kaj instruado de la profesoro.

Efektive dum la unuaj jaroj de ŝia studado ŝajnis al Gojo, ke anstataŭ doni al ŝi novan scion, la instruistoj nur revokis en ŝin scion jam antaŭ longe akiritan sed kaŝitan ĝis nun en malklare rememorata pasinteco.

La lecionoj pri la harmonio malvolvis antaŭ ŝi plezurplenan kampon de laboro, kiu fariĝis netakseble utila por ŝi.

Kredeble la leganto rememoras, ke kiam Gojo ankoraŭ estis etulino, ŝi de tempo al tempo aŭskultis muzikon neaŭdeblan por ordinaraj oreloj.

Poste, kiam ŝi komprenis la harmonion, venis tago, kiam ŝi neatendite retrovis la povon preskaŭ forgesitan, aŭskulti belan muzikon devenantan de iu loko ne sur la tero.

De tiu tempo, kiam okazis io, kio pli ol ordinare altigis al ŝi la emociojn precipe agrablajn aŭ simpatiajn, stranga sento de paco sekvadis, kaj kvazaŭ ekstazo ekposedis ŝin, kiam ŝi sin trovis

sola kaj neinterrompebla. Plej ofte tio okazis ne longe post kuŝiĝo.

La paco, kiu senteble ŝteliris sur ŝin, estis io pli, ol simpla kontenteco. Ŝajnis al Gojo, ke ĝi estas plena de okazantaĵoj en alia mondo, kie ekzistas objektoj kaj estaĵoj nevidataj de la ordinarulo, sed kien la konscieco de Gojo kvazaŭ transiris.

Komence ĉio estis neklara; ŝi sentis, ke ŝi povas preskaŭ vidi, preskaŭ palpi, preskaŭ aŭdi ion nedistingeblan, sed se ŝi restis tute senmova, kun la menso trankvila, tiam poste, kvazaŭ sur spegulo, ĉio reflektiĝis, kaj fine ŝi klare ricevis la muzikon.

Jen ŝi nur aŭdis, jen ŝi nur vidis vizion, sed plej ofte ŝi vidis kaj ankaŭ aŭdis, kaj poste, rekonsciiĝinte, ŝi povis interpreti la temon en surteran muzikon.

Per unu vorto ŝi komencis verki originalan muzikon, sed sekrete, dirante nenion pri ĝi eĉ al la kara patrino.

Venis tago, kiam ŝi kuraĝis ludi unu el siaj verketoj antaŭ doktoro Heinrich Kellermann kaj negranda aŭdantaro en salono de lordo Aston, kie okazis vespera festo, kies muzika programo estis aranĝita de la doktoro kaj lia frato.

Okazis, kiel ja ĉiam antaŭe okazis ĉe Gojo, ke, kiam ŝi finis ludi, oni laŭte kaj longe aplaŭdis, devigante ŝin reveni, por ludi ankoraŭ unu fojon.

Tio estis ŝia lasta ero sur tiu programo, kaj subite venis al ŝi en la kapo la decido, provi nun, kiel oni akceptos unu el ŝiaj verketoj.

Antaŭ ol komenci, ŝi paŝis al sinjoro Karl Kellermann kaj flustris :

— Mi plivolus ludi neakompanate ĉi tiun fojon.

Dum ŝi ludis, doktoro kaj sinjoro Kellermann miris pli kaj pli, ĉar fremda por ili estis la komponaĵo, kiun Ĝojo ludis, ne sciante aŭ ne memorante, ke ŝi pekas kontraŭ regulo de la doktoro. Ĉi tiu ne permesis al siaj instruatoj, nek al iu partoprenanto en la programoj de li aranĝitaj, ke ili enkonduku novaĵon sen lia vorto de aprobo.

Feliĉe la muzikaĵo de Ĝojo trafis la aŭdantaron, kaj pli ol unu voĉo aŭdiĝis, petante ĝian nomon.

Iom konfuzite, Ĝojo respondis al la demandoj, ŝtelrigardante la vizaĝon de la doktoro, kies opinion ŝi volus ekscii.

Tamen li neniel montris, kion li pensis, ĝis la sekvanta mateno, kiam Ĝojo devis iri al li por ricevi la kutiman lecionon. Tiam li ŝin salutis per la vortoj :

— Kial vi kuraĝis ludi neakompanate lastan vesperon, kaj kio estas la nomo de la komponisto. Ĉu mi konas lin ?

— Pardonu mian arogantecon, sinjoro, mi ne bone faris, ke mi ĝin ludis, sed . . . sed . . . fakte, mi volis provi, kiel efikos sur la homojn . . . originalaĵo mia.

— Kial do vi ne submetis ĝin antaŭe al mi ? Fiasko povus rezulti.

— Mi mem tute ne sciis antaŭe, sinjoro ; la penso tentis min . . . subite, dum oni aplaŭdis mian ĵusan ludon, kaj mi cedis al ĝi . . . tio estas ĉio. Mi bedaŭras, ke mi kaŭzis al vi ĉagrenon ; cetere mi ne povas ne ĝoji, ke oni tiel bone

ricevis mian verketon. Se, sinjoro, vi povus aldoni vorton de laŭdo pri ĝi, mi ja estus feliĉa, sed mi timas . . .

— Ne timu, fraŭlino, en ĉi tiu okazo la rezultato pravigas la agon, sed ne faru tiel denove! Mi iom ŝatis la verketon, tamen mi devas denove aŭskulti ĝin, antaŭ ol esprimi definitivan opinion. Volu ludi ĝin denove.

Kun ruĝaj vangoj kaj nekuraĝaj okuloj Gojo prenis la violonon kaj faris laŭ la peto de la instruisto.

Kiam ŝi finis kaj formetis la violonon kun ĝia arĉo, la doktoro plue parolis.

— Jes, ĝi estas ludinda. Ĉu vi havas pluajn verkojn originalajn?

— Mi havas, sinjoro—konfesis Gojo—ankoraŭ multajn. Eble vi konsentus trarigardi kaj kritiki ilin. Jen ili:—ŝi aldonis, prenante aron da manuskriptoj de sia sur seĝon ĵetita mantelo kaj metante ĝin antaŭ doktoro Kellermann.

— Bone, mi trarigardos kaj poste konsilos vin pri ili. Nun, fraŭlino, al la leciono! ni ne malŝparu la tempon.

La tempo, kiu ordinare pasis tiel rapide ĉe Gojo nun treniĝe iris, kvazaŭ kripligita. Forte dezirante la juĝon de kompetentulo, ŝi samtempe timis ĝin. Kiam la horo venis, kiam ŝi devis denove viziti la instruiston, la hela esprimo sur la vizaĝoj de ambaŭ fratoj ne povis ne esperigi ŝin.

Ŝi devis respondi al multe da demandoj pri la verkoj: kiam ŝi la unuan fojon komponis?

Por kio? Kial ŝi ne antaŭ longe montris al la instruisto la komponaĵojn?

Subite la doktoro surmetis la manuskriptojn sur la tablon antaŭ Ĝojo, dirante:

— Mi aprobas vian verkadon. Ĝi estas ne nur originala, sed ankaŭ bone, konscience ellaborita. Pri kelkaj ne tre gravaj punktoj mi volus paroli kun vi. La frato kaj mi volonte vizitos vian patrinon en la proksima dimanĉo, se tio estos agrabla por ŝi, kaj tiam, dum li parolos kun ŝi la negocan flankon de la afero, vi kaj mi povos priparoli pri la muzikaĵoj. Mi povas diri al vi, ke se vi tion deziras, kredeble vi povos gajni monon se ne famon, vendante kelkajn el ili.

— Kompreneble mi deziras akiri monon kaj famon! Tamen mi tute ne pensis pri tio, kiam mi komencis verki, nek kiam mi ludis en la salono de lordo Aston! Mi preskaŭ ne povas kredi pri mia feliĉo!

Pensante pri la afero, kaj sentante efektivan plezuron pri la esperoj vekitaj en ŝi de doktoro Kellermann, Ĝojo tamen sentis kvazaŭ tremon de timo pro tio, ke la komponaĵoj ŝajnis al ŝi tiel intimaj. Kelkaj estis kvazaŭ eltiraĵoj el la tagolibro de ŝia propra vivhistorio, el la interna, vibre vivanta memo, kiu iam ŝajnis loĝi en aparta regiono, for de teraĵoj.

Grandan plezuron ŝi trovis, verkante ilin. Ĉu eble ŝi pligrandigos tiun plezuron, se ŝi eldonos ilin, disdonante ilin al multaj aliaj homoj? Eble se ŝi ĉiam tenus ilin por si, la ĉiele sendita povo aŭdi kaj verki la belan muzikon for-

lasus ŝin, la vizioj de alia mondo ĉesus! Fine, kiel grandplezure estos al ŝi, povi ŝveligi la enspezon de la kara patrino, kiu oferis tiom multe, por ke ŝi—Gojo—fariĝu unuaranga muzikistino. Plue, ankoraŭ unu jaro devos pasi antaŭ la plenumiĝo de la kontrakto kun la doktoro, kiu tiel pacience instruadis kaj konsilis ŝin. Ŝi decidis agi laŭ lia konsilo.

CAPITRO XXIV

Mia frato jam elektis tri el la komponaĵoj, kaj, kun la konsento de vi kaj fraŭlino Ĝojo, ni eldonos ilin aparte po unu en tri sin sekvantaj monatoj—diris sinjoro Karl Kellermann, sidante en la bonguste aranĝita saloneto de sinjorino Ĉester, al kiu li parolis.—Komence ni volus eldoni la grupon da arioj, konsistantan el "Tri Fazoj de la Maro: (*a*) *La Ludilo*, (*b*) *La Batalejo*, (*c*) *La Lasta Ripozejo*." Sur afiŝoj kaj programoj ni grandlitere anoncos la daton, kiam fraŭlino Ĝojo ludos ĝin la unuan fojon antaŭ la publiko. Krom tio ni anoncos per la gazetoj, ke ekzempleroj estos aĉeteblaj en la koncertejo, kaj ke la unuaj dudek aĉetantoj ricevos aŭtografajn ekzemplerojn. Tio trafos! Oni avide aĉetos, kaj tio "ekruligos la pilkon." Poste en aliaj urbegoj sur la kontinento, kie la fraŭlino ludos dum la sezono, mi faros tiel same. Tiamaniere mi estas certa, ke ni povos vendi la tutan unuan eldonon. Se, kiel ni esperas, la verkoj trafos la animon de la homoj, estos facile fari pluajn eldonojn kaj ankaŭ aranĝi pri la eliro de aliaj komponaĵoj de nia fraŭlino Ĝojo.

—Ni ne povas esti tro dankaj al vi, sinjoroj, por via klopodado, via ĉiama afableco, kaj ni ne povas pli bone fari, ol lasi al vi aranĝi ĉion laŭ via bontrovo.

—Ni estas feliĉaj, ke ni povas vin servi, sin-

jorino, kaj ne forgesu, ke ni gajnos samtempe kun fraŭlino Ĝojo, se ĉio prosperos laŭ niaj esperoj.

— Kio estas la nomo de la dua kaj tria komponaĵoj elektitaj de doktoro Kellermann?— demandis sinjorino Ĉester.

— Jen ili. Unu estas valso sen ia titolo. Mi konsilas, ke fraŭlino Ĝojo nomu ĝin "La Valso de Ĝojo." La alia estas "Revado en Arbareto." La publiko ĉiam volonte aĉetas novan valson kaj ankaŭ sentimentalaĵon tian, kia "La Revado en Arbareto," precipe kiam ili povas aŭskulti dum la komponinto ludas ĝin. Mi antaŭsentas grandan, sensacian sukceson.

La du fratoj foriris, kaj la rideto sur la vizaĝo de Lilio estis tre kontenta, kiam ŝi rigardis sian filinon Ĝojon.

Estis la horo de sunsubiro. La ĉielo estis hele lumita de ruĝaj, oraj, kaj violkoloraj nuboj, kiam Lilio diris :

— Mia filino, mi estas fiera pri vi. Mi esperas, ke via vojo tra la vivo estos tiel hela kaj glora, kiel estas la nuna vespera ĉielo. Ofte mi fieris esti via patrino, sidante en la koncertejo kaj aŭskultante la aplaŭdon, kiun vi ricevis. Kiom pli forte mi fieros, kiam vi ludos viajn originalajn komponaĵojn!

Ĝojo alŝovis brakseĝon kaj piedbenketon, kaj, komforte sidiginte la patrinon, ŝi mem sidiĝis sur la seĝa brako kaj diris :

— Ne tro laŭdu min, panjo mia! La kaŭzo de mia ĝisnuna sukceso kaj de ĉiu en mi bona inklino estas nur tial, ke vi ĉiam instruadis al mi

esti diligenta, ĉiam instigis al mi celi la bonan kaj noblan en la vivo. Krom tio, via propra vivmaniero ĉiam estas por mi viva ekzemplo kaj inspiro. Plej forte plaĉas al mi tio, ke mia esperebla sukceso ebligos al mi iom rekompenci vin por via konstanta elspezado pro mi.

— Vi mem estas mia rekompenco, infano mia.

— Patrino, mi volus vian helpon pri io, kio ŝajnas al mi grava afero. Mi mem ĉiam ricevadas tiom multe da feliĉo kaj bonaĵoj en mia vivo, kaj mi tre deziras, ke mi povu, se nur iomete, pliigi la feliĉon al aliaj homoj, kiuj ne havas tiom, kiom mi. Mi precipe aludas pri la kripluloj. Du venas ofte al la koncertoj de doktoro Kellermann, kaj ili videble ĝuas la muzikon. Oni ĉiam veturigas unu en la koncertejon per horizontala puŝveturilo. Tiu ŝajnas esti bonstata, sed la dua pene iradas kaj, alveninte tre frue, ĉiam sidas en la plej antaŭa vico de la plej malkaraj sidlokoj. Kiam ĉi tiuj ĉeestas, mi speciale penas trafi ilin per mia ludado. La penso ofte frapis min, ke kredeble ankoraŭ multaj kripluloj ekzistas, kiuj amas la muzikon, sed ne povas aŭskulti ĝin pro la malriĉeco. Se ja estas tiel, mi volonte dediĉus unudu horojn en ĉiu semajno por fari al ili plezuron. Ĉu tio estas iel farebla?

— Kara infano, via penso plaĉas al mi, sed mi ankoraŭ ne scias, ĉu eble ekzistas ia azilo por kripluloj. Ni demandu pri la afero. Se tia azilo ekzistas ne tro malproksime de ni, eble oni permesus al vi iri al ĝi kaj muziki antaŭ la pacientoj.

CAPITRO XXV

Ricevinte tiom da kuraĝo de la fratoj Kellermann kaj poste de la rapida vendiĝo de kelkaj siaj komponaĵoj, Ĝojo decidis, ke ŝi jam komencos laboradi laŭ plano super la ceteraj.

Celante tion, ŝi elektis kaj sisteme aranĝis kelkajn el siaj manuskriptoj kaj poste aldonis pluajn komponaĵojn, por fari el la tuto alegorian opereton.

Komence la muziko esprimis la simplan, ĝojan nerespondecon de la infanaĝo de la homo, kiun Dio kreis "el polvo de la tero." Iom post iom la muziko montris la riĉiĝon de la homa sperto, kiam la sentoj, deziroj, emocioj, kaj intelekto malvolviĝadis, ĝis la homa korpo, fariĝinte perfekta ilo, estis preta akcepti la specialan enblovon de la Dia spirito, kiu "faris el la homo viva animo." La polvulo fariĝis ĝis ia grado spiritulo.

Poste fariĝis la neevitebla rezultato: la tentado. Tio estas la batalado inter la nove enspirita Dia esenco, kiu ankoraŭ estas kvazaŭ ĝermo, kaj la jam fortika, materia korpo de la homo; per aliaj vortoj la ĉiutaga batalo inter la kreskanta animo kaj la fizika korpo de la homo. Ambaŭ volis estri. En la unua tempo la vivaj, dorlotitaj sentiloj ĝuadis absolute neregeblan liberecon, ĝis kiam, ellacigite per la troa dorlotado mem, ili devis cedi.

En la muziko ĉe ĉi tiu punkto okazis laŭta krakado kvazaŭ de tondro. Post sentebla paŭzo aŭdiĝis ĝemsopiro longe daŭranta, kvazaŭ de mortanto. Denove paŭzo, kaj poste aŭdiĝis la plej mallaŭta, dolĉa melodio imagebla, ĉiam pli kaj pli laŭtiĝanta kaj triumfe ŝvelanta. Tio montris la iom-post-ioman leviĝadon de la venkinta, Spirita memo, kolektanta kaj konservanta siajn fortojn, kvazaŭ ĝi volus dispremi la mortantan kontraŭulon.

Sed anstataŭ dispremi, la venkinto levis la falinton kaj metis ĝin sur ĝian ĝustan lokon, kie ĝi ĉiam servos la spiriton, kies servanto ĝi fariĝis.

De tiam ĝis la fino de la opereto aŭdiĝis rava kantado, montranta la harmonion, kiu iam ekzistos, kiam la Dia parto de la homo efektive superregos la materian, kaj ĉiuj kapabloj estos uzataj por la bono de la homaro.

Tia estis la temo de la opereto. Ĉiuj admiris la muzikon, sed nur tre malmultaj efektive ŝatis ĝin, ĉar nur malmultaj homoj povis tute kompreni ĝian alegorian flankon.

Gojo finis la opereton, tuj antaŭ ol festi sian dudek-unuan naskotagon, kaj ĝin submetis al la kritiko de sia antaŭa instruisto, doktoro Kellermann, kaj ankoraŭ unu kompetentulo.

Eble la leganto miros, ke Gojo, kiu estis tiel juna kaj vivis tiel simple, kiel permesis nur ŝia profesio, povis tiom multe plenumi en tia mallonga tempospaco, kaj ke ŝi posedis sufiĉe grandan kvanton da *kruda materialo*, per kiu krei efektive gravan verkon. La leganto eble pensos,

ke mankis al Ĝojo tia diverseco de persona spertado, kia estas nepre necesa por homo, kiu deziras krei artaĵon montrantan la plej subtilajn nuancojn de homa emocio, samtempe ampleksantan tiel grandegan temon, kiel estas la evolucio.

Sed malgraŭ la juneco kaj ŝirmateco de Ĝojo, ŝi ne nur travivis multon, sed ankaŭ ŝi posedis tiujn duopajn kapablojn, kiuj sole rajtigas, ke oni verku: la kapablon senti kun la homoj kaj la kapablon esprimi tiun kunsenton per tiel kortuŝa aŭ intelektoĉarma maniero, ke la aŭskultantoj aŭ la legantoj, absorbiĝinte de la muziko aŭ rakonto, konscias iom pli forte ol antaŭe sian unuecon kun la cetero de la homaro.

Pli ol tri sezonojn ŝi pasigis, vizitante la plej gravajn ĉefurbojn de Eŭropo, krom tio, ke ŝi studis iom da tempo ĉe la Lejpciga konservatorio. Doktoro Kellermann aranĝis pri tio, kaj tiamaniere Ĝojo jam de longe renkontiĝis kun la plej eminentaj komponistoj kaj profesoroj en la muzika mondo de tiu tempo.

Grandvalore estis por ŝi vivi en tia muzika atmosfero, aŭskulti la verkojn de la malnovaj majstroj interpretatajn de iliaj samlandanoj kaj en ilia propra patrujo.

Cetere, oni memoru, ke la efektiva sperto de la vivo venas de interne ne de ekstere de la homo.

La vivipovo kaj homecaro jam ekzistas kaŝitaj en nove naskita infaneto, tamen ili ne povas evolucii, daŭri, aŭ maturiĝi sen la helpo de la eksteraj influoj de la amo, edukado, disciplino tiel certe, kiel semo de kreskaĵo ne povas ĝermi, malvolviĝi, kaj ekflori, malgraŭ la kaŝita en ĝi

vivipovo, sen la eksteraj influoj de la malsekeco kaj aliaj ecoj de la teraĵo kaj vetero.

Oni povas esprimi nur tion, kion oni komprenas. Ofte oni akiras komprenadon per propraj travivaĵoj, per ŝanĝiĝoj de cirkonstancoj kaj ĉirkaŭaĵoj, rezultantaj en ŝanĝo de pensoj kaj emocioj. Sed ankoraŭ alia maniero kompreni ekzistas: per la amo, per konscia kunsentado kun aliaj, ĉar la amo estas unu el la plej bonaj vojoj al la komprenado.

Laŭ la mezuro de nia amo al aliaj, laŭ la mezuro de nia kapablo rilati kun kaj servi al aliaj, ni vivas en la realeco kaj lernas kompreni kaj esprimi veraĵojn. La amo pliĝustigas nian vidpunkton, pligrandigas nian vivperspektivon, kaj akrigas nian internan vidpovon. Ĉar kiu amas, tiu ne povas ne partopreni en la okazoj, idealoj, sopiroj, suferoj, kaj plezuroj de la amataj. Plue, inter tiuj, kiuj amas sin reciproke, unuj ne povas fariĝi pli puraj, noblaj, kaj animfortikaj sen tio, ke ili, kiom ajn malforte, inklinigu la amatajn ankaŭ al pliboniĝo. Kontraŭe oni ne povas malaltiĝi sen ia, kiom ajn nekonscia, malbona efiko sur ĉiujn, kiuj per la amo aliĝis al li.

Sed ĉar la efiko sur aliajn estas ĉiam subtila kaj plej ofte nekonscia, tial oni ne povas mezuri nek direkti ĝin. Ĉio, pri kio ni povas esperi estas, ke ni mem konscie elektu la direkton de nia pensado. Se ne konscie, tiam nekonscie ni ja ĉiam elektas ĝin, ĉar tiel same, kiel ĉe ĉiuj konataj fortoj, la pensoj sekvadas la vojon plej senpene ireblan.

Se ni ne malpermesas, ke niaj pensoj sekvu tiun direkton, kiun ili inklinas sekvi, tiam per tiu simpla neago, ni kvazaŭ malbaras al ili vojon, kiu fariĝas pli facile irebla ĉiufoje, kiam ĝi estas uzata.

Per aliaj vortoj ni akiras pensan kutimon.

Krom tio, elektinte nian vojon tra la mondo de pensado, vole-nevole ni inklinas esti antaŭen ŝovataj de ĉiuj simile pensantaj homoj.

Ju pli iuj homoj amas sin reciproke, des pli forte iliaj pensoj influas ilin reciproke, ĉar, kiam ĉio estas dirita, kio estas la amo? Ĉu ĝi ne estas la dia parto, la efektiva, eterna memo de la homo? Ni devas tion kredi, se ni ja kredas, ke "Dio estas amo," kaj ke "Dio kreis la homon laŭ Sia bildo."

Se tio estas vera, tiam ju pli forte kaj pure ni amas, des pli ni proksimiĝas al efektiva simileco al Dio, kaj des pli profunde ni povas penetri sub la eksteran tavolon de la cirkonstancoj kaj atingi la kaŝitajn aferojn de la surtera vivo.

Plue, se tio estas vera, tiam, kiel ajn dezirinde estas, ke oni estu amata—kaj la homa koro sopiras al tio—ankoraŭ pli dezirinde estas, ke ni mem amu, ke ni trovu elfluejojn por tiu amo, kiu povas daŭri nur tiel longe, kiel ĝi estas uzata en la servado de aliaj. Tiamaniere oni akiras certan scion koncerne la plej sciindajn aferojn de la vivo.

De tiu vidpunkto Gojo ĝuis spertoriĉan vivon. El la multenombraj homoj de diversaj aĝo, karaktero, kaj temperamento, kun kiuj ŝi ĉiutage rilatis kaj sentis simpation, ĉiu influis iagrade, kiel ajn malforte, sur ŝian karakteron.

Nedube, ke la patrino efikis la plej forte sur

ĝin, ĉar ŝi la plej konstante, intence kaj de la plej frua aĝo de Gojo celis ĝuste tion. Ŝia influo estis ĉiam nobliga, kaj ŝi aldonis la plej belajn, melodiajn ecojn al la efektive artista kaj bonintenca spirito de la infano, kiu iom post iom malvolviĝis.

Sed la homo, kiu volas efektive sciiĝi pri la vivo, por ke li pentru ĝin kiel ĝi ekzistas, montrante samtempe, kiamaniere oni povas ĝin plibonigi, devas suferi. *Ami kaj suferi*—oni ne povas disigi la du vortojn, ĉar ili estas la du flankoj de la sama afero. Oni povas akiri la kunsentadon nur tiam, kiam oni travivis almenaŭ iomgrade la du flankojn.

Tial ankaŭ en la vivo de Gojo venis de tempo al tempo iaspeca suferado.

La unua konscia neharmonio, kiu sentigis sin en ŝi, estis la doloro venanta de la nenobla flanko de ŝia propra naturo. Tio estis la fajrero de ĵaluzeco, kiu subite sentiĝis en ŝi, kiam Florenco kaj Filipo revenis de la edukejo. La dua okazis nelonge post la morto de Florenco, kiam ŝi aŭskultis la kruelajn vortojn de la avino, kiu neniam amis ŝin. Ambaŭ doloraj travivaĵoj estis necesaj por la plena disciplinado de Gojo. Poste sekvis longaj jaroj de la akra, kaŝita doloro de timo, la surda doloro de dubo, ŝin pensigantaj, ke eble ŝi havas nenian rajton en la hejmo, pri kiu ŝi antaŭe kredis, ke ŝi havas ĉiujn rajtojn apartenantajn al feliĉa infaneco.

Ĉi tiuj travivaĵoj malkovris antaŭ ŝi multajn aferojn de la vivo, kiuj sen tio ne evidentiĝus, almenaŭ antaŭ ol ŝi fariĝus pli aĝa.

Je ĉirkaŭ tiu tempo ŝi ankaŭ komencis konstati, ke la malriĉeco ekzistas en la mondo, ke la matureco ne certigas al homo havi kaj fari laŭvole, ke ekzistas iu Fortulo pli grava kaj forta, ol la patrino, al kiu ĉi tiu voĉe preĝadis ĉiumatene, petante helpon, saĝon, forton. Per ĉi tiuj " familiaj preĝoj " Lilio kvazaŭ elverŝis ĉion en la koro, forgesante la tempon kaj ĉion krom la helpo tiel forte bezonata. Granda estis ŝia fido, ke Dio sendos tiun helpon, kaj ke ne mankos al ŝi la rimedoj necesaj por bone nutri kaj instruigi la infanojn. Kun tiu celo ŝi preĝadis por laborado en la formo de pensiuloj kaj kudraĵo, pri bona sanstato, por ke ŝi povu plenumi ĉion postulatan je ŝi. Poste, ricevinte " respondon " al iu peto, ŝi ne forgesis danki al Dio pro tio.

Kredeble estas, ke ĉi tiuj fervoraj preĝoj, elverŝaĵoj el zorgoplena koro, esprimante la plej intimajn pensojn de la patrino, reagis sur la koron kaj karakteron de la malgranda filino, kiu partoprenadis ilin, kaj ke tio faris ŝin pli sciema, pensema, kaj intuitive konscia pri la zorgoj de la mondo, ol ŝi estus en alia ĉirkaŭaĵo.

Ankoraŭ alia afero pligrandigis en ŝi la scion pri homa suferado, plifortigante ŝian kunsenton kun la homoj ; tio estis la oftaj ŝiprompiĝoj, kiuj okazadis en proksimeco de Riverton.

La savboatejo staris en vido de la domo de Lilio, kaj tie post noktiĝo, se lumo ekbrilis, tiam oni sciis, ke ŝipo estas en danĝero, ke la kuraĝaj anoj de la savboato preparas sin, por riski sian vivon sur la tumulta ondaro blovata de la

ventego, en la espero savi tiujn, kiuj per raketoj petis ilian helpon.

Kiam estis blovege, en malluma vespero, Lilio ofte levadis la kapon de super ia kudraĵo, dirante :

— Iru, Ĝojo, kaj rigardu tra la fenestro por vidi, ĉu lumo estas en la savboatejo.

Ĝojo glitadis malantaŭen de la dikaj kurtenoj kaj la rulkurteno, por pli bone vidi. Kiam ŝi povis respondi :

— Ne, panjo, estas mallume ekstere. Lilio fervore ekkriis—Dio estu dankata. Kiam iufoje, emociiĝinte, Ĝojo diris :—Jes, panjo, vidu, ja estas lumo! Lilio respondis :—Kompatindaj suferantoj! ili estas en granda danĝero! Sur la genuojn, Ĝojo ; ni preĝu pri ili kaj pri ĉiuj, kiuj estas en danĝero sur la maro!

Tiam vibro de ekscito trakuris la infanon. Efektive ŝi nenion vidis krom la lumeto iom malproksima, sed la fantazio prezentis antaŭ ŝi la furioze ĵetatan akvon, la ŝtonegajn bordkrutaĵojn de la "Flavaj Nazoj," la sablan baron apud la enmariĝo de la rivero, kaj timplenan homamaseton atendantan la morton sur ŝipo balanciĝanta senpove, dum la vento blovadas kaj la ondegoj portadas ĝin jen al unu jen al alia el tiuj lokoj de danĝero.

La fantazio pentris ĉion des pli klare, ĉar ne nur la preĝoj de la patrino impresis Ĝojon, sed ankaŭ la rakontado kaj priparolado, kiun ŝi pli ol unu fojon aŭskultis pri ŝippereoj kaj mirindaj savoj el la faŭko de la morto.

Ankoraŭ unu granda influo sur la karakteron de Ĝojo estis la kutimo dediĉi kelke da tempo

ĉiutage, kiam tio estis ebla, al silenta meditado ĉirkaŭ sunsubiro, dum ŝi rigardis la koloriĝon de la ĉielo. La patrino kaj filino kutimis sidi kune, ĉar ambaŭ opiniis, ke ĉe mateniĝo kaj vesperiĝo oni povas pli forte ol ĉe ĉiu alia fenomeno natura, konscii pri la gloro kaj majesteco de la Kreinto.

Dum ili rigardis la ŝanĝiĝantajn kolorojn, spegulitajn sur la ĉielo kaj rivero, dolĉa, helpa influo ŝteliris sur ambaŭ, kaj konsciigis ilin, ke Dio estas ne nur Forto, sed ankaŭ Lumo kaj Amo.

Vintre, rigardinte ĝis la forfandiĝo de la helaj koloroj, aŭ kiam nuboj kaŝis la ĉielan gloron, Lilio kaj Gojo sin turnis al la fajro, amuzante sin per rigardoj al la dancado de la ombroj sur muroj kaj mebloj, aŭ ili paroladis pri tio, kion ili ĵus vidis, imagis, aŭ pensis.

Ĉi tiu estis kvazaŭ feina horo, kiel por lacigita Lilio, tiel ankaŭ por Gojo, kiu kutimis tiam libere esprimi siajn idealojn, pensojn, kaj fantaziaĵojn. Tamen, kiam Florenco kaj Filipo estis hejme, la tempo de meditado kaj intima interparolado devis esti tre mallongigita, ĉar la pliaĝaj infanoj ne volis " malŝpari " la tempon, plivolante amuzi sin per ia ludo aŭ alia faro.

Sed kiel oni jam scias, Florenco frue malaperis el la familia rondo, kaj Filipo poste foriris, elektinte la maristan vivon. Tion Lilio tre bedaŭris, sed per nenio povis malhelpi. Iafoje ŝi demandadis sin :—Ĉu tiu forta, nevenkebla deziro de mia filo venas de tio, ke antaŭ lia naskiĝo, miaj propraj, plej fortaj deziroj estis direktataj al marvojaĝo ?—ĉar ŝi memoris, kiel sopire ŝiaj pensoj sekvis la karan edzon forveturantan al fremda lando.

Ankoraŭ unu forta influo sur la vivon de Ĝojo estis la amikeco, kiu fariĝis inter ŝi kaj Jaĉjo, la filo de gesinjoroj Leden. Lin ŝi ekkonis, kiam ŝi estis sepjara kaj li preskaŭ dekjara. En tiu tempo ŝi ne transpasis la limojn de Riverton krom unufoje, kiam iu sinjorino loĝanta ĉe Lilio prenis ŝin al Liverpolo, por vidi ian spektaklon.

Tio altigis la plezuron, kiun ŝi sentis, aŭskultante Jaĉjon, kiam li rakontadis historiojn pri aliaj lokoj konataj de li.

Li estis preciza, praktika knabo, kiu kutimis detale vidi ĉion vidindan, sed li ne estis tiel emociiĝema, kiel Ĝojo. Ordinare li ne volis kolegiĝi kun knabinoj, sed jam de la komenco li amikiĝis kun Ĝojo, al kiu li poste konfidis la plezurojn, triumfojn, kaj malfacilaĵojn de la lerneja vivo.

Li vizitadis edukejon en Liverpolo, kie li restadis de lundo matene ĝis vendredo, kiam li revenis hejmen.

Dum la fino de la semajnoj, li kaj Ĝojo kune pasigis multe da tempo. Kune ili suprenrampis la krutan ŝtupetaron de la lumturo, vizitis la fortikaĵon, vadis en la rivero dum malaltmaro, saltis de roko sur rokon, serĉis krabojn sub ĉiuj grandaj ŝtonoj kaj ĉiuspecajn trovindaĵojn en la lagetoj kaj sur la sablo.

Sennombraj estis la plezuroj, kiujn ili kune ĝuadis, krom tio, ke Jaĉjo povis instrui Ĝojon pri la diversspecaj ŝipoj kaj boatoj kaj multaj aliaj sciindaĵoj.

Laŭ la opinio de Ĝojo, Jaĉjo estis tre instruita

persono, por kiu ŝi sentis efektivan admiron, kaj al kiu ŝi volonte cedis sian volon.

Liaflanke, flatis al li konscii ŝian admiron, povi instrui ŝin pri tiom da aferoj kaj objektoj, sed ĉar la riĉigita de estimo amo, kiun Ĝojo sentis al li, estis sincera, ĝi efektive penetris la profundon de lia naturo kaj igis lin peni ĝin meriti, por ke li ne kaŭzu doloron al la knabino.

Li rakontadis al ŝi pri la mirindaĵoj de la Hinduja sovaĝejo, kien la patro iam lin veturigis, kaj pri kiu li ankaŭ multe legis en siaj libroj por knaboj.

Li bone vortpentris siajn impresojn, ne nur de la pejzaĝo, sed ankaŭ de la urboj kun iliaj belegaj komercaĵoj faritaj de la indiĝenoj, tiuj belfiguraj, bonhumoraj homoj, kun iliaj helkoloraj vestoj kaj abundo da ringoj portataj sur oreloj, brakoj, maleoloj kaj, ĉe iuj, eĉ je la nazo.

Iun tagon, kiam Ĝojo avide aŭskultis tiaspecan mensan manĝon, per kiu Jaĉjo ŝin nutris, kiam ili komencis laciĝi de la agoludoj, Jaĉjo subite sentis grandan kontentecon, rigardante en la elokventajn okulojn de la knabino, tial li diris:

— Jen kion mi faros, se vi tion deziros! Tuj kiam mi fariĝos viro, mi edziĝos kun vi, kaj, veturiginte vin trans la maron al Hindujo, mi montros al vi la belajn objektojn tie troveblajn. Tiamaniere vi mem povos ilin senpere vidi. Kiel vi pensas pri tio?

— Jaĉjo, vi karulo, mi pensas, ke ĝi estas belega ideo! Ĉu . . . ĉu ni devas atendi *tre* longan tempon, antaŭ ol vi fariĝos viro?

— Tute ne! Mi jam havas dek unu jarojn;

post ne longe mi havos dek du, kaj mi jam *sentas* min viro.

— Ne forgesu vian promeson, ĉar mi forte deziras iri tien. Vi permesos, ke mia patrino akompanu nin, ĉu ne? ĉar mi estas certa, ke ŝi ĝuos vidi ĉion.

— Ho jes, kompreneble ŝi povos veni, ankaŭ la mia; sed mi opinias, ke mia patrino ne volos, ĉar estas tie, kie ŝi falis en malsanon.

— Jaĉjo, vi ne rifuzos permesi al mi rajdi elefanton? Mi volus rajdi longan, longan distancon!

— Mi mem rajdos flanke de vi.

— Eble do vi konsentos, ke ni elefantiru al ĉiu loko en Hindujo, sed precipe tien, kie estas tiu mirinda templo ore tegmentita, kaj al tiu palacosimila tombo de la princedzino, kun turetoj kaj belaj multnombraj floroj faritaj el juveloj.

— Mi kondukos vin ĉien.

Tiamaniere ili interparoladis, realigante al si la revojn, pri kiuj ili kredis, ke iam tio nepre efektiviĝos.

Dum la longaj periodoj, kiuj poste disigis ilin, ili ĉiam korespondadis, kaj eble ili ne tute forgesis la promeson faritan en ilia infaneco.

Ni jam scias, kiel Ĝojo estis okupata dum tiuj jaroj. Ni vidu, kiel Jaĉjo pasigis la tempon.

Fininte la gimnaziajn studojn, li fariĝis studento de la medicino en la universitato de Londono. Tiel bone li sukcesis, ke li ricevis la diplomojn, kiam li estis dudekdujara.

Poste li ricevis oficon de adjunkta ĥirurgo enloĝanta en hospitalo Londona; pli poste li

vizitis Vienon, Parizon, kaj Berlinon po tri monatoj en ĉiu urbo, por ke li mem esploru la mirindan laboradon de la plej eminentaj kuracistoj eksterlandaj. Reveninte hejmen li decidis akcepti oficon sur pasaĝera ŝipo veturanta inter Aŭstralio kaj Britujo, antaŭ ol komenci praktikon por si mem en Londono, tiu plej granda kaj interesa urbego en la mondo.

Nun post du semajnoj li devis ekveturi, sed antaŭ ol foriri li decidis, se tio estus ebla, ricevi promeson de Ĝojo, ke ŝi fariĝos lia edzino post lia reveno.

Li bone sciis, ke ŝi alte estimas lin, ĉar ŝi neniel kaŝis tion antaŭ li. Ili estis amikoj tro longe, por ke ŝi tion faru; krom tio, li sciis, ke ŝi opinias, ke ekzistas nenia bona motivo por malhelpi, ke bone edukitaj knabo kaj knabino aŭ viro kaj virino estu geamikoj.

Tamen en la lasta tempo li rimarkis, ke nedifinebla sindeteno kaj memkonscieco jam fariĝis inter ili. Ĝojo ne plu esprimadis siajn pensojn tiel libere, kiel antaŭe; ŝajnis kvazaŭ ia baro staras inter ili, super kiu li ne povas paŝi, kaj pro tio, li komencis timi, ke la antaŭa ĉarmoplena intimeco forestas por ĉiam. Li divenis, ke ne li sola admiras Ĝojon, ke ankoraŭ aliaj sinjoroj konkuras kun li en la espero gajni al si ŝian amon, kaj li sciis, ke ĉi tiuj estas pli lertaj ol li pri la ĝentilaĵetoj tiel ŝatataj de la virinoj. Plue, li sciis, ke tiuj aspirantoj posedas kapablon pri la muziko: tiu potenco, kiu influas ŝin tiel forte, per kies efiko ili povas trafi la koron, samtempe ravante ŝian orelon.

Kiam Jaĉjo komparis iliajn servopovojn kaj personajn allogaĵojn kun siaj, li fariĝis preskaŭ senespera, kredante, ke mankas al li ĝuste tiuj kvalitoj, kiuj en ŝiaj okuloj nepre estas dezirindaj.

Malgraŭ tio, li sciis kun certeco, ke li havas la plej havindajn kvalitojn, kiujn viro povas proponi al virino: pura koro, neriproĉinda karaktero, la kapablo fari noblan laboron, sana korpo kaj la komprenemo, kiu akompanas fortan amon.

Tiuj aliaj viroj proponis multon. Ili opiniis, ke ili proponas sin mem, sed Jaĉjo, meditante, demandis al si: Ĉu efektive ili povas tion fari? Ĉu efektive ili deziras la plej bonan, kiun Gojo povas doni? Aŭ ĉu tiu aŭ alia el ili kvazaŭ dirus al ŝi: "Vi fariĝu mia edzino, admiru min, faru agrable al mi, kaj redone mi vestigos vin per belaj vestaĵoj kaj multekostaj juveloj. Mi loĝigos vin en granda, luksa domo, amuzigos vin, sed ne esperu, ke mi fordonos miajn plezurojn aŭ iel oferos miajn inklinojn, se ili estus malsimilaj al viaj . . .

Jaĉjo sciis, ke tia edzo ne povus spirite unuiĝi kun Gojo; li timis, ke eble Gojo ne ekscios la diferencon inter bonŝajna viro kaj bona viro ĝis tro malfrue por ŝia feliĉeco.

Li sciis nur tion, ke li mem volas dividi kun ŝi ĉiom, kiom li posedas; ĉion, kio li estas en siaj plej bonaj momentoj, dezirante, ke ŝi kuraĝigu kaj inspiru lin. Plue, li volis partoprenadi en ŝiaj celoj kaj esperoj, volante esti por ŝi helpanto, ŝildo, kaj apogilo en horo de bezono, ke ili kune konsiliĝu pri la por ili gravaj demandoj de

la vivo, ke ili ambaŭ estu konsolantoj kaj helpantoj de la homoj.

Lia vivlaboro irigis lin inter la suferantoj, kaj li tre deziris, ke per li Gojo elverŝu en ties korojn iom de tiu muziko, ĝojo, kaj amsento, kiuj ŝajne plenigis ŝian animon. Sajnis al li, ke ĉiam Gojo povas percepti kaj prezenti al aliaj la helan, gajan flankon de la aferoj. Li sciis, ke ŝia irado tra la hospitalo, kie li deĵoris kiel enloĝanta ĥirurgo, ĉiam sentigis trankvilecon kaj kontentecon inter ĉiuj sur kiuj ŝi ridetis kaj al kiuj ŝi parolis. Plue li sciis, ke de longe Gojo sukcesis decidigi Lilion inviti kelkajn ellacigitajn patrinojn kaj kriplajn infanojn, kiuj ne havis ĝardenojn nek beletajn ĉirkaŭaĵojn, por ke Lilio kaj ŝi kune faru, ke estu al ili feliĉe kaj komforte en la daŭro de kelke da horoj en ĉiu semajno. De Lilio li eksciis, kiel Gojo sukcesis helpi la kompatindajn gastinojn kaj gastetojn rigardi pli espere sur la vivon. Ju pli li pensis pri tio, des pli lia koro varmiĝis al ŝi.

Tiel okazis frue en unu mateno, precize unu semajnon antaŭ ol li ekvojaĝis al Melburno, ke li vizitis la dometon en Barnes* kaj prezentis sin al Lilio. Post la interŝanĝo de la kutimaj salutoj okazis paŭzo.

Lilio ne povis ne rimarki, ke afero pli grava ol kutime venigis al ŝi Jaĉjon, kiu volis konfidi en ŝi. Fakte, lastatempe pli ol unu fojon ŝi rimarkis videblan ŝanĝon en li, kaj ŝi ne povis ne diveni la kaŭzon. La viglaj patrinaj okuloj vidis, ke li amas Gojon, tamen ŝi ne rajtis aludi pri tio,

* Elparolu: Barnz.

ĉar li mem ne parolis al ŝi eĉ unu vorton pri la afero.

Nun, kiam li venis speciale por tio, ke li sciigu Lilion pri sia pasia amo, li trovis la aferon tre malfacile paroleblan. Tamen fine li balbutis:

— Sinjorino Ĉester . . . eble vi jam divenis, ke mi amas Ĝojon. Mi venis . . . por sciigi ŝin . . . pri tio . . ., se vi tion permesos. Ĉu mi estus malplaĉa al vi kiel bofilo?

Lilio paliĝis kaj tremis per la tuta korpo. Jen malfacila por si tasko! Jaĉjon ŝi amis preskaŭ kvazaŭ li estus ŝia filo, kaj ŝi konvinkiĝis, ke, se ŝi povus elekti edzon por Ĝojo, ŝi ne povus trovi iun pli bonan, ol li estas. Ŝi ne estis certa, ke Ĝojo amas lin; eble ŝi ne tute esperis tion, ĉar la honesto mem faris necese, ke ŝi sciigu Jaĉjon pri la makulo sur la naskiĝo de Ĝojo. Kaj poste? Kion do poste? Ĉu li ankoraŭ deziros edziĝi kun ŝi? Ĉu lia amo estos tiel granda, ke ĝi povos supersalti la baron? Ŝi ne sciis pri tio! Ŝi sciis nur, ke, volante savi Ĝojon de nenecesa suferado kaj honto, ŝi mute dankas Dion, ke Jaĉjo venis unue al ŝi.

Post momento ŝi diris—Jaĉjo, mi ne povas esprimi al vi mian dankon pro tio, ke vi venis konfidi en mi, antaŭ ol sciigi al Ĝojo vian amon al ŝi. Fakte, mi devas diri al vi ion, kio eble ŝanĝos vian intencon. Vi opinias, ke vi amas Ĝojon. Ĉu tiu via amo povos elteni la provon, kiun mi devas fari al ĝi? Se ne, agu honeste kun mi kaj kun vi mem. Foriru el ĉi tiu domo, nedirinte al Ĝojo tiujn vortojn, kiujn vi venis speciale por diri. Per la tuta elokventeco, kiun

mi posedas, mi petegas, ke vi foriru, se en via koro estos eĉ iometa tendenco ŝanceliĝi pri via deziro edziĝi kun Ĝojo, se vi pensos, ke ŝi estas malpli dezirinda, ol vi antaŭe pensis . . . Jaĉjo, . . . aŭskultu bone . . . kiam iu iam demandis al mi, " kiom da tempo vi estas vidvino, aŭ kiom da tempo pasis, de kiam via edzo mortis?" mi ĉiam respondis: "Ĝojo neniam vidis sian patron, aŭ mia edzo jam antaŭe mortis, kiam mia plej juna infano naskiĝis!" Tion oni akceptis ĝuste tiel, kiel mi intencis. Volante ne mensogi, mi ja volis erare pensigi ilin, ne pro mi mem, sed pro la infano, kiun mi devis ŝirmi. Sed aŭskultu, Jaĉjo, kaj klare komprenu tion, kion mi diros. *Mia edzo mortis* kelke da jaroj antaŭ ol Ĝojo naskiĝis.

—Ŝi do ne estas via infano! Vi ŝin adoptis kaj edukis, kvazaŭ ŝi estus via propra filino! Tio ne estas por mi treege grava afero! Kompreneble estus pli plaĉe al mi, se vi estus la patrino de Ĝojo; kaj grandmezure vi ja estas tio, ĉar, kiam ĉio estas konsiderita, vi prizorgis kaj edukis ŝin! Tamen mi ankoraŭ senhezite deziras edziĝi kun Ĝojo, nur pro tio, ke ŝi estas tio, kio ŝi estas per si mem, ne per siaj gepatroj! Vi estas la sola patrino, kiun ŝi konas, kaj ŝi ne povus havi pli bonan, saĝan, dolĉan . . .

—Ne diru plu, Jaĉjo, ĉar vi ne ankoraŭ ĉion komprenas. Ial ne estas malagrable trovi, ke vi ne tuj komprenis . . . mi iom dankas vian nekomprenon. Tamen estas necese, ke vi ja komprenu, ke mi estas la patrino de Ĝojo, kvankam mia edzo ne estis ŝia patro . . .

— Kiel!—kun emocio ekdiris Jaĉjo stariĝante. Dum momenta paŭzo, la du interparolintaj homoj povis aŭdi la plendajn tonojn de la violono ludata de Gojo, kiu ne sciis, ke ŝi estas temo de grava priparolado.

Lilio sidis, rigardante malsupren. Ŝi ne kuraĝis levi la okulojn al la vizaĝo de Jaĉjo, kiel ŝi volis, por vidi senerare, kiamaniere la sciigo efikos sur lin, kaj per li sur Gojon.

Jaĉjo spiregis, doloro montriĝis per la okuloj, kiuj malmoliĝis. Tuj kiam li povis sin regi, li diris :

— Sinjorino Ĉester, mi tute ne povas kompreni! Ĉu eble mi baldaŭ vekiĝos kaj trovos, ke mi sonĝis? Tio, kion vi diris, estas por mi tiel neatendita . . . tiel ne kredebla! Tamen pri unu afero mi ja komprenas, kaj tio estas, ke ne povas esti, ke *vi* estas kulpa! . . . Iu aĉa malvirtulo . . . Sed, kion diri? . . . Se tio povas esti tiel, mi pli ol iam antaŭe deziras konsentigi Gojon fariĝi mia edzino. Ke ŝi nur konsentu! Ĉar mi volus iom pli trankviligi la pensojn, ĉu vi permesus, ke mi iom promenu en la ĝardeno kaj poste parolu al Gojo?

— Jes, iru, Jaĉjo; sed antaŭe sciu, ke la patro de Gojo ne estis malvirtulo. Li mem estis kruele trompita, kaj edziĝante kun mi li kredis, ke li estas vidvo.

ĈAPITRO XXVI

Ĉirkaŭ unu jaron antaŭ la matena vizito de Jaĉjo, per heredaĵo, kiun Lilio ricevis post la morto de la geonkloj, kiuj iam deziris adopti Ĝojon, Lilio aĉetis "*La Dometo.*"

Ĝi estis malmoderna domo negranda kaj duetaĝa kun bela ĝardeno kaj arbetaro. Ĝiaj frontaj fenestroj rigardis sur la komunan teron de Barnes, je kelke da mejloj malproksime de Londono.

Al tiu hejmo venadis Filipo por pasigi la kelkajn tagojn, kiuj okazis inter unu marveturo kaj alia, kaj venadis ankaŭ Jaĉjo, kiu estis ofta vizitanto, rigardanta ĝin kiel duan hejmon.

Konante bone la domon, Jaĉjo povis sin direkti unue en la belan ĝardenon, kaj poste al la salono, kie Ĝojo ankoraŭ ekzercis sin pri la violono.

Li ne eraris, pensante, ke Ĝojo ŝanĝiĝis kontraŭ li, kvankam li erare konkludis pri la kaŭzo de tiu ŝanĝiĝo.

Efektive Ĝojo sciiĝis pri siaj propraj deziroj al la amo de Jaĉjo, kaj penis alĝustigi sin al la neatendita memvidiĝo, modeste penante kaŝi de ĉiuj, eĉ de la patrino, la ĝojon kaj doloron de la amo, kiu plenigis ŝian koron.

La vivo jam instruis ŝin multe, sed tio plejparte venis el ŝia varma kunsento kun aliaj homoj kaj el ia suferado, pri kiu ni scias.

Kiam ŝtele iris en ŝian vivon tiu stranga, nekomprenebla afero, kiun oni nomas la amo, ĝi iom blindigis kaj konfuzis ŝin, ĉar nun troviĝis, ke ŝi, ordinare tiel lerta pri legado de la homoj, jam ne povas kun certeco legi Jaĉjon, kiam tion fari ŝajnis al ŝi tiel grave kaj dezirinde.

Ŝi rimarkis, ke li aliiĝis. Neniam parolema, li jam nun malofte parolis, kaj, kelkfoje sulkigante la brovojn, li nur ŝajnis eviti ŝin. Sed tio okazis nur tiam, kiam li estis en akompano de aliaj homoj. Kiam ili estis duope, kio ne ofte okazis, li montris sin atenta pri kaj afabla al ŝi, dum la amlumo brilis en liaj okuloj.

Kion pensi ŝi ne sciis, kaj decidis forigi ĉiujn pensojn pri la afero, dirante al si :

— Ne decas, ke mi pripensu tiamaniere pri li, kiu ne diris al mi eĉ unu vorton pri la amo.

Tamen la pensoj ja ofte turnadis sin al li, kaj ŝajnis kvazaŭ Jaĉjo estas ĉiam apude, partoprenante ĉion, kion ŝi faras.

Pro tio ŝi jam ne povis verki tiel bone, kiel antaŭ la konsciiĝo pri la amo al Jaĉjo, ĉar la atento estis dividata, anstataŭ esti koncentrata sur la laboro. Feliĉe, ŝi ĝuis ian kompenson, ĉar, ludante la violonon, ŝi povis pli bone, ol iam antaŭe, mirigi la aŭskultantojn pro la emocieco, kiun ŝi esprimadis tiel forte kaj lerte.

Iufoje ŝi pensis, ke Jaĉjo amas belan Noran, ĉar estis evidente, ke li povas senĝene paroli kun ŝi, kaj tiam Gojo ne povis ne senti ĵaluzan doloron, kvankam tio ne restis longe.

Nora jam fariĝis bela dolĉa fraŭlino kun ĉarma

voĉo por kanti. Ŝia hejmo estis en ne granda distanco de tie, kie Lilio kaj Ĝojo loĝis, kaj la du fraŭlinoj fariĝis amikinoj, kiam ili denove renkontiĝis post jaroj da diseco.

Sed ni sekvu Jaĉjon en la saloneton de "*La Dometo*," responde al la ordono: "Envenu," kiam Ĝojo aŭdis la nelaŭtan frapeton sur la pordo.

Vidante la ekrigardon de neatendita plezuro, kun kiu Ĝojo akceptis lin, kaj aŭskultante la gajan tonon de la voĉo, kiam ŝi bonvenigis lin, la esperoj de Jaĉjo subite leviĝis.

— Nu, Jaĉjo, ĉi tio ja estas ĉarma neatenditaĵo. Kio venigis vin ĉi tien tiel frue en la tago?

Tiam, rimarkante ion hezitan kaj neordinaran en lia aspekto, ŝia vizaĝo ricevis subite ŝanĝitan esprimon, dum ŝi maltrankvile demandis:

— Amiko mia, kio estas al vi? Mi esperas, ke nenio grave malagrabla por vi okazis?

— Ne, Ĝojo, kiom mi scias, nenio malbona okazis . . . tamen, ĉar mi estas en stato de forta necerteco pri plej grava por mi afero, pri kiu mi volus certiĝi antaŭ ol foriri de Anglujo, mi venis al vi por helpo. Ĉu vi povus doni al mi iom da tempo?

— Plej plezure, Jaĉjo. Mi estus je via dispono dum tutaj tri horoj, se vi dezirus tiom da tempo! Poste mi devos instrui lernantinojn, kiuj venos al mi. Mi ĝojas, ke vi deziras konfidi al mi. Tio ŝajnas tute tiel, kiel en la malproksimaj tagoj de nia infaneco! Atendu nur unu momenton, dum mi iros sciigi la patrinon pri via alveno . . . Ĉu

eble vi deziras, ke ankaŭ ŝi partoprenu la konfidon?

— Ne, tio estas nenecesa. Via patrino kaj mi jam renkontiĝis . . . efektive ŝi scias la celon de mia vizito, kaj estas kun ŝia permeso, ke mi venis al vi. . . . Ĉu . . . vi ne havas ian ideon pri . . .

— Do, pardonu la interrompon—diris Ĝojo iom nerve, ĉar ŝi nun bone konstatis, ke io nekutima okazis, kvankam ŝi ankoraŭ ne divenis, kio ĝi estas.—Ĉu vi dezirus iri en la ĝardenon, aŭ ĉu vi plivolus interparoli ĉi tie?

— Ĉi tie, mi petas.

Ili sidiĝis, Ĝojo en ŝia preferata sidloko sur angulo de kanapo, kaj Jaĉjo sur brakseĝo, kiun li altiris apud ŝin.

La suno brilis en la ĉambron, kvazaŭ karesante la harojn de Ĝojo, kiu iom ruĝiĝetis pro plezura antaŭsento pri la interparolo.

— Ĉu vi ne povas diveni tion, kion mi deziras diri al vi? Mi estas certa, ke vi ne povis ne vidi jam de longe, ke . . . mi . . . amas vin. Mi amas vin pli forte, ol ĉiun en la mondo. Mi volus ekscii . . . ĉu vi volas akcepti mian amon . . . kaj redone ami min? Ĝojo, karulino . . . ĉu vi komprenas la grandecon de tio, kion mi petas de vi? Kredeble vi ne povos min ami?

Nepreparite je tia eldiro, Ĝojo ne povis eligi eĉ unu vorton. Komence ŝi ne povis renkonti la okulojn de Jaĉjo, kvankam ŝi sentis, ke ili estas fiksitaj sur ŝin, kaj ke devas esti, ke li vidas ŝian malfacile regeblan ĝojon kaj aŭdas la laŭtajn neregulajn batojn de la koro. Ŝi devis pli

trankviligi la subitan tremadon skuantan ŝin, antaŭ ol trovi respondajn vortojn. Fine, rigardante en la brilantajn okulojn de Jaĉjo kaj trovante tie tre fortan esprimon de la amo, ŝi devis denove mallevi la rigardon. Tamen ŝi retrovis la voĉon, kvankam ĝi sonis strange nefamiliara, kaj komencis :

— Kara . . .

Vane ŝi penis aldoni ion al tio ĉi, la vortoj ne volis aŭdigi sin.

Feliĉe, Jaĉjo aŭdis la solan vorton, ekkonis la nedireblan karesecon en ĝi, kaj per la seĝo movante sin pli proksimen al Gojo parolis :

— Diru al mi, amatino mia, ĉu vi efektive min amas ? . . . sufiĉe . . . por ke vi fariĝu . . . mia edzino ?

Ankoraŭ la dezirataj vortoj ne estis troveblaj, sed fariĝinte pli kuraĝa, Gojo ĵetis elokventan rigardon sur Jaĉjon.

Evidentiĝis, ke tio, kion Jaĉjo vidis en la brilantaj okuloj faris nenecesaj ĉiujn vortojn, ĉar li salte leviĝis el la seĝo, sidigis sin apud Gojo sur la kanapo, kaj, ĉirkaŭinte ŝin per siaj brakoj, tiris ŝin al si.

Anstataŭ malpermesi la ĉirkaŭbrakon, ŝajnis, ke Gojo trovis ĝin tute agrabla, ĉar ŝi karese apogis la vizaĝon kontraŭ lia ŝultro.

Tiel ili sidis, tro feliĉaj por parolado aŭ moviĝado, escepte tiam, kiam de tempo al tempo Jaĉjo nomis Gojon per ĉiuj karesaj esprimoj. Vere ĉio renversiĝis, ĉar Jaĉjo, kiu antaŭe povis nur malfacile esprimi siajn pensojn per vortoj, jam nun sentis, ke ĉiuj lingvaj baroj foriĝis.

Amaj vortoj denature troviĝis sur liaj lipoj, dum Ĝojo, kiu antaŭe devis haltigi esprimojn de sia amo al li, jam povis diri nenion, sentante, ke tie ŝi povas senmove kontente resti en silento.

Tamen post iom da tempo Jaĉjo turnis al si la vizaĝon de Ĝojo, flustrante:

— Karulino, ĉu vi povas diveni tion, kion mi nun deziras? . . . Vi ankoraŭ ne donis unu al mi! . . . Ĉu mi povas? . . . Kisu min, amatino mia.

Tiu kiso ŝajnis al ambaŭ kvazaŭ sanktaĵo. Ili sentis sin tre feliĉaj, kiam ili sidis kune; sed per la kiso ili magie unuiĝis, kvazaŭ la animoj interkroĉiĝis.

Iom poste Jaĉjo diris:

— Mi ne sciis, eĉ ne povis diveni, ke kiso povus esti tiel dolĉa . . . tiel kompreniga . . . Ĉu vi?

Kaŝante antaŭ li la vizaĝon, Ĝojo respondis:

— Jes, mi iom komprenis, ĉar . . . ĉar . . . jam antaŭe mi havis unu . . . tian kison . . . de vi . . . en sonĝo . . . kaj la ensonĝa kiso ŝajnis ĝuste tiel reala, kiel tiu, kiun vi ĵus donis al mi. Mi memoras mian vekiĝon . . . kiam mi sentis vian kison sur miaj lipoj . . . kaj mi deziris, . . . ke iam . . . tiu sonĝo fariĝu realaĵo.

— Oni diras, ke la amo blindigas, kaj devas esti, ke mi blindiĝis, ĉar mi ne nur nesciis pri via amo al mi, sed mi komencis pensi, ke vi evitas min, ke vi eĉ ne amas min fratinsimile, kiel iam.

— Kredeble mi povos tion klarigi. Kiam mi efektive eksciis pri mia amo al vi, Jaĉjo, mi ankaŭ eksciis, ke mi jam ne povus trudi min al vi, kiel

antaŭe mi senpense faris, neinvitite. Eble tio estis fraŭlina modesto, eble ĝi estis sensencaĵo, sed pli ol unu fojon mi ja evitis vin, sed Jaĉjo, . . . ĝuste en tiuj fojoj mi la plej forte deziris esti kun vi. Memoru, ke vi sinjoroj de la kreitaĵaro aroge pretendas, ke vi solaj havas la rajton amindumi. La fraŭlinoj devas esti serĉatoj, ne serĉantoj.

— Eble vi estas prava. Mi supozas, ke viro ne respektus virinon, kiu lin persekutus; tamen estas meza vojo, ĉu ne? Ĉiuokaze, ĉio jam iras bone, ĉu ne? Karulino, . . . diru denove . . . ĉu vi estas *certa*, ke vi estas kontenta je mi?

— Mi ja estas kontenta je vi kaj je ĉio en la vivo! Leviĝante ĉi tiun matenon, kiel kutime mi pensadis pri vi, sed la pensoj estis negajaj, kaj ne harmoniis kun la bela heleco de la sunbrilo kaj la kantado de la birdoj. Verdire, mi . . . mi kompatis min, sciante nenion pri la tiel baldaŭ venonta feliĉego! Se mi tiam estus verkinta muzikaĵon, kiel plenda kaj sopira ĝi estus! Nun mi sentas, kvazaŭ mi povus verki aŭ almenaŭ ludi nur gajan marŝon!

— Mi ankaŭ multe pli gajiĝis, de kiam mi vekiĝis! Mi pensas, ke tio ofte okazas en la vivo! Ni timas kaj timas, ofte nenecese, kiam se ni povus fidi, ni savus nin de multe da doloro, ĉar "niaj propraĵoj," eĉ "niaj propruloj" ja venos al ni en la ĝusta tempo. De kiam vi diris, ke vi amas min, la tuta mondo aspektas pli hele.

. . . .

Tiel ili babiladis laŭ la maniero de geamantoj, ĝis subite Gojo ekkriis:

— Mi demandas al mi, kion diros la patrinoj? Ĉu vi ne diris, ke mia patrino jam scias la celon de via vizito? Kara patrino! ŝi do ne mal aprobas, kaj ŝi lasis nin neinterrompitaj dum longa tempo! Ni iru al ŝi, por sciigi al ŝi nian feliĉon.

— Laŭ via volo, karulino, sed ni ne rapidu— almenaŭ . . . kisu min denove, antaŭ ol iri!

Poste ankoraŭ multo troviĝis por diri, kaj ne estis necese iri serĉi Lilion, ĉar tiu venis ĝis la pordo, kiun ŝi iomete malfermis, kriante:

— Ĉu vi infanoj ankoraŭ ne finis interparoli? Post kvin minutoj la tagmanĝo surtabliĝos!

Lilio estis tuj forironta, sed du gajaj voĉoj alvokis ŝin, dum du feliĉaj, junaj homoj samtempe rapidiris al la pordo, por plene malfermi ĝin kaj enkonduki la karan patrinon.

— Gratulu nin, patrino kara, ni ĵus diris, ke ni iros trovi vin, por ke vi ankaŭ partoprenu en nia feliĉo.

ĈAPITRO XXVII

Jaĉjo revenis de la marvojaĝo, ravite de la bela klimato kaj bonaj vivperspektivoj en Aŭstralio, kie la loĝantoj ŝajnas al li tre feliĉaj kaj sen zorgoj. Li iom deziris reveni por tie enloĝiĝi, sed li cedis al la peto de la gepatroj, kiuj ne volis, ke li per tio " apartigu sin de la mondo " dum li ankoraŭ estis tiel juna. Malgraŭ liaj belaj priskriboj, vortpentraĵoj, kaj fotografaĵoj, ili ne povis konstati, ke en malproksima Aŭstralio ekzistas tiel bone konstruitaj urboj, kun tiom da alta civilizacio.

Jaĉjo kaj Ĝojo trovis oportunan domon en Kew,* regiono apud Londono, ne tre malproksima de Barnes, starantan ĉe angulo de sufiĉe vivoplena strato kontraŭ la konataj Ĝardenoj Kew.

Tie Lilio kaj Ĝojo povus viziti sin ĉiutage, se ili dezirus tion.

La domo estis la donaco de gesinjoroj Leden, kiuj aldonis ĉekon por pagi la koston de la plimulto de la mebloj. Ĉi tiuj estis sufiĉe bongustaj kaj oportunaj.

Ĉio estis jam pretigita en la nova loĝejo, kie Jaĉjo estis loĝanta kune kun la gepatroj, kiuj promesis okupi la domon, ĝis la feliĉa paro revenos post sia miela monato en Svisujo.

Restis ankoraŭ kvin tagoj, antaŭ ol okazos

* **Elparolu: Kju.**

la edziĝa soleno, kaj hodiaŭ vespere Ĝojo estis aperonta la lastan fojon sur la estrado.

Jaĉjo estis danka, ke ŝi neplende cedis al lia peto pri tio. Li diris:

— Ne decus, ke vi plu gajnu monon perlabore, kiam vi fariĝos mia edzino, ĉar mi povos akiri sufiĉon por ni ambaŭ.

— Konsentite! pri tio mi ne kontraŭstarigos eĉ unu vorton, sed, via moŝto—diris Ĝojo, ŝerce riverencante—mi volus scii, ĉu vi opinias, ke mi devus kaŝi mian talenton sub la multnombraj devoj de mastrino? aŭ ĉu mi havas vian moŝtan permeson iufoje ludi antaŭ miaj kompatindaj kripluloj?

— Kompreneble mi tion deziras, ĉar mi volas, ke vi estu feliĉa, karulino. Tamen vi certe ĝojos mastrumadi, ĉu ne vere?

— Tute jes, Jaĉjo,—Post iometa paŭzo ŝi plue diris:—Mi supozas, ke ĉiu sana virino kun virinaj instinktoj deziras kaj esperas edziniĝi kaj fari el unu domo hejmon por amato. Farante tion, ŝi plenumas la leĝon de la naturo kaj samtempe kontentigas propran koron. Tamen estas egale vere, ke ĉiu virino devus havi ian intereson ekster la domo kun ĝiaj devoj, por ke ŝi refreŝiĝu kaj ne fariĝu indiferenta kontraŭ eksteraj aferoj kaj homoj.

— Tion mi deziras rilate al vi, karulino mia. Tiu lasta frazo via donis al mi novan ideon, kiun mi rememoros, kiam konsultos min virino ellacigita, eble kun tendenco al melankolio. Mi rekomendos, ke ŝi interesiĝu pri io ekstera de la domo, eĉ se tio nur konsistus el kunvenado de

virinoj por kudri. Kiamaniere vi eltrovis tian fakton, Ĝojo, kiam via vivmodo ne lasis manki al vi la diverseco?

— Mi pensas, ke mi eksciis la unuan fojon pri tio, kiam mi konatiĝis kun fraŭlino Green,* la malriĉa kriplulino, kiu vizitadas la "popolajn koncertojn," kiujn oni starigis. Kiam mi vizitis ŝin, mi petis konsilon, kiamaniere mi povas helpi en la feliĉigado de kelkaj el la kompatindaj neriĉaj homoj de tiu ĉirkaŭaĵo. Ŝi komprenigis min pri la fakto, ke tro multaj virinoj kaj knabinoj havas nenion krom laboro kaj zorgoj. Ili havas nenian amuzon, pri kiu ili povas antaŭsenti la ĝuon.

Pro tio la patrino kaj mi speciale aranĝis kaj uzadis la iaman balsalonon, kiu staras en la ĝardeno apartigita for de La Dometo, kaj pro tio mi promesis al mi ĉiam reveni ĉi tien en la difinita tago, por ankoraŭ helpi fari plezuron al la malriĉa invititaro. Fraŭlino Green estas pli feliĉa, ol multaj aliaj virinoj, pro tio, ke ŝi havas karan fraton, kiu agas tre sindoneme al ŝi. Ĉiufoje kiam li elspezas por la propra tabako, li samtempe ŝparadas la egalan sumon por la fratino. Kiam li sufiĉe ŝparis, li aĉetas bileton de koncerto kaj donas ĝin al la fratino. Tiamaniere fraŭlino Green povas okupi unu el la plej malkaraj sidlokoj ĉe la malkaraj "popolaj koncertoj," kie mi iafoje ludas.

* **Elparolu: Grin.**

CAPITRO XXVIII

La pensoj de Jaĉjo ĉiam rondiradis lian proksiman feliĉecon.

Proksiman? En la mateno de unu tago, vekiĝinte, li diris al si: restas nur tri tagoj de nun!

La intertempo ŝajnis al li mallonga, tamen post kelke da horoj li konvinkis sin, ke ĝi ne estas tiel proksima, kiel li antaŭe pensis, ĉar multo povas okazi en la daŭro de tri tagoj.

Ordinare li ne timadis, precipe li ne timis kreitaĵojn de la imago, sed de kiam li enloĝiĝis en la domon, kiu estis la estonta hejmo de li kaj Ĝojo, li sentis alterne feliĉecon kaj maltrankvilecon.

Li vagadis de unu ĉambro en alian, prezentante antaŭ si per la imago la dolĉecon kaj ĉarmon aldonotajn de la ĉeestado de Ĝojo. Li vidis ŝin jen sidanta kontraŭ li ĉe la manĝotablo, jen okupanta sin pri la mastrumado; jen ili estas duope, jen ili kune akceptas gastojn. Unufoje li penetris pli profunde en la estontecon, por vidi la plej ĉarman, kortuŝan bildon el ĉiuj, dum li sentis en si kvazaŭ adoron.

Alifoje li sin maltrankviligis, pensante: sed eble okazos ia akcidento, kiu malebligos ĉion ĉi tion? Ĉiutage, ĉiumomente akcidentoj ja okazadas . . . Kion mi iam faris, por ke mi meritu tiom da feliĉo, kiom mi atendas? Transirante

straton, oni facile povas faleti, falpuŝiĝi. Dio donu, ke nenio malbona okazu al Ĝojo, antaŭ ol mi havos la rajton ŝin nomi edzino!

Fine li decidis iri al la hospitalo. Tie oni povas ĉiam okupi sin per la " eksteraj pacientoj." Reveninte hejmen ĉirkaŭ la tria horo, li sentis sin pli normala pro la okupiĝo kun aliaj, kaj, kantante rekantaĵon, li levis la korespondaĵon kuŝantan sur la vestibla tablo.

La unua koverto, kiun li malfermis, enhavis telegramon, kun la vortoj :—" Mi bezonas vin, la patrino malsanas. Ĝojo."

Legante li paliĝis, kaj, ĵetinte la telegramon al la patrino, kiu ĝuste tiam venis renkonte al li en la vestiblon, li diris mallonge :

— Mi devas tuj iri al Ĝojo. Mi vokos fiakron.

— Ja iru, mia knabo—diris al li la patrino per kunsenta voĉo, leginte la malmulte da vortoj —mi sekvos vin kiel eble plej baldaŭ. Sed kuraĝiĝu, filo mia, kredeble nenio tre serioza okazis, ĉar vi mem vidis ilin ankoraŭ en la lasta vespero, ĉu ne vere ?

— Tio estas vera.

Fakte, Jaĉjo la hieraŭan vesperon vespermanĝis ĉe sinjorino Ĉester kaj Ĝojo, kaj pasigis tre plezuran tempon kune kun ili. La edziniĝa vesto alvenis kelke da minutoj antaŭ ol li, kaj Lilio vestis Ĝojon per ĝi, kaj poste prezentis ŝin antaŭ Jaĉjo, por ricevi lian admiron.

Ĝojo estis ĉiam belete kaj bonguste vestita, kaj estas kompreneble, ke li vidis ŝin en multaj diversaj belaĵoj, sed neniam li antaŭe vidis ŝin konscia pri la vestoj.

Tamen en la hieraŭa vespero Ĝojo vidiĝis en neordinaraj cirkonstancoj.

Vestite per gracie falantaj volvaĵoj el mola blanka silkaĵo, kun belaj hispanaj puntoj, ŝi eniris la saloneton kun ruĝetaj vangoj duone fiera, duone nekuraĝa. Tiam poste ŝi ridete paŝadis malrapide, turnante sin speciale por tio, ke Jaĉjo vidu kaj admiru la veston faritan sole por tio, ke ŝi faru honoron al li dum la edziĝaj soleno kaj festeno.

Kiel dolĉe kaj eĉ bele ŝi aspektis! Kiel forte li deziris ŝin enbrakigi! Efektive li faris rapidan paŝon antaŭen, celante tion fari, sed Lilio, antaŭvidante lian intencon, ridete intermetis sin.

Post la manĝo ili kune iris al ia halo, sur kies sojlo li devis adiaŭi ilin pro tio, ke oni ne invitis sinjorojn. La amikinoj de Ĝojo aranĝis regalon je ŝia honoro, ĉe kiu ĉiu partoprenantino devis donaci ian tolaĵon por la domo de la edziniĝonto.

Kio do povis okazi de tiam por suferigi sinjorinon Ĉester? Almenaŭ Ĝojo mem fartis bone. Je kioma horo oni sendis la telegramon? Tion li ne sciis, ĉar, leginte ĝin, li ne rimarkis la horon de sendo. Eble ĝi longe atendis lin, dum li estis for en la hospitalo.

Kiel malrapide ruliĝis la fiakro! Ĉu li neniam atingos *La Dometon?* Ĉu estus pli bone, ke li piediru?

Sed ĉiufoje, kiam liaj pensoj ree atingis tiun punkton, li detenis sin.

Fine li komencis trankviliĝi, sciante, ke li povas ankoraŭ fari nenion, kaj ke Ĝojo kredas,

ke la pensoj estas fortoj, kiujn oni povas uzi aŭ helpe aŭ malhelpe.

Ĝis la fino de la veturado li penis fluigi fortigajn riveretojn de pensado al la amatino, dirante en si :—Mi havigos al la kara panjo la plej lertan kuraciston—specialiston en Londono—kiam mi scios, de kio ŝi suferas. Ĉio estos bona en la fino, amatino mia.

ĈAPITRO XXIX

Sciigi al Jaĉjo tion, kio okazis, ne okupis longan tempon.

Reveninte de la regalo en la lasta nokto, Lilio kaj Gojo diris al si "bonan nokton" kaj iris kuŝiĝi.

Baldaŭ Gojo endormiĝis, sed je la kvara horo vekiĝinte, ŝi subite sentis, ke ne ĉio estas en ordo. En la daŭro de momento ŝi ankoraŭ kuŝis aŭskultanta, sed ĉar ŝi nenion aŭdis, ŝi estis tuj turnonta sin sur la alian flankon, kiam bruo ja aŭdiĝis, kvazaŭ iu estis falanta malsupren sur la ŝtuparo.

Timigite de la penso, ke eble domrabistoj eniris la domon por forŝteli la edziĝajn donacojn, Gojo ankoraŭ kuŝis, aŭskultante dum momento, antaŭ ol salte leviĝi kaj surmeti negliĝan veston el lanaĵo. Rapide ŝi iris al la vestiblo ĉe la supro de la ŝtuparo, kaj tie simile al infano ŝi instinkte ekkriis :—Patrino!—en la malfermitan pordon de la ĉambro de Lilio. Sed nenia respondo aŭdiĝis el tie.

Guste tiam ŝi aŭdis ĝemkrion por helpo de malsupre. Ŝi tuj turnis sin en la direkto al la ŝtuparo, kaj, klinante sin super la balustrado, ekkriis :—Mi venas, panjo kara, kio nome okazis!

Kiel respondon ŝi ricevis odoron de brulo, kaj samtempe flametoj vidiĝis el la sen tio mallumeco. Gvidate de la flametoj, kiuj estis ĉiam pligrand-

N

iĝantaj, Ĝojo kure malsupreniris la ŝtuparon, demetis la negliĝan veston kaj ĉirkaŭvolvis per ĝi la patrinon, ĉar efektive Lilio kuŝis tie proksime de la plej malsupra ŝtupo.

Sajne la rapida moviĝado de la aero, pro la malsupreniro de Ĝojo kaj la demeto de la vesto, ventumis la jam sen tio tro grandajn flamojn, aŭ eble la negliĝa vesto estis tro maldika por estingi la flamojn. Certe estis, ke ĝia subaĵo estis el katuno tiel same, kiel la brulanta noktovesto de Lilio, sed ial Ĝojo devis serĉi ion pli dikan, por ke ŝi estingu la flamojn.

Feliĉe ŝi palpe trovis malnovan dikan mantelon, kiu ĉiam pendis de apuda hoko, por ke Lilio povu ĝin tuj preni, kiam, enironte la ĝardenon, ŝi deziris ĝin surmeti al si.

Poste, ekbruliginte la gason en la vestiblo kaj saloneto, Ĝojo energie sonigis la sonorilon, por venigi la servistinon, metis kusenon sub la kapon de la kara patrino, kaj alportis akvon por malsekigi la lipojn kaj aspergi sur la frunton de la jam sveninta virino.

Poste ŝi devis denove sonori, por venigi Jenny,* la servistinon, kiu, timigite de la bruo de la sonorado kaj vidinte la senmovan korpon de Lilio kuŝantan sur la vestibla flanko, decidis, ke mortigistoj eniris la domon, kaj ke ŝia lasta horo alvenis. Ellasinte teruran ekkrion kaj tute timigite, ŝi retiris sin denove al la citadelo, sia dormejo, kie ŝi riglis la pordon kaj poste alpuŝis pezan tirkestaron kontraŭ ĝin.

Fine, konvinkite, ke la sonorado kaj urĝa kri-

* Elparolu: Ĝeni.

ado de ŝia nomo venas de fraŭlino Ĝojo kaj ne de sangavidaj mortigistoj, ŝi ne plu perdis tempon, sed treme malsupreniris. Poste ŝi volonte obeis la rapide diratajn ordonojn de Ĝojo, kiu diris :

— Rapidu, Jenny, venigu la plej proksiman kuraciston. Sciigu lin pri la akcidento kaj la severaj brulvundoj de mia patrino. Diru, ke ŝi svenis, kaj ke mi ne povas riski movi ŝin, antaŭ ol li alvenos.

Rapide surmetinte pluvmantelon kaj botojn, Jenny kure foriris.

La atendado ŝajnis longa al Ĝojo. Efektive la kuracisto venis post dudek minutoj, akompanate de Jenny, kiu rifuzis foriri sen li. Eble ŝi pensis, ke li reirus en la liton, se ŝi ne atendus.

Li faris ĉion fareblan al la suferantino, kiu sub la influo de stimulo rekonsciiĝis kaj malforte ridetante certigis ilin, ke ŝi sentas neniom da doloro krom ĉe la maleolo. Iom post iom, pene parolante, ŝi klarigis ĉion.

Nebone ripozinte, Lilio vekiĝis ĉirkaŭ la tria kaj duono, kaj ne povis denove endormiĝi. Ĉirkaŭ la kvara horo bruo de falinta fajencaĵo okazis. En la unua momento ŝi timis, ke ŝtelistoj celas la valorajn objektojn donacitajn al Ĝojo, sed poste, aŭdinte nenion plu suspektindan, ŝi pensis, ke verŝajne oni forgesis meti la katon eksteren de la domo kiel ili kutime faris ĉiunokte, kaj ke ĝi faligis pladon, ĉasante muson.

Tial, lumiginte kandelon, ŝi surmetis negliĝan veston el katuno, super la noktorobo, kiu ankaŭ estis katunaĵo, kaj tenante la kandelingon per la mano, ŝi malsupreniris, trovis la katon kaj la

dispecigitan pladon. Metinte la katon eksteren de la domo, ŝi komencis supreniri, sed atinginte la parton de la ŝtuparo, kie ne malproksime de la supro la ŝtupoj kurbiĝis kaj malvastiĝis, ŝi paŝis sur parton de la vestaĵo kaj falpuŝiĝis. Pro la malvasteco de la ŝtupoj ŝi ne povis levi sin, sed falis ĝis la malsupro.

Dum la falo la kandelo eliĝis el la ingo, kaj, implikiĝinte en la volvaĵoj de la vestoj, flamigis ilin. Atinginte la vestiblon ĉe la malsupro de la ŝtuparo, kompatinda Lilio ankoraŭ povis neniel helpi sin, ĉar ne nur la brulantaj vestoj malhelpis, sed ankaŭ troviĝis, ke unu maleolo elartikiĝis.

Kiam ŝi penis leviĝi, la doloro ekkriigis ŝin, kaj ŝi perdis la konscion, ĝis ŝi trovis sin sur la lito, ĉirkaŭ kiu grupiĝis la kuracisto, Ĝojo, kaj Jenny.

— Estas mirinde, ke, krom ĉe la maleolo, mi sentas neniom da doloro. Mi pensis, ke mi iom severe brulvundiĝis!—ŝi diris.

La kuracisto ne tuj sciigis ŝin, ke la granda severeco de la brulvundoj estas la ĝusta kaŭzo, ke ŝi ne sentas doloron, tamen iom poste li diris :

— Kara sinjorino, ĉu povas esti, ke ekzistas ia grava afero, pri kiu vi dezirus fari aranĝon, aŭ iu homo, kiun vi dezirus venigi al vi ?

Ĉe tio doloro pikis la koron kaj montriĝis en la okuloj de Lilio, kiu tamen respondis trankvile :

— Ĉu per tio vi volas min sciigi, ke mi estas pli grave brulvundita, ol mi supozis ?

Sidiĝinte, la bonkora kuracisto diris per mildigita voĉo :

— Mi ne deziras timigi vin; mi nur volas averti vin, ke io povas okazi. Vi estas malfortigita de la skuego al la sistemo. Ĉio dependas de la stato de la koro. Ju pli trankvile vi restos, des pli bonan ŝancon vi havos resaniĝi. Sed estas nur ŝanco.

— Mi ne timas morti, doktoro, sed mi ja dezirus vivi, ĝis mia filo revenos kaj mia filino edziniĝos. Ĉu vi volas peni plifortigi min tiel, ke mi havos ankoraŭ kelke da tagoj sur la tero? Se vi ne sukcesos, la volo de Dio fariĝu, ĉar eĉ ĉi tiu okazo estas parto de la Dia plano . . . por miaj filo kaj filino . . . Ni homoj . . . ofte eraras, pensante, ke eviti suferon estas dezirinde, kiam estus pli bone, ke ni penu kompreni, kiamaniere ni povas alĝustigi ĝin al nia vivo kaj eltiri profiton el ĝi per tio, ke ni ŝanĝu la suferon en la ĝojon pro pli granda kapableco kaj pleneco de la karaktero.

Kiam Jaĉjo eniris la litĉambron, Lilio povis, kun iom da malfacileco kaj ofta paŭzado inter la vortoj, paroli al li. Ŝi diris:

— Jaĉjo, mia kara, dua filo . . . ne necesas, ke mi petegu vin . . . konduti ĉiam bone . . . al nia Gojo. Vi certe . . . faros tion . . . tiu certeco plifaciligas al mi . . . la foriron al la nekonata lando . . . Mia sola bedaŭro estas, . . . ke mi ne povos vin vidi . . . geedzoj . . . antaŭ ol foriĝi . . . Tamen mia plej forta deziro estas . . . ke vi ankoraŭ edziĝu . . . en la difinita tago . . . Eble . . . mi ja . . . ĉeestos . . . kvankam . . . nur . . . spirite.

Gojo komencis mallaŭte plori, sed tuj kiam Lilio parolis, ideo venis en la kapon de Jaĉjo, kiu diris nelaŭte :

— Sinjorino Ĉester, patrineto, vi ja ĉeestos nian edziĝan solenon. Se Gojo permesos, mi tuj iros por havigi al mi specialan permeson de edziĝo kaj venigi pastron, kiu edzigos nin en ĉi tiu ĉambro. Ĉu vi konsentas ?

Gojo levis la rigardon duontime kaj estis tuj dironta : "Ne," kiam ŝi rimarkis la esprimon de alta plezuro sur la vizaĝoj de la patrino kaj de Jaĉjo, tial ŝi dolĉe kapjesis, konsciante, ke tia edziĝo estos eĉ pli sankta okazo, ol ŝi antaŭe pensis pri edziĝo.

Lilio diris :—Tio estos ja tute kontentiga por mi, Jaĉjo, ĉar tiam mi lasos mian amatan filinon kun vi, kiu havos plenan rajton resti kun ŝi kaj konsoli ŝin en la tempo de ŝia sufero pro mia foresto. Mi nur bedaŭras . . . la malgajan nuancon en la cirkonstancoj de via edziĝo . . . mi mem estas pli favorata, ol multaj virinoj . . . Nun mia sola deziro estas, ke Filipo alvenu en la hodiaŭa tago anstataŭ morgaŭ, kiel ni atendis. Eble li ja venos ĝustatempe.

Kiam Jaĉjo revenis, farinte ĉiujn necesajn aranĝojn, li trovis ne nur la proprajn gepatrojn, sed ankaŭ Filipon, kiu feliĉe alvenis unu tagon pli frue, ol oni atendis lin.

Estis videble, ke Lilio fariĝis multe pli malforta. Ŝi preskaŭ ne povis teni la okulojn malfermitaj dum la soleno.

Poste, kisinte Gojon kaj Jaĉjon, ŝi pene diris :

— Ne timu ion ajn en la vivo . . . Memoru pri la boneco de Dio . . . ĉiopova . . . ĉioscia . . . Neniam Li forlasos vin . . . fidu al Li . . . Mi pruvis Lian bonecon . . . ĉar, kvankam mi travivis ĉiuspecan suferon . . . tra kiu virino povas trapasi . . .

Ŝi povis nenion plu diri sen longa paŭzo por ripozi . . . sed Gojo ame, fiere rigardante la patrinon, diris per dolĉa tono :

— Krom la honto, panjo mia, vi neniam travivis *tion*, ĉar vi neniel meritis ĝin.

— Vi diris la veron, infano mia ; neniu efektive travivis la honton, kiu ĉiam *celis* fari juste . . .

. . . .

Baldaŭ poste Lilio endormiĝis, sed kiam pli poste ŝi vekiĝis, oni ne povis ne vidi, ke ŝi fariĝis eĉ pli malforta.

La pezaj palpebroj ne povis longe resti malfermitaj.

Ŝi diris unu fojon :

— Cu la krepusko falis pli frue ol ordinare hodiaŭ ? Kioma horo estas ? . . . Cu efektive Filipo estas ĉi tie . . . kaj Gojo ? . . . Kiuj estas ĉi tiuj homoj starantaj ĉirkaŭ mi ? Mi ne povas klare . . . vidi ilin . . . tamen . . . ŝajnas . . . kvazaŭ ili estas . . . konataj de mi . . . ies brakoj etendiĝas al mi . . . sed . . . mi . . . ne . . . povas . . . alprok . . . simiĝi . . . mi . . . estas . . . tro . . . malforta.

CAPITRO XXX

La krepusko, pri kiu Lilio aludis, pli kaj pli densiĝis preskaŭ ĝis nigreco. Samtempe ŝi kvazaŭ endormiĝis.

Rekonsciiĝinte, sed ankoraŭ ne malferminte la okulojn, ŝi duone aŭdis karesan tonon de iom konata voĉo diri :

— Jen, ni preskaŭ alvenis ; nur kelke da paŝoj plu kaj ni eniros la landon de plena paco!

Duonkonscie Lilio sin demandis :

— Al kiu ĉi tiu parolis ? Ĉu eble al mi ?—sed ŝi ankoraŭ estis tro dormema, por ke ŝi solvu la demandon per simpla malfermiĝo de la okuloj.

Baldaŭ ŝi tute rekonsciiĝis, tiam, sentante sin pli forta kaj iom scivola, ŝi subite malfermis la okulojn. Mirante, ŝi rimarkis, ke la mallumo forestas, kaj ke ĉie radias hela lumo.

Ĉirkaŭrigardante, por ekscii la kaŭzon de tio kaj vidi, kie estas Ĝojo, Filipo, kaj la ceteraj amataj, ŝi ekvidis tute proksime de ŝi la anĝelon gvidanton, kiu gvidis ŝin tien ĉi. El tuta ĝi radiadis bela, rava, ŝanĝkolora lumo, farante plej belajn ĉielarkajn efektojn.

Vidante la miron de Lilio, la anĝelo gaje ridetis kaj diris :

— Mi ĵus demandis al mi, ĝis kiam vi neatentos min! Sed vi estis tro laca, por ke vi esploru la novajn ĉirkaŭaĵojn, kaj krom tio, vi mem fariĝis

tiel luma, ke mia brileco ne plu kontrastas tiel forte kun via, kaj tial vi ne tuj rimarkis ĝin.

La miro de Lilio ankoraŭ pligrandiĝis—Kiel, ĉu mi fariĝis luma? Ve! tio ne povas esti!

Ĉe tio la anĝelo ridis, kio memorigis Lilion pri la sonoj de ondiĝanta rivereto fluanta super la ŝtonoj de monta deklivo. Poste ĝi diris:

— Mi retiros min for de vi por kelka momento, por ke vi vidu, kiel sincere mi parolis.

Kaj jen, subite la anĝelo malaperis kaj la lumeco iom malpliiĝis.

Esplore rigardinte, Lilio vidis, ke ŝi estas ĉirkaŭita de granda rondo de lumo simila al perlamoto kaj devenanta senĉese kaj ritme de ŝi mem. Ekster la rondo ia krepusko troviĝis.

En la daŭro de momento ŝi ŝanceliĝis kvazaŭ pro kapturniĝo, sed tuj poste ŝi starigis sin pli firme kaj esplore rigardis sin.

Per tio ŝi komprenis, ke ŝia korpo havas la formon kaj similecon de tiu, kiun ŝi uzis sur la tero, sed ke ĝi diferencas de tiu pro tio, ke ĝi ne havas solidecon, ĉar videble ĝi estas kreita el ia viva lumaĵo.

Lilio forte ĝojis pri tio, kaj ĉe la reapero de la anĝelo, ŝi demandis:

— Kio estas la signifo de la krepusko kaj de la rondo de lumo, kiu ŝajnas deveni de mi? De kie efektive venas ĉi tiu lumo? Kie mi estas? kaj kiamaniere mi venis ĉi tien?

— Kiom da demandoj!—ridetante diris la anĝelo.—Mi penos respondi al ĉiuj, kvankam ne en la vico laŭ kiu vi faris ilin. Vi estas ĉi tie, ĉar, fininte vian de la Majstro difinitan taskon

en la surtera edukejo, vi jam estas revenanta al via ĉiela hejmo, por tie ĝui periodon da labormeritita ripozo kaj libereco en akompano de viaj amataj, kiuj antaŭiris vin.

Ili vin atendas trans ĉi tiu pacoplena, ripoziga valo de la ombro de la morto, kiun vi ĵus eniris kaj ĉe kies enirejo troviĝas, kvazaŭ vualo, superpendanta krepusko ŝirmanta ĝin kontraŭ homa scivoleco. Baldaŭ, kiam la lastaj ligoj, kiuj ankoraŭ ligas vin kun la surtera vivo forfalos, kaj la Majstro eldiros : " Bone, vi bona kaj fidela servisto," vi transpasos al feliĉa renkontiĝo kun viaj karuloj.

Al vi tiel same, kiel al ĉiuj, kiuj atingis ĉi tiun staton, estas permesate, rigardi en la mondon de ideoj kaj idealoj, ĉar sole per tio vi memvole dekroĉiĝos de la surtera vivo.

Nu, pri la lumo, kiu radias el vi : Tion vi ne ricevis kiel donacon, ĝi estas denature akirita de vi, per ĉiu ama penso, ĉiu peno aŭ eĉ celo al la devo. En la malproksima komenco ĝi aspektis kvazaŭ malgranda eklumeto kaj devenis de Dio, la Kreinto kaj Fonto de ĉia lumo. Tion vi ne povas *kompreni*, sed vi ricevos iom pli klaran ideon pri ĝi, kiam vi estos rigardinta en la mondon de la idealo. Vi tiam konstatos, ke ĉi tiu lumeco estas parteto de la Dia Esenco, " Kiu lumas al ĉiu homo venanta en la mondon." Ĝi vibradas en la plej profunda parto de la homa naturo, kies koro ĝi estas. Kiam ĝi fariĝas tiel forta, ke ĝiaj vibroj atingas la koron de aliaj homoj kaj harmonie vibrigas ilin responde, tiam oni nomas ĝin " la amo."

Sed ekzistas gradoj eĉ de la amo, kiu devas pliiĝi per ĉiu reenkarniĝo ĝis tia grado, ke fine ĝi plenigos la tutan homon. Kiam oni atingis tiun staton, la pureco kaj forteco de la interna lumo ekflamiĝos kaj superregos la materian korpon, aliformante ĝin en tute luman spiritaĵon, kies brilo disfluadas nemezureblan distancon. Tia lumulo povas iri ĉien ajn laŭvole, sendepende de la fizika korpo. Lia sole ŝatata plezuro estas servi al Dio per helpado de la homaro.

Ankoraŭ nekalkuleblajn fojojn vi devos returne vizitadi la teron, antaŭ ol atingi tian perfektecon, pri kiu Jesuo aludis. Tamen iam vi ja atingos ĝin. Via nuna brileco estas montro de la grado de via estonta perfektiĝo.

Ŝajnis al Lilio, kvazaŭ ŝi staras sur unu pinto de montego, kies supro perdiĝis en brile majestan orkoloran nubaron.

Komence je la plej malsupera parto de la montego montriĝis homoj en ĉiu grado de evoluo. Ĉi tiuj estis vojaĝantaj per diversaj, apartaj vojetoj.

El ĉi tiuj unuj estis infanecaj animoj kun instinktoj sovaĝaj, bestaj, vojaĝantaj tre malrapide, tamen ĉiam progresantaj. Aliaj estis ankoraŭ ne infanecaj sed tamen junaj animoj, ĉi tiuj iradis la plej rapide kaj gaje el ĉiuj vojaĝantoj, saltante super malgrandaj nefacilaĵoj, falpuŝiĝante kontraŭ baroj, ofte sed ne grave vundiĝante. Ankoraŭ pli kaj pliaĝaj animoj estis suprengrimpantaj la montegon, ĉiu sekvanta ian idealon. Estis rimarkinde, ke ju pli alte ili grimpis, des pli

fervore kaj trankvile ili iradis, kvankam la venkotaĵoj ĉiam ŝajnis pli nevenkeblaj.

Tiel ofte la vojaĝantoj falis vunditaj, ke Lilio en la komenco ekkriis pro bedaŭro, kaj nekonscie faris ekmovon, kvazaŭ por helpi ilin. Poste ŝi tute trankviliĝis, rimarkinte, ke iu helpanto estas proksime de ĉiu, preta por helpi al kiu ajn suferanto, tuj kiam ĉi tiu ekkrios pro timo aŭ doloro. Ili levis la falintojn, purigis la ŝlimkovritajn, resanigis la vunditojn, konsolis la afliktitajn, montris al dubantoj la vojon.

Rimarkinde ankaŭ estis, ke ĉiu vojaĝanto havis propran vojeton, kiu pri iuj detaloj estis malsimila al la vojetoj de ĉiuj aliaj. Sed tamen ĉiuj vojetoj transpasis sin tre multfoje.

Ankoraŭ alia rimarkindaĵo estis, ke ju pli malproksimen iu vojaĝis, des pli apartigita kaj izolita fariĝis ties vojeto. Estis videble, ke ĉiuj vojetoj estas pli egalaj, ol en la komenco Lilio pensis ilin; ĉar ĉiuj havis multajn verdajn herbejojn kaj alispecajn plezurlokojn dismetitajn inter la krutaĵoj, ŝlimaĵoj, rokaj pintoj, kaj aliaj malfacilaĵoj. Ŝi plue vidis la lumeton en ĉiu homo: kiel eta, nehela, ŝanceliĝa ĝi estis en multaj; kiel forta, brila, firma ĝi estis en aliaj; kaj kiel la brileco pliiĝis ĉe ĉiu ago aŭ eĉ sopiro malegoista.

Neniu estis tute sen helpo, kaj se la interna lumo ne sufiĉis por lumi la sekvantan paŝon sur la vojo, oni bezonis nur levi la rigardon supren, por tie vidi la gvidlumon de la vero. Eĉ se iu ne sciis sufiĉe por povi supren rigardi, estis bezone nur etendi la manon kaj palpe esplori la vojon,

kaj tuj oni prenis lian manon kaj, gvidante per la amo, kondukis lin ĝis, fariĝinte denove memfida, li memvole fortiris sian manon, por provi sola iri.

— Kial ili laŭiras tiel multe da diversaj vojetoj, kaj kien ĉi tiuj kondukas ilin?—demandis Lilio.

— La leĝo de libera volo estas la kaŭzo, ke ili laŭiras diversajn vojetojn. Ĉiu homo devas eltrovi . . . devas eĉ trabati al si propran vojeton tra la vivo, kvankam en la fino de finoj ĉiuj vojetoj kondukas la vojaĝanton ĝis perfekta unuiĝo kun Dio. Per Dia elspiro fariĝis la homo; kaj en la fino, ĉu Dio permesus, ke Li perdu eĉ unu el Siaj kreitaĵoj? Aŭskultu la vortojn parolitajn de Ŝri Kriŝna, konata instruinto de la homaro, kiu, por plifortigi la diron, parolis kvazaŭ per la voĉo de la Kreinto mem*: "De kie ajn la homoj Min alproksimiĝas, Mi bonvenigas ilin, ĉar Miaj estas ĉiuj vojoj, de kie ajn la homoj elektas ilin."

Dum Lilio rigardis la sennombran grimpantan homaron sur la montego, ŝi ekdeziris vidi, kie staras Filipo kaj Ĝojo.

Ambaŭ staris iom alte, ambaŭ bone progresis, sed sur aparte grandan spacon estis radianta la de Ĝojo interna lumo. La gefratoj nun fikse rigardadis tion, kio de ilia vidpunkto ŝajnis kiel malluma, minaca nubo. Sed kiam Lilio ĝustigis sian vidadon, por vidi ĝin de pli proksime, ŝi trovis, ke ĝi estas nenio alia, ol la ombro ĵetata de la valo de la morto, en kiu ŝi mem staras; tial ŝi demandis la anĝelon:

* El "Bhagavad Gîta."

— Por kio ĉi tiu bela valo aspektas tiel mallume al la surteraj loĝantoj, kaj precipe tiam, kiam la amataj ĵus enpasis en ĝin? Ŝajnis al tiuj sur la tero, kvazaŭ la amataj postlasis ne nur karulojn sed ankaŭ ĉion luman, firman, kaj daŭran, kiam ili malaperas de ilia vido.

— La kaŭzo de tio estas, ke la surtera vivo mem estas ia iluzio. Por loĝanto surtera, veturanta per ŝipo aŭ vagonaro la unuan fojon, ofte ŝajnas, kvazaŭ sin movas la *lokoj*, kiujn ili preterpasas, ne la veturilo per kiu ili moviĝas. Tie sur la tero oni inklinas percepti kaj juĝi sole per la fizikaj sentiloj. Per tio oni eraras, se oni rigardas la materion kiel la solan realaĵon. Anstataŭ esti reala kaj firma, la materio estas nur la formo, kiu kvazaŭ per vualo malĝuste vidigas ĉion spiritan. La formo ofte ŝanĝiĝas laŭ la vidpunkto de la individuo. Ju pli alte li grimpas sur la montego de la evoluo, des pli ŝanĝebla ŝajnas al li la materiaĵoj kaj des pli realaj kaj eternaj montriĝas la spiritaĵoj.

Tamen neniu povas akiri spiritan percepton ĝis post longa penado kaj ekzerciĝado. Lerninte iom precize juĝi per la sentoj, li ankaŭ scias ne tro alte taski la valoron de tia juĝado, kiu estas *rimedo*, ne *fino*.

Pri la valo de la ombro de la morto, ju pli oni alproksimiĝas al ĝi, des malpli terure aspektas ĝia vualo, ĝis fine oni konstatas, ke la nigra teruro estis nenio krom iluzio, pli aŭ malpli ŝajnigita reala kaj pliigita de la distanco kaj nescieco. Transpasante en la profundaĵojn dum via trairo tra ĝi, vi trovos, ke ĝi estas bele lumigita kaj per

floroj tapiŝita, kaj ke ĉiela muziko aŭdiĝos. Tiel belege ĝi aspektas, tiel ripozige kaj alloge, ke se la vualoj de la materio, forgesemo, kaj timo ne estus tiritaj antaŭ ĝin, la homoj ne restus kontentaj sur la tero, ĝis ili lernus la lecionojn de la vivo.

Kiam, malgraŭ tio, homo persistas neinvitite eniri ĝin, li trovas la valon malagrabla. La lumo blindigas tiun, kiu eniras nepreparita, la odoro de la floroj naŭzas, dum la harmonio aŭdiĝas kiel malharmonio. Fakte, la valo de la ombro de la morto ne estas *loko*, ĝi estas nur la transira *stato* inter la mallibera vivo surtera kaj la libera ĉiela vivo. Simile al la vojetoj, kiujn la homoj sekvadas sur la tero, ĝi ne estas sama por ĉiuj. Sed ĝi ja estas nepre pli facile kaj plezure irebla, ol antaŭe pensas ĝin la plimulto de la homoj.

— Nu—diris Lilio, vidante iom pli klare la celon kaj vojon de la vivo, vidante ankaŭ tion, kio estas sur la vojoj de Filipo kaj Gojo—stranga nepacienco ekkaptis min, kaj mi jam sopiras al la atendantaj min amatoj . . .

Ĉe tio Lilio eliris el la valo de la ombro de la morto, kaj, vidante la nedireblajn belaĵojn kaj majeston, vidante ankaŭ tiujn, kiuj ŝin atendas, ŝi ellasis ĝojplenan ekkrion : Mia edzo . . . kaj Florenco . . . kaj . . .

Sed la ĝojplena ekkrio, kaj la hela esprimo, kiun la vizaĝo samtempe akceptis, estis ĉio, kion komprenis la homoj starantaj ĉe la lito. Ili pensis en la komenco, ke Lilio vekiĝis el peza dormo;

sed post ne longe troviĝis, ke la vortoj estis la lastaj vortoj de Lilio, kiu, ankoraŭ parolante ilin, disiĝis por ĉiam de la korpo, kiu al la karuloj ĵus forlasitaj, ŝajnis ĉio, kio de ŝi restas.

LA FINO

GARDEN CITY PRESS LTD., LETCHWORTH, ENGLAND.